

HAN RINER

(HAN RYNER)



LA INGENIA HIDALGO

MIGUEL CERVANTES

el la franca originalo
tradukis R. Laval (Valo)

La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut

124B * 1978 * 7 FF

Averto de la tradukinto

Konforme al la originalo, mi ne transskribis la plimultajn el la hispanaj propraj nomoj. Por proksimuma prononco de tiuj nomoj validas jenaj reguloj:

c antaŭ a, o, u : k
 c antaŭ e, i } angla th "dura", kiel en "three",
 z } ne kiel en "that". Ĝenerala transskribo : c

oh = ĉ

u antaŭ alia vokalo : ŭ
 sed : qu = k antaŭ e aŭ i.

g antaŭ e, i } ĥ
 j }

ll = lj.

s = inter s kaj ŝ.

v = inter b kaj v.

h : muta.

n = nj.

y = i aŭ j.

Ĉiuj vortoj netroveblaj en PV (kun suplemento) estas listigitaj en fina glosaro.

Korektendoj

p. 15 l. 19 ĉiam militistan devas esti ĉian
 p. 16 piednoto : picaros : sentaŭguloj, friponoj.
 p. 92 l. 3 babordan d.e. tribordan.
 p.111 l. -4 senluna nokta d.e. nokto.
 p.126 l. 21 la plej grandan d.e. granda.
 En kelkaj lokoj Costanca devus esti Costanza.

Unua parto.

Ĉapitro Unua

La 7an de oktobro 1613, je la oka matene. En Madrido, Leon-strato, en la malriĉa domo n^o9, grupo 226a. Unu ĉambro, kiu, se dediĉita al unu nura uzo, manĝo- aŭ dormo-ĉambro, ridetus de amplekso. Riĉa je sunlumo, ĝoja de helo kaj pureco, ĝi tamen ŝajnas ridi nur pene, la vasta ĉambro, kiel aliaj plorus. La mebloj, tro frotitaj de tro longa tempo, tro brilas; ili proksimigas ordon tro sci-plenan kaj kunpremitan. La atenton kaptas unue tri litoj sen kurtenoj; de malproksime la kovriloj ŝajnas broditaj; de proksime ilin ekzamenante, oni admiras la delikatan zorgecon de la flikoj. Ankaŭ la loĝantoj estas multaj, kaj oni sentas, ke ili vivas ĉi tie tutan sian striktan doman vivon. Ĉe la piedo de ĉiu el tiuj litoj, kiu nun surhavas ŝtofojn kaj laborinstrumentojn, sidas po unu virino, kun la rigardo kaj la fingroj mergitaj en mon-akiriga kudraĵo. Kvara virino, klinstaranta antaŭ la kame-
no, ekbruligas malriĉan fajron sub argila kuirpoto.

Sidanta antaŭ tablo, viro skribas kun tremeta vervo. Lia manĝo kuras sur la papero laŭ la irmaniero kaj galopo de ĉevalo sur vasta kampo. Sed fojfoje ĝi haltas kvazaŭ ĉe vojkruciĝo aŭ ĉe bruo de alproksimiĝo. La skribanto, kun malrapide ŝanceliĝanta kapo, hezitas inter du vojoj-
aŭ, kun atenta vizaĝo, atendas, por eksalti sur la predon, ke iu penso, ankoraŭ malklara kaj fora, fine pasu en lia kaptoproksimo.

Ĝuste hodiaŭ eniras la viro en sian sesdek-sepan jar-
aĝon. La virino, kies grandaj regulaj trajtoj lumiĝas laŭ la kapricoj kaj rebriloj de la kamenfajro, estas kvardek-naŭjara. Unu el la kudrantinoj estas sepdekjara, la aliaj proksimas je trideko. Ĉiuj vizaĝoj, per sia magreco, per profundaj kavoj kaj krutaj elstaraĵoj, diras la longan daŭron de la senecoj; tamen ilin ornamas la aristokrateca

belo, neegale kuraĝa.

Animata de la malpezaj bruetoj de la plumo, de la frotataj ŝtofoj, de la lignopecetoj milde ŝovataj sub la marmiton, la silento ŝajne konsistas kune el rezignacio kaj el respekto al la laboro de la verkanto.

Marsante sur la piedpintoj, la kuiristino venas malantaŭ lin. Kliniĝante ŝi avide rigardas : la alta skribo ĵus starigis kiel triumfon noble grandan nomon, Persiles. Tiu vido malheligas la scivolulinon. Rideto de disreviĝo krispigas ŝiajn amarajn lipojn. Sur la ŝultron de la maljunulo ŝi metas manon karesan kaj riproĉan. Kaj, kiel oni admonas amordlotatan sed obstinan infanon :

- Vi do neniam estos serioza, Miguel ? La alparolita viro sin turnas, vizaĝo de bono kaj volo. La rideto sur liaj lipoj estas floro de tenero, sed lia rigardo eklumiĝas de beleta maliceto.

- Kion vi nomas serioza - li kontraŭdiras -, eble tio ne tre konvenas al poeto.

- Ĝi konvenas al viro.

La poeto respondas nur per plilarĝigo de la rideto. Sed ŝi aldonas per voĉo subite akra :

- Ĝi konvenas al malriĉulo.

- Miaj personoj estas riĉaj anstataŭ mi.

Komenco de malpacienco levas ŝultrojn malgrasiĝintajn, sed ankoraŭ belkurbaj. Kaj la virino rebatas :

-- Ĝi konvenas al viro, kiu havas kvar virinojn per subteni.

La viro estas el tiuj, kies mildeco respondas alie ol per vortoj al iuj vortofrapoj. Malgraŭ malforta rezisto, li ŝin ĉirkaŭas per sia dekstra brako, metas sur ŝiajn vangojn du kisojn sonorajn kiel kastanjeta klako.

Ŝi duone paciĝas. Parte ridanta, parte paŭtanta, ŝi murmuras :

- Kiam temas pri karesoj, Sinjoro Miguel Cervantes estas malavara.

- Li donas, kion li havas.

Cervantes iras kisi la aliajn virinojn : donja* Luisa lia fratino, donja Isabel lia filino, donja Costanza lia nevino, lin akceptas tenere, sed ne sen malĝajo. Poste, enpenŝiĝinte, preskaŭ kiel blindulo, kun la manoj iom antaŭen etenditaj, li marsas, kvazaŭ serpentirado gvidata de l'kutimo, tra la sursutita ĉambro. Ĉu li sonĝas pri

* donja, hisp. doña, ina formo de don, nobeltitolo (el la latina dominus)

siaj propraj zorgoj kaj pri la penoj de la povraj estuloj lin ĉirkaŭantaj ? Ĉu li songas pri la imagitaj zorgoj kaj la romaneskaj Laboroj de Persiles kaj Sigismunda ?

Hazardo aŭ kutimo haltigas lin antaŭ krudligna bretaro. Liaj okuloj rigardas la librojn, kiujn ĝi surhavas, sed ĉu ili vidas ilin ? Ĉu ili vidas, meze de la supra breto, lian Galatea'n, kiu atendas, kiel Don Kihoto, sekvon kaj finon ? Ĉu ili vidas, ĉirkaŭ lia nefinita idilio, la elegantan aron de la italaj aŭ hispanaj paŝtistoj : la Pastor Fido, la eklogoj de Garcilaso de la Vega, princo de la Kastiliaj poetoj, la Amanta Diana de Jorge de Montemayor, la Aminta de Tasso, en ties gracia teksto kaj en la aminda traduko de Jauregui, tiom fama kiel pentristo, kiom kiel poeto ? Jes, nun li vidas. Li ekprenas ĉi tiun volumon, ĝin duonmalfermas, legas duonpaĝon. Kaj li murmuris, tute ridetanta : "Klera pentristo de portretoj, kiel vi ankaŭ scipovas pentri animon ! Antaŭ via verko kaj tiu de Torkvato Tasso, oni hezitas, ekvilibro de ĝojoj, deklari, kiu estas la traduko, kiu la originalo".

Li remetis la libron en ĝian lokon, kaj lia mano amekaresas tion, kion portas la meza breto, tiu, kiu plej bone prezentas la librojn al rigardo. Kvazaŭ en kavaleria rajdatako, kavaliraj romanoj kaj epopeoj sin miksas kaj interbatas. Amadis el Gallio renkontas tradukon el Homero. Latina Vergilio enkadriĝas inter Palmerin el Anglio kaj Don Belianis. Tiran la Blanka, "trezoro de kontento kaj mino de tempopasigoj", kunigas siajn grandajn rideksplodojn kun la delikataj ridetoj de Ariosto. Jerusalem liberigita sin apogas sur tri Kastiliaj poemoj, la Araucana de Don Alfonso de Ercilla, la Austriada de Juan Rufo, la Montserrat de Kristoforo de Virues.

Tre neglektata, kredeble, estas la malsupra breto. Sur ĝi la plimultaj libroj estas kuŝe metitaj, laŭ hazardaj amasoj. Ĝi estas kaoso da diversaĵoj, el kiuj verŝajne nenio interesas la poeton. Tamen kelkaj verkoj estas pli honore pritraktitaj; ili prezentas, sen antaŭa priserĉado, siajn dorsojn kaj titolojn. Ili estas kolektoj el amikaj poetoj, versoj de Padilla, de Malmonado, de Barros, de Jage de Salas, de Hernando de Herrera.

Ĉu li vidas la vastan suplan revon skribotan, aŭ kelkajn el la revoj jam skribitaj de li aŭ de aliaj, la revanto nescias, kio okazas ĉirkaŭ li : apud la tablo, sur kiu

alternas senmortaj skriboj kaj malgrasaj manĝoj, li ne rimarkas la glitantan iradon-kaj la kaŝprovajn gestojn de sia edzino.

Fine li revenas sidigi sin antaŭ sia laboraĵo, tremas sian plumon en la inkon, ĝin proksimigas al la papero. Sed li eksplodas per subita ekrido, kvazaŭ tiklita, en kiu sin miksas gajeco kaj inciteto.

- Jen komenciĝas la sorĉoj! Mi estas tro bona katoliko, ke mi akceptu tiajn misterojn; tiuj de la kredo sufiĉas al miaj kredbezonoj. Catalina, kara sorĉistino, redonu al mi mian Persiles.

Ŝi respondis kun obstinanta mildo :

- Estu prudenta. Prilaboru la duan parton de Don Kihoto.

- Mi ne sentas emon al ĝi.

- Ne temas pri via emo, sed pri la gustoŝato de la aĉetantoj.

- La duaj partoj neniam ion valoras.

- Mi diras pri libro, ke ĝi ion valoras, kiam ĝi havigas ion da mono.

- Tom nenobela opinio, mia nobela donja Catalina de Palacios Salazas y Voznedio.

- Opinio de malsatuloj, don Miguel de Cervantes y Saavedra.

- Malsatas tuta Hispanio, - milde diris la poeto.

Sed tie, preter lito, malforta voĉo glitas kiel suspiro :

- Escepte de la loĝantoj de monakejoj - suspiras la malforta voĉo.

Cervantes dolore sin turnas.

- Mi scias pri via revo, mia Isabel. La malliberejo, en kiu la pano estas certigita kaj la manoj restas senagaj. La eterna dormejo, en kiu la narkotita volo permesas al la imago la sonĝojn plej vagajn kaj malplenajn. Se la parolo estus libera sub la Inkvizicio, ja de iu monakejo estus elirinta al siaj lunatikaj rajdadoj la Kavaliro de la Trista Mieno. Sed ne. La malsaĝo de Don Kihoto, tro grandanima, ne povus flui el tiel egoista kaj venena fonto. Tiun malvarmsentan kaj paralizulan idealon ni allasu al la kripleco de la Ignacoj kaj al la malsano de la Terezaj. Nenion noblan ili havas en sia frenezo, la kripla obstina Vasko, kiu revas pri tutmonda monarkio, sen la duona senkulpeco esti sidanta sur trono; la kimerimaga

nesatigebla amorulino, kiu, malsata post kiam ŝi voris realaĵojn, pelserĉadas mi-ne-scias kian kavan satigon en la fantasta amo al iu Dio. Pli valoras mia Isabel, kaj...
 - Ĉesu blasfemi, - petegas donja Luisa, multobligante sur siaj lipoj teruritaĵajn kruĉosignojn. Ne pli altiru sur nin la koleron kaj malbenon de Lia Majesto.

En tiu tempo la Hispanoj uzis ekzakte la samajn terminojn por nomi sian Dion aŭ por nomi sian reĝon. Ambaŭ Majestojn diris, kun bombasta lojaleco, la sinjoroj predikantoj.

Kaj Isabel :

- Se viaj du pli aĝaj fratinoj (Dio tenu iliajn animojn!) vin aŭdus, kion dirus donja Andrea, pia patrino de nia pia Costanca ? kaj kion dirus Magdalena la beata ? Pro tio ili ja malsaniĝus.

- Bedaŭrinde ili estas ŝirmataj je ĉia malsano. En rifuĝejo ne tre malsimila al tiu, en kiu vi dezirus rifuĝi disde malsato.

- Feliĉegaj tiuj, kiuj mortis en la Sinjoro.

Sekvis longa silento. Cervantes rigardis la manuskripton, kiun al li volis trudi la edzino. Li perokule relegis la lastan paĝon, skribis du liniojn, tuj forskrapitaj per nervoza gesto. Ja certe, la inspiro ne blovis al tiu direkto. Li rekunigis la kajerojn, repuŝis ilin kun malŝata kaj senpotenca movo. Kaj li reiris sian reveman promenadon.

Catalina, incitita de tiu ŝajna neaktiveco, ofte tiel riĉiga, sed ĉiam similanta pigrecon al la neinicitoj :

- Ĉu vi scias, Miguel, kio vin perdis, perdas kaj perdos?

- Perdis! Ĉu perdita mi estas, kaj miaj verkoj ĉiuj pereontaj ? Tion diros la posteularo.

- Ja hodiaŭ, ne poste, endas vivi.

- De post Homero la almozetanto, la veraj granduloj - spertadas la malŝaton de sia epoko kaj la mizeron. Ankorau nun Camoens en Lisbono, aŭ ĉe ni tiu Ercilla, kiu, sola inter niaj hero-poetoj, kapablas vetbatali kun la granda Portugalulo kaj la grandaj Italoj...

- Ĉu Camoens kaj Ercilla vidis ĉirkaŭ si virinojn suferantajn ?

- Kompatindaj estuloj ! Vi dividas miajn suferojn kaj ne povas atingi al la divido de miaj ŝojoj.

Peza de kompato, li revenis al Don Kihoto. Li penis

trudi al si, puntaskon, laboron, kiu, kelkajn tagojn poste, eble estus volupto. Neeble! Iuj kanaloj de lia imago estis sekaj kiel la rivero Mancañares, kiam, laŭ la hiperbolo de Gongora, azeno ĵus eltrinkis ĝin. Aliaj plenstopiĝis, kiel, antaŭ rokoj, la saltego kaj la rapidema riĉo de monta torento. Duobla sufero ! senti haltigi sian tremantan troplenon; devi ankoraŭ pli sekigi sian sekecon.

Liaj senutilaj penoj kaŭzis al li, daŭrante, specon de kapturino. Ja turniĝis lia kapo. Li ree sin levis, iris malfermi fenestron, anhele enspiris aeron. Liaj okuloj ŝajne rigardis la kontraŭan muron. Sed liaj lipoj estis rideto pli kaj pli larĝiĝanta, tial ke li ne vidis la flavan fendiĝantan malbelon. Li vidis, heroon kaj moviĝantan freskon, la rajdadojn de Persiles kaj Sigismunda. Dum momento la iluzio estis tiel preciza kaj truda, ke la poeto pugnosignis al la imagaj malamikoj de liaj imagaj herooj. Sed li rekonsciiĝis, refermis la fenestron, murmuris, skuante amuzitan kapon :

- Ĉu do mi estas pli malsaĝa ol la inĝenia hidalgo, mi, kiu ne bezonas, por ekmovi mian frenezon kaj mian koleron, la marionetojn de majstro Petro ?

Virino havanta ion por diri, ĉiam fine ĝin diras. La parentezoj al ŝi diktitaj de la konfuzo de ŝia penso aŭ de la konfuzo de la okazoj : obstakloj, kiuĵn ĉirkaŭiras aŭ suferas instinkto obstina kaj abunda kiel akvofonto. La babilado de virino eble nescias, kiĉn ĝi iras, tamen ĝi alvenos al fino. Ŝiaj paroladoj necerte fluas al neevitebla celo. La menso de ĉiu virino estas, sub kruta deklivo, oceano ricevanta ĉiuĵn riveregojn kaj riveretojn.

Catalina staris antaŭ Cervantes.

- Vi ne volas aŭdi - ŝi diris -, kio vin perdis, perdas kaj perdos ĝis la fino; se vi ne havos la prudenton aŭskulti vian edzinon ?

- Mi timas, kara amo mia, ke mi jam aŭdis tion, kion mi tuj aŭdos.

- Ĉu vi nur scipovus ĝin rediri ?

- Eble, se mi konsentus pri tiu iom ridinda provo, kvankam de tiam mi pensis pri multaj aliaj aferoj.

- Pri via Sigismunda. Ŝi interesas vin pli ol mi.

- Kaj vi dezirus, ke mi ankoraŭ pli interesiĝu pri Dulcinea, ho senjaluzo edzino, ho rara perlo !

Sed Catalina; levante manojn tremantajn pro spitiĝo :

- Kio vin perdis, perdas kaj perdos, estas la manko je persistemo.

Kaj, precizigante la akuzon :

- Kial vi ne daŭrigis vian unuan karieron ? kial vi ne restis soldato ?

Multajn aferojn por respondi estus havinta la poeto. Li elektis tiun, kiu povis esprimiĝi per simplaj gestoj. Li montris sian kripligitan maldekstran manon kaj li montris sian blankan barbon.

- Via barbo estis ora ondofluo, kiam vi forlasis la armenon... Kial vi eĉ ne finis vian unuan libron, tiun Galatea, en kiu vi min amis ?

- Tial, ke mi vin edzinigis.

La dubsenca rebato incitis Catalina'n.

- Tio kredeble signifas, ke vi min ne amas plu ?

- Adorata tro ofendiĝema kaj maltrankvila, Galatea povis havigi al mi nur vian amon. Ekde la tago, kiam vi fariĝis mia, necesis pripensi pri...

- Longatempe via teatroverko prosperis. Vi kulpis la malsingardon forlasi dudekjaran teatroverkadon, kaj de tiam vi vane provas reenigi en ĝin.

- La prospero, kiun vi laŭdas, ne sufiĉis por havigi al ni panon. Ĉu vi forgesas, ke dum la dudekjara silento, kiun vi al mi riproĉas, premite sub administraj laboroj, mi ne povis trovi eĉ unu horon por verki ?

- Sed viaj nuntempaj komedioj, kial vi faras ilin tiaj, ke la komediistoj ilin rifuzas ?

- Ili deziras nur verkojn de Lope de Vega.

- Ĉu do vi estas nekapabla fari, kion faras Lope ?

La plej simpla virino scipovas adapti sian veston al la nova modo. Kaj vi, kun tuta via spirito, vi ne scipovus adapti vian parolon al la novaj gustoj de la publiko ?

Prefere diru, ke vi ne volas.

- Mi provis.

- Senkonvinke, malŝateme, kiel homo, kiu opinias malaltiĝi.

- Mi ja malaltiĝis, kaj ne sendolore.

- Kun iom pli da bonvolemo, vi estus altiĝinta ĝis sukceso.

- Mi faris, kion mi povis. Estas ja malfacile, mi asertas al vi, sin fari arte tiel monstre falsa kaj malsprita, kiel estas nature nia glora Lope de Vega.

- Malsprita ! Viro, kiu perlaboras tiom da mono !

Sed, ne atentante, kiom da indigno kaj konsterno estis

en la krio de Catalina, Cervantes asertis :

- En la daŭro de l'jarcentoj, nia nuntempa teatro estos la honto de Hispanio.

Kun fervora elokventeco li diris, kian teatron li estis prirevinta, kian teatron li estis komencinta en sia junaĝo kun Numanco kaj La Konfuza.

- Mi deziris tragediojn gravajn, severajn, potenciajn. Mi volis, ke la teruro skrapegu la animojn, kaj poste, torento, kies furiozo perdiĝas en la trankviliga lulado de l'maro, dronu meze de larmoj, de teneraj emocioj, de la ebena senfineco de l'kompato. Kaj mi deziris komediojn, en kiuj la rido ne estu plu la stulta mekanismo kun risortoj similaj al tiuj de kaptiloj; la stulta mekanismo, en kiu la spektanto estas kaptata kiel rato aŭ vulpo, en la abrupta kunpremiĝo de krudaj surprizoj. Ho rido, kiun mi amas, vi malfermiĝas sub la suno, radianta de logiko, lumo kaj varmo, de vera karaktero !

Poste lia vervo primokis, kion oni liveris al la publiko anstataŭ la eblajn majstroverkojn, tiun tutan infanecan amuzilon provizitan per la nura intrigo komplika kaj neverŝajna. Amuzilo, al kiu oni oferis ne nur la regulojn, pri kiuj Lope de Vega sin flatis, ke li enfermis ilin sub ses ŝlosiloj, sed ankaŭ la naturon, la veron, la belon, la ekvilibron, la racion.

Li parolis kun venka fervoro. Ja certe, Catalina ankoraŭ skuadis, neado kaj rifuzo, obstinan kapon. Sed Luisa, Isabel, Costanca rigardis la poeton kun, en la okuloj, la flamo de admiro, kaj sur la lipoj la rideto apenaŭ duonaperta de ekstazo.

Kiam li reeksilentis, la kudrotaskoj kuŝis dormante sur la genuoj. Isabel, klinita al sia patro, havis la brakojn suprenlevitaj kaj iomete streĉitaj. Costanca lasis la siajn inerte falantaj. Luisa kunpremis la manojn kvazaŭ en adoro. Kaj ŝi ekkriis :

- Ho Miguel ! Ho, fonto de elokventeco !

- Sed, - seke diris Catalina - li eĉ ne scipovas fluigi la propran akvon al sia muelilo.

Dume iu vokis ĉe la pordo. Catalina kuris malfermi. La keo en pompa livreco donis al ŝi, ne sensolene, larĝan papeiron. Ĝin bonodora vakso sigelis per la blazono de Lia Kardinala Moŝto don Bernardo de Sandoval y Rojas, Granda Inkvizitoro kaj Arkiepiskopo de Toledo.

- De Monsinjoro - diris la kuriero, religiece kliniganta.

Cervantes proksimiĝis kun nobla riverenco. Kaj li petis :

- Diru al Lia Moŝto tutan mian emocian dankemon. Mi scias, kiome la Gloro de Dio kaj la Pureco de l'Kredo okupas la zelon kaj la tempon de Monsinjoro. Klarigu al li, ke la diskretemo, kiu prokrastigas la momenton, en kiu mi iros kisi liajn piedojn, estas la plej granda ofero, kiun mi povas fari al li kaj al nia sankta religio, la plej granda signo de sindonemo, kiun mi povas doni al ili.

La lakeo, antaŭ ol foriĝi, replikis per ne malpli bombasta komplimento, en kies faldoj, ĉi-foje, ni suspektos nenian ironion. La komplimento de l'servisto estis ja tiel bele formulita, kiel povus esti, en kiu ajn alia lando, tiu de plej eleganta kortegano. La rafinita hispana ĝentileco nobeligis kaj ridindigis tiel la parolojn de la plej humilaj, kiel la paroladojn de la plej fieraj.

Minuto da silento sekvis lian foriron.

Catalina tenis enmane la sendaĵon de la Granda Inkvizitoro. Ĝin rigardante, ŝi havis sur la lipoj paŭton de malŝato.

- Vi estas ja tre respektoplena antaŭ la sankta sigelo - diris Cervantes en bonhumora rido.

- Vi ja scias, kiel mi, kion enkaŝas tiuj pompaj formoj. Unu realon*, la ridindan, la humiligan ĉiutagan almozon...

- Donu al ni hodiaŭ nian ĉiutagan panon - mokridis la poeto.

- Miguel, ne ludpetolu pri la preĝoj! - plorpetis donja Luisa en la hasto kaj trêmo de la krucosignoj, kiuj fermis al malicaj vortoj ŝian buŝon kaj ŝiajn orelojn.

Kaj la amara Catalina :

- Monsinjoro de Toledo estas malavara patro. Li disdonas al kvin homoj la panon, kiu ne sufiĉas al unu. Tiuj mizeraj kaj malhonoraj helpaĵoj, mi ne scias, kio min detenas ilin resendi al li kun la esprimo de mia malestimo al lia grasa avareco !

- Gardu vin, mia Catalina ! Tiu pompa realo pli valoras por ni ol dublono, kiu venus al ni simple, de alia origino.

- Via stranga maniero taksi la monerojn...

- La homoj, kiuj vidas lakeon en livreo de la Granda Inkvizitoro eniri ĉe nin kun tiel regula ofteco, neniam tentigos nin denunci al la Inkvizicio. Tiu realo ŝajnas al vi

* La realo egalvaloris 20 maravedojn, t.e. 26 el niaj centimoj.

maldika kaj mallarĝa; al miaj okuloj ĝi ampleksiĝas, dika kaj protekta kiel ŝirma ŝildo.

- Hastu, Miguel, aldoni al ĝi tion, kion povas profitdoni la dua Don Kihoto.

Cervantes ŝajne ekdecidis.

- Mi iras al Esquivias, tie mi plibone prilaboros ĝin.

- Kredeble prava vi estas. Sendube estas malfacile verki en tiel strikta loĝejo, meze de kvar virinoj, kvankam silentemaj, almenaŭ kiel virinoj...

- Vi estas, kio plej bona estas en la mondo.

- Longa estas la vojo - rimarkigis la malfortika Isabel.

- Ne por maljuna soldato, kia via patro.

Li ĉirkaŭmetis al sia kolo, post la rimeno, ĉe kiu pendis lia spado, la rozarion, kiu, same kiel la spado, apartenis al la ekipaĵo de ĉiu Hispano.

- Kunprenu vian Don Kihoto'n - petegis Catalina.

- Neneĉese, amo mia, mi ŝcias, ĝis kie ĝi atingis.

Li surmetis sian larĝan ĉapelon, prenis sian pezan bastonon, kisis la kvar virinojn, ekforiĝis.

Tuj kiam li estis ekstere, Catalina hastis al la tablo.

Ŝi kunemetis la restantajn paperojn, portis ilin en kofron apud aliajn manuskriptojn. Ŝi ekzamenis la enhavon de la kofro, duonvoĉe legante la titolojn: la Semajnoj de la Ĝardeno, sekvo de Galatea, Bernardo, la Eraroj de la Okuloj, la Babiluloj, la Falsa Onklino. Nenio pli, krom tiu dua parto de Don Kihoto, kiun ŝi ĵus reordigis. Skuante la kapon, ŝi refermis la kofron. Kaj, lasante siajn brakojn fali pro senkuragiĝo:

- Li kunprenis Persiles kaj Sigismunda!

**

Ĉapitro Dua

En la urbo Cervantes marŝis laŭ malrapida takto. Kastilia nobelo, se li ŝajnus urĝata, naskus tro da ridoj. La viro, kiu per tiel nerva vervo agitis la vibran frenezon de don Kihoto, la treman frenezon kaj la agresivan saĝon de Tomas Rodaja, la "vitra licenciato", iris tra la stratoj de Madrido per paŝado kvieta, digna, preskaŭ solene rigida. Hodiaŭ lia kutima graveco ŝajnis plipezigitaj kaj malrapidigitaj per ŝarĝo de hezito.

Sur mezkreska korpo kun tre ete kurbigitaj ŝultroj, Cervantes portis, iom antaŭen, vizaĝon denature tre belan, en kiu la grandanimeco estis gravurinta la plej noblan el la poemoj. "Agla vizaĝo", li mem iam diris. La nazo, kurboforma sed belproportia, proklamis altecan kuraĝon kaj frontemon. Fajngitaj komence per kvinjara heroa kaptiteco, poste per batalado kontraŭ la hundaro de maljustoj, jen bojeganta, jen hipokrite silenta (nur la demenco de don Kihoto kaj la memfida nescio de l'junaĝo ĝin atakas per la naiveco de spado), la kuraĝo de la eks-soldato estis perdinta ĉiam militistan kaj brutalan trivialecon. La grandanima Cervantes neniam brulis per tiu fia soifo, per tiu malnoblega rabamo, kiu estas la plej okulfrapa difekto de la militista altvaloro. Iam li estis spertinta la infanecan vantecon, la bezonon esti laŭdita de la estro, kiu faras el la soldato kaj el la generalo eternajn infanojn. En la bolado de l'printempa suko, li estis dividinta alian malsaĝon de la armeanoj. Venenita per la antaŭjuĝoj de sia tempo, la antaŭjuĝoj de sia lando, la antaŭjuĝoj de sia kasto, la juna hidalgo, kiel ĉiuj animoj ĉirkaŭ li, estis levita per la militista krueleco, per la hispana krueleco, per la nobela krueleco, per la murda honoro kaj la sadismo de gloro. Sed rara estulo, destinita por realigi sian animon, suprenleviĝas, por la mirinda verko, al altaĵo, kiu ignoras la ŝlimojn de lia origina medio samkiel la universalajn kaj eternajn kotaĵojn. Cervantes estis akirinta la veran, la solan kuraĝon, la kuraĝon, kiu konservas nenion bestan; tiun, kies emociigan, ebrian skizon prezentas al ni la martiroj; tiun, kiu ne scias frapi pli ol retroiri. Nun lia valoro estis la homeca alt-

valoro, sindefenda, rideta, stoika.

La grandaj ridemaj okuloj de Cervantes mokis tion, kion la nescio de l'homoj nomas "la vivo". Ilia lumo kantis, ke la falsaj posedaĵoj serĉataj de la supraj kaj mal-supraj popolaĵoj, de la vulgaruloj el la popolamasoj kaj de la vulgaruloj el la princoj, ne valoras konkerklopodon. Kaj la rimedoj de la konkerado estas malaltigaĵoj, per kiuj, kaptante la mondon, oni sin mem forlasas kaj perdas.

Ankaŭ la mallarĝeco de la buŝo malŝatis la malhonorajn honorojn kaj la malkuraĝecon de l'prospero, ordinaraĵoj re-kompencoj de malnoblaj koroj, de flekseblaj konsciencoj, de falsaj kuraĝoj, "rampantaj kiel blazonaj leonoj". Longaj blankaj lipharoj faris sur la lipoj hirtaĵon de pureco. La silkeca argento de la barbo mildigis tion, kion tiel multe da malŝato, rifuzo kaj mokridemo igus iomete dura; pli alte situanta ol volis la tiama modo, ĝi maskis la malsatecan magrecon de la vangoj, kavoj englutitaj en la sendentan buŝon.

La frunto elvolvis altan larĝan superbélon. Blanka, nuda, vastega, ĝi alte starigis la nekonkereblan turon, en kiu karaktero maldormadas; sed ĝia larĝo, glata, streĉa, iomete elstara, revigis pri espero kiel la ventro de juna virino, harmonia kvankam plena de estonteco. La hararo ŝajnis kanto de forto kaj gracio; apenaŭ kelkaj dubegrizaj ombroj sin miksis kun ĝia varma krispeta kaŝtanton.

La kostumo estis pli simpla ol povis permesi al si eĉ malriĉa nobelo. Nek kordonoj nek galonoj sur la larĝa blanka feltoĉapelo. Ne amelita kolumo aŭ laŭmoda krispo, sed la kolo nuda kaj libera. Ne tratranĉita jaketo, riĉa, ridinde pompa ŝifonaĵo, kiu vidigus, tra la tranĉoj en la ŝtofo, la satenon de la subaĵo; sed jako malhelgriza, kies solida unutona drapo preskaŭ similis al led.

La kuloto estis, laŭ gusto de elegantuloj, nesufiĉe ampleksa, kaj la ŝtrumpoj estis el lino, ne el silko. La poeto ne trenis, kiel kortega hidalgo, vastajn konusajn botojn, urnojn el flavbruna led, plenigitajn en la supro per elfluaj puntaĵoj. Ankaŭ ne per la "alpargates" (*) de la popolaĵo kaj de la "picaros" (**) estis vestitaj liaj

(*) alpargates : piedvestoj el kanabtol.

(**) picaros : sentaŭguloj.

piedoj, sed per fortikaj rondpintaj ŝuoj de studento. Fine, signo de ega mizero, Cervantes ne havis mantelon.

Ne nur la manko je mono kaj kredito pravigis ĉiujn apartaĵojn kaj simpligojn de tiu vesto. Ĉi tie la malriĉeco pligravigis de spitemo. Kiomfoje, antaŭjunaj elegantuloj premitaj sub peza jaketo, paralizitaj per la amelo de l'kolomo, ĝibigitaj en la masiva mantelo, trenantaj pezajn botojn kiel globegojn de pun-galeruloj, aŭdiĝis la rida voĉo de Cervantes laŭdanta, pro ilia malpezeco kaj svelteco, la ŝtonajn statuojn de la katedraloj! Maldeco pli netolerebla ol plej aĉaj paroloj, la poeto tenis siajn ungojn tonditaj, dum kostus al li eĉ ne unu maravedon por ilin konservi longaj, kiel postulis la bona moro kaj gusto.

Sin apogante sur nodhava bastono, tiu kostumherezulo iradis laŭ hezita malrapido. Eĉ, ĉe vojkruciĝo, unu minuto, li haltis. Sed subite li elektis decidon. Baldaŭ poste li vokis ĉe pordo, demandis, ĉu sinjoro don Juan de la Cueva estas hejme. Nelongan tempon poste aperis sinjoro don Juan de la Cueva.

Povra verkisto kaj riĉa presisto, sinjoro don Juan de la Cueva estis ankaŭ, kiel ĉiuj supraĵaj spiritoj, entuziasmo de Lope de Vega. Li sin gloris, ke la "fenikso el la sprituloj" bonvolis lin honori per sia familiareco kaj siaj konsiloj.

Post la bombastaj komplimentoj, per kiuj du Hispanoj devis sin reciproke saluti, Cervantes demandis la presiston, ĉu fine li ion decidis pri certa manuskripto, jam de longe en atendo ĉe li.

- Pardonu min, sinjoro, - respondis la potenculo - Kun ega plezuro mi legis viajn Komedioj kaj Intermezoj'n.

- Ĉu plaĉis al vi miaj pecoj? - Ĝoje diris Cervantes. Li songis, ke eble li reportos iom da mono al donja Catalina.

- Min persone ili ĉarmis. Sed vi ja scias, ke, se mi ne volas prunti de judoj kaj rulaĝi, mi devas atenti la gustojn de l'publiko pli ol miajn.

- Kial la publiko ne pensus, kiel via sinjora Moŝto? - demandis ridetante la poeto.

Ja memtruda, la rideto. La afabla formulo tradukis iom duran penson: "Laŭ kiu rajto ci supozas la publikon ankoraŭ pli stulta ol ci?"

- Persone, mi ripetas, mi estis ĉarmita. Sed mi havas gus-

tojn tro beletrajn, tro rafinitajn...

- Tio signifas ?...

- Mi ne fidas mian spiriton, kiu estas tro fremda al la deziroj de l'vulgarularo. Kiam manuskripto kaŭzas al mi plezuron, mia plezuro mem maltrankviligas min.

- Do vi elektas, por ĝin publikigi, tion, kio ŝajnas al vi malbona ?

- Ne mallerta estus la procedo. Sed mi uzas malpli paradoksan rimedon. Kiam mi hezitas, mi petas mian grandan amikon Lope de Vega, ke li ekrigardu la verkon, kaŭzon de mia hezito.

- Do la monarko de l'teatro legis miajn pecojn ?

- Ne, sinjoro Cervantes; al li sufiĉis vidi, ke ili estas verse skribitaj.

- Ankaŭ liaj, al mi ŝajnas, kaj ĉiuj, kiuj estas skribataj en Hispanio.

- Sendube... sendube...

- Ĉu mi konfesu, ke mi ne komprenas ?

- La orakolo de beletro diris al mi, ke oni povas ion esperi de via prozo, sed nenion de viaj versoj.

- Jen estas juĝo iomete sennuanca.

- Mi preskaŭ bedaŭras, ke mi ĝin petis. Sed, kiam oni estas elpetinta la opinion de la fenikso el la sprituloj, estus ofende al la plej admirinda el la homoj neglekti lian konsilon.

- Lope de Vega povas erari.

- Sinjoro Cervantes, mi havas la impreson, kvazaŭ mi aŭdus blasfemon.

- Tamen, vi memoru. En la tempo, kiam eldoniĝis Don Kihoto, li asertis, ke la libro nenion valoras, kaj ke neniu estos tiel freneza, ke li ĝin laŭdu.

- Lope de Vega povis erari unu fojon en sia vivo, kiam temis pri senanaloga verko. Sed nun, sinjoro, temas pri versoj, temas pri teatro... Pro via intereso, por ne malaltiĝi vin en la ŝato de viaj legantoj per eldono neinda je vi, mi faros al vi la geston de vera amiko.

- Kiun geston nome ?

- Mi resendas al vi viajn Komedioj kaj Intermezoj'n. Kaj, se mi aŭdacus konsilon, mi memorigus vin pri la dia Platono bruliganta sian teatroverkaron.

- Pro la gesto kaj la konsilo, akceptu, sinjoro, miajn plej entuziasmajn dankojn.

- Sincere, mi opinias, ke mi ilin meritas. Kaj mi demandas al Platono : "Kiam vi donos al ni novajn Sokratajn dialogojn ?" Kaj mi demandas al Cervantes : "Kiam vi ĝojigos nin per novaj interparoloj inter don Kihoto kaj Sanĉo Panca ?"

- Mi ne scias. Se la malsato lasos al mi sufiĉan tempon, mi esperas antaŭe fini alian libron.

- Des malpli bone, sinjoro. Sed kiu do estas tiu preparata libro ?

- Ĝia titolo estas La Laboroj de Persiles kaj Sigismunda.

- Ĉu almenaŭ ĝi estas proza ?

- Trankviliĝu, sinjor' presisto, proza ĝi estas.

- Tiaokaze, mi tre feliĉe ĝin liveros al mia presejo. Sed mi petas vin, en la nomo de la gloro de Hispanio, ne lasu nin tro longe atendi la novajn rajdadojn de la inĝenia hidalgo.

Cervantes malheligite eliris de ĉe don Juan de la Cueva. La kunfrataj procedoj de Lope de Vega naskis en li preskaŭ tiom da amarsento kiom da malestimo.

- Se la serpento, kies prudenton aŭdacas konsili al ni la Skribo, ne estus mem besto, mi estus tro indulgema, kiam, por spiteti mian edzinon, mi nomas stulta "besto" la lertan, rampan, venenan estulon, tiel supla antaŭ la potencaj, tiel kruela al la malfortaj kaj mildaj. Tiu familia-rulo de Inkvizicio ricevas malpli da ĝojo de siaj sukcesoj, ol de miaj malsukcesoj. Ĉar mi ne havigas al li la okazon bruligi min, lia feliĉo estus vidi min malsatmorti.

Poste li sonĝis en aliaj profundoj. Nekontentaj, ke ili triumfas super ĝi en taghelo, la mezvaloraĉaj ankoraŭ persekutas la genion en ĉiuj faldoj kaj embuskoj de ombro.

- Malgraŭ la publikaj laŭdoj, per kiuj la cirkonstancoj devigas min saluti lin, Lope ja sentas, ke mi ne admiras certajn eksterajn superaĵojn konsistantajn el hazardo, el fia lerteco kaj tro facila komplezo al la stulteco de l' vulgarularo. Eĉ mia silento kaj mia modesteco estas, vole nevole, insultoj al lia ĵaluza maltrankvilo. Li scias, ke ne al li apartenas la estonteco, kaj li neniam estas sata malsatigi kaj humiligi min, dum li daŭras.

La malamo de la Lupo de l'Ebeno (*) estis tiom pli do-

(*) Ĉi tie Cervantes sin amuzas per proksimumo : Lobo de Vega anstataŭ Lope de Vega. (Noto de la aŭtoro)

lora kaj nesatigebla, ke ĝi estis parenca malamo. Boparenco de la Cortinas'oj, patrina familio de Cervantes, la juna Lope, antaŭ ol li atingis la gloron, devis aŭdi tro da laŭdoj al la kuraĝo kaj la sprito de Miguel. Nenio iam lin sufiĉe venĝos.

La poeto estis ŝirata de tiu akra meditado. Proksime haltis sinjora kaleŝo. Tra ties pordo, alteca, moŝte kompla voĉo vokis sinjoron Cervantes.

- Li rekonis la dikan timindan viron, kiu vokis lin. Li ekhavis subitan spontanee naŭzogrimacon. Sed, obeante la neceson, li haste alkuris, kun lipoj apertitaj per humile afabla rideto.

- Kia ĝojo, sinjoro, vin renkonti ! Kia fiereco, ke vi degnas interesiĝi pri la plej modesta el viaj servantoj, ĝis haltigo de via kaleŝo, por permesi, ke mi kisu viajn manojn !

- Vi scias, kiom mi amas vin, sinjoro, vin kaj vian ingĝenian hidalgon. Urgas al mi ricevi novaĵojn pri via farto kaj pri la duaj aventuroj de la Manĉa kavaliro.

- Mi fartas bone, sinjoro, kaj pri la nuna paŝado mi iras labori en la kvietaj kaj trankvilaj etoso de Esquivias.

- Feliĉa Cervantes, vi kiu povas forlasi Madridon, kiam al vi plaĉas. Ligita al la kortego de la plej granda el la reĝoj, mia gloro envias vian liberon. Sed eble, kiel la plugistoj de Vergilio, vi ne konscias pri tuta via feliĉo.

- Ĝi estas difektita, sinjoro, per la bedaŭro min forigi de via duka Moŝto.

Don Alonzo Lopez de Zúñiga y Sotomayor, sepa duko de Bejar, markizo de Gibraleon, grafo de Benalcazar kaj Bañares, vicgrafo de Alcocer, sinjoro de Capilla, Curiel, Burguillos kaj aliaj lokoj, faris al la poeto plej protektan adiaŭgeston kaj ordonis al sia koĉero reekveturi.

Cervantes sekvis perokule la riĉan veturekipaĵon. Kaj li havis sur la lipoj plej mokan rideton.

Tiu duko de Bejar, kiu, en siaj horoj de boneco, degnis sin deklari protektanto de Cervantes, sed neniam faris al li ion bonan, poste fariĝos iom ridinda protektato de la verkisto. Kelkiuj ankoraŭ konas lian nomon, tial ke li, ne senhezite, akceptis la dediĉon de la unua parto de Don Kihoto.

La maliceta subridado de la poeto signifis :

- Ni estas kvitaj, orgojla kaj avara duko de Bejar, aŭskultanto de monakoj. Pro la raportoj de iu Aliaga kaj de iu Blanco de Paz vi apenaŭ ne repuŝis min, kaj neniam vi helpis mian mizeron. Mi stulte dediĉis al vi mian libron, kaj mi devis skribi sur ĝia frontpaĝo kelkajn nemeritajn laŭdojn. Mia almozo estis ŝajna, kaj la estonteco, mi esperas, elmontros, en kia malŝato mi vin tenas. La postularo ekvidos, ke mi ne deĝnis verki eĉ unu linion por vin laŭdi; sed mi kopiis mian dediĉleteron duone el Hernando de Herrera, duone el Francisko de Medina. Eble la estonta legantaro, forprenante el mia verko paĝon, kiu ne estas de mi, estos sufiĉe inteligenta por deŝiri disde vi gloron, je kiu vi neniel rajtas.

Ĉapitro Tria

Elirinte el Madrido, eskapinte, kiel li diris, el la flavaj domoj, Cervantes marŝis, arda melankolia ĝojo, en pejzaĝo de gravaspekta brilo. La vasta Kastilia ebenaĵo, la malpeza penetranta aero, la horizonto el duberuĝaj montetoj, sur kiuj la sunradioj tremetas kaj multobligas per mil rebriloj, la rokoj kun egoj vundantaj, kiam oni alproksimiĝas, sed, de ĉi tie vidataj, stompitaj de la malproksimo kaj suprenlevataj de la lumo kiel pompaj nuboj, ĉio naskis impreson de libero kaj impeto. Tiu dezerto, samkiel tiuj de Karmelo aŭ Sinajo, favoras la grandajn, al ĉielo suprencelantajn revojn, religiajn aŭ epepeajn. La poeto songis, ke ĉi tie la homa penado devas strebi por paciĝi, harmoniigi, sin defendi per la bona rido de la tero kontraŭ la frenezajn de la don Kihotoj kaj de la Terezaj.

Iafoje li renkontis kampulon envolvitan en la heroa mantelo, kaj li interŝanĝis kun li la vastan saluton, en kiu la ĝentilo sin larĝigas al belo. Pli malofte, kampveturilo kun plenaj radoj, kun ĉevaloj kapornamitaj per kokpluma tufo, iranta en milita frakasbruo kaj batala malstabilo, sin volvis en sufiĉe da polvo, por ke la Kavaliro de la Trista Mieno povu imagi, meze de nubo kaj bruo, plej bombastajn promesojn pri aventuroj.

La senmezure vasta pejzaĝo kaj la ekscito de l'marŝado levis en Cervantes potencajn revojn kaj ĝojajn inventojn. Lia inĝenia dankemo diris : neniu kamparo estas tiel fruktodona kiel tiu malfekundo.

En iuj momentoj aliaj meditoj malgajigis lian koron. En ĉiu nova vojaĝo la mizermantelo sternita sur la tuta lando ŝajnis al li pli raspita, pli monotona kaj peza. Kiu malfrua generacio estos sufiĉe forta por ĝin forĵeti?

Tiel iris la poeto en la flirtanta lumo de siaj rememoroj kaj songoj. Bruo de tintiloj kaj stamfado ŝiris lin el liaj aventuroj de vaganta pensulo. Li sin turnis, ekvidis du mulojn portantajn du monakojn. Ankoraŭ tro malproksime por ke, en la ombro de la ombreloj, la vizaĝoj estu distingeblaj. Sed per unua ekrigardo, Cervantes re-

konis la kostumon de sankta Dominiko. Liaj lipoj antaŭenformis malfortan naŭzopaŭton kaj lia paŝado malrapidigis. Neniu vojeto disiĝis de la vojo, kaj la kamparo prezentis nenium arbareton. La interrenkonto estis neevitebla. Por ĝin kiel eble malplej prokrasti, kaj precipe en la espero mallongigi la vantajn ĝentilparolojn, la poeto pli malrapidigis kaj plipezigis sian paŝon. Li afektis treni la kruron, kvazaŭ lama pro laceco.

Kiam la bruo estis tute proksima, li flankeniĝis, atendis por respekteme lasi preterpasi, kaj lia singardema mano ektuŝis la rozarion pendantan ĉe lia kolo. Eble la diskretaj monakoj volos ne konfuzi lian pian okupiĝon.

Kontraŭ babilemo, malforta defendo estas rozario. La hispanoj ja kutimis ekspedadi, interparolante, tiom da maŝinaj preĝoj.

Sub la ombrela ombro, kie la okuloj kaŝiĝis malantaŭ vojaĝaj vitroj, Cervantes rekonis du aragonajn monakojn. Kiu pasos plej proksime de li, tiu estas la dika frato Aliaga, konfesprenanto de l'reĝo. Pro la pezeco de lia korpo, la malnobleco de lia animo kaj la falsema bonuleco de lia parolo, la popolo lin kromnomis Sanĉo Panca. La dua figuro estis alie kaj pli malplaĉa ol tiu dika luna vizago. Longa magra dorso, flekseble arkforma kiel tiu de fojno, vizago gale flava, okuloj embuskantaj malantaŭ la vitroj kiel tiuj de malnoblaj kruelaj bestoj, la maljuna doktoro Juan Blanco de Paz estis, ekster sia ordeno, de ĉiuj malestimata. Cervantes havis personajn motivojn por lin malestimati pli ol ĉiuj.

Al la poeto neniel utilis lia devoteco al rozario.

- Frato, - ekkriis Aliaga, ankoraŭ pli disvolvante sian disvolvon, - detenu vian rajdobeston. Lia Majesto favoras nin per la plej bona el la renkontoj. Niaj muloj obeu al la paŝtakto, kia ajn ĝi estas, de sinjoro Cervantes. Ni kaptu la bongustegan okazon, kaj ebrigi nin per interparolo kun la plej ĝoja el la sprituloj.

- Vi estas duoble grandanima, frato Aliaga. Dankoj estu al vi pro viaj laŭdoj; dankoj pro la karitata projekto ĝojigi per viaj kleraj paroloj la melankolion kaj enuon de soleca vojaĝanto.

- Mi vetus, tro ĝentila sinjoro, ke vi iras al Esquivias, lando de longe fama pro la nobeleco de siaj familioj kaj la boneco de siaj vinoj. Sed la estonteco ĝin gloros pro

la inĝeniaj inventoj, kiujn tie kolektis sinjoro Cervantes.

- Se la kostumo, kiun vi surhavas, ne gardus vin kontraŭ tia suspekto, kaj se viaj laŭdoj ne ĉirkaŭigus la veron per cirklo el eraroj, mi irus denunci vin kiel sorĉaŭguriston.

Aliaga eksplodis per brua rido. La granda rido plene konvenis al lia bonula masko.

- Kaj, kredeble, - diris Blanco de Paz - vi finos en la kvietata etoso de l'vilaĝo la duan parton de via plaĉa kaj neniam sufiĉe laŭdita Don Kihoto ?

Cervantes ne turnis sin al la parolinto; sed li estis simila, mergite en sia preĝado, al neaŭdinto.

Aliaga rediris la demandon :

- Vi iras labori al via admirinda Don Kihoto ?

Iafoje ĉies obstino, citi nur unu el liaj estintaj libroj, deziri nur unu el liaj estontaj, tedis kaj incitis Cervantes'on. Tiam li sin lasis forkonduki al ia maljusto kontraŭ la sola el tiuj verkoj, kiujn oni juste taksis.

Li skuis la ŝultrojn.

- La libro, kiu min okupas, havos, laŭ mia espero, pli grandan valoron ol la tro prospera bagatelo, pri kiu vi parolas. Don Kihoto estis nur ia intermezo aŭ loa*. La komedio, tiu el miaj verkoj, al kiu mi atribuas ian gravecon (se grava povus esti iu el miaj humilaj verkoj), estas tiu, al kiu mi nun oferos pacan semajnon.

- Kiel vi nomos tiun mirindan libron ?

- Tiu bonvola libro sin nomos La Laboroj de Persiles kaj Sigismunda.

- La nomoj de viaj personoj sonas bele. Sed Dulcinea de Toboso, Rosinanta, Maritorna havas mi-ne-scias kion pli gajan.

Oni senmire rimarkos, ke la dika Aliaga, kromnomita Sanĉo Panca, ne citis kiel bonvenan kaj plaĉan la nomon de Sanĉo Panca.

- La libro, al kiu mi diligentas, fray(†), estas neniel gaja aŭ moka. Don Kihoto, ĝoja fajfado de merlo. Mi volas provi, en la vespero de mia vivo, ĉu mi kapablos kanti kiel najtingalo en krepusko.

- Nobla ambicio, se nur viaj kantoj laŭdos la gloron de

*Loa : laŭdo.

(†)fray, fraile (pr. fraj, frajle) = frato (monako).

Dio.

- Mi faros laŭ mia plejbona leblo, fray. Deus est caritas.

(1). Se mi sukcesos, kion mi celas, Persiles estos la epopeo - epopeo ja povas esti proze verkita - de amo kaj pardono.

Aliaga demandis kun subita severeco :

- Ĉu vi kredas sinjoron Cervantes aparte vokita por emfazi la kristanan karitaton kaj la pian korfavoron ? Ĉu vi estas tre certa, ke vi kapablas pardoni ?

Hazarde la fingroj de l'poeto ĝuste tuŝis unu dikan grajnon de l'rozario. Li milde diris :

- Dimitte nobis debita nostra sicut et nos dimittimus debitoribus nostris (2).

Sed Aliaga precizigis sian akuzon.

- Antaŭ nelonge nia frato Blanco de Paz demandis vin ĝentile. Kia persistema rankoro vin malhelpis respondi al li ? Se mi ne eraras, viaj malpacoj datumas de la difavora jaro 1580. Se la Sinjoro dum tridek jaroj prokrastos pardoni vin, ĉu via vivo estos sufiĉe longa, ke restu al li tempo por vin korfavori ?

- La malbonon al mi faritan mi ĉiam pardonis. Ĉu mi povas forgesi la malbonon faritan al la plej ŝarĝpremitaj el miaj fratoj ? Ĉu mi povas forgesi, ke certa malalteco en krimo malkaŝas la definitivan malaltecon de la animo ? Mi certigas vin, patro Aliaga, ke al mi estas pli agrable interparoli kun iu bona homo ol kun iu Blanco de Paz.

La flava vizaĝo de l'doktoro ruĝiĝis de retenata kole-ro, kvazaŭ malpura pajlo, sur kiu tremetas incendio rebri-lo. Sed, kurbigante la dorson, Blanco de Paz konservis humilan sintenon. Li sentis pli avantaĝe lasi defendi sian aferon per advokato, ol ĝin mem subteni.

- Ne kiel bona katoliko vi parolas, - diris Aliaga. Vi parolas ja kiel herezulo, kvazaŭ vi nescius, ke sincera pentito, bona konfeso kaj pastra absolvo forlavas ĉiujn pekojn.

- Ĉu la sincereco de la pentito kaj de la firma intenco de fray Blanco de Paz estus kredartikolo ?... Mi konas apostolon, patronon de la perfiduloj, kiun la Eklezio neglektis

(1) Dio estas karitato (amo).

(2) Pardonu al ni niajn ŝuldojn (liberigu nin de niaj ŝuldoj) kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj (el la kristana preĝo "Patro nia".)

sanktigi.

- Al Judaso mankis fido al la Dia korfavoro. Li malesperis. Li pendigis sin.

- Pro tiu gesto mi lomi malpli malestimas lin. Fia buŝo, ci perfidis per la parolo kaj la kiso. Sed vi, honestaj justaj manoj, vi forĵetis kun naŭzo la monon de l'krimo, kaj vi pendigis la perfidinton. Judaso, duona honestulo, kiome ci ŝajnas al mi supera al...

- Ĉesu viajn herezaĵojn, sinjor' poeto.

- En temoj, kiuj ne tuŝas la dogmon, ne estas malpermesite paroli konforme al la honorsento. Mi kredas kaj konfesas tion, kion instruas la Sankta Eklezio, mia patrino. Ĉu ĝi instruas, ke ne povas ekzisti pli hardita krimulo ol Judaso?

- Ĝi instruas, ke la nepardonebla krimo de Judaso ne estis, ke li perfidis, sed ja ke li malesperis. Ĉu Petro, estinte trifoje renegato, ne malfermas la ĉielpordojn? Judaso estas damnita tial, ke li spertis la rimorson, inferan fajron, ne la penton, purgatorion radiantan de espero.

- Vi estas elokventa, fray, favore al Judasoj.

- Estas ja vi, kiu defendas la Iskarioton.

- Mi diras, ke mi trovas vin elokventa favore al Judasoj - apartenantaj al via ordeno kaj portantaj la saman robon, kiel vi.

- Se miaj superuloj permesas al fray Blanco de Paz porti la blankan robon, tio pruvas, ke ili rigardas lian kulpon kiel riparitan kaj pardonitan. Dum absolvis tiuj, al kiuj estas donita la rajto ligi kaj deligi, de kie vi, ne komisiita por juĝi, prenis la rajton kondamni?

- Neniu mi kondamnas, kaj al neniu mi trudas ian ajn punon. Sed, se vi ordonas al mi paroli al la fraile, ja al mi vi trudas plej abomenan punon.

- Ekzistas oferoj, al kiuj ĝoje konsentas kristano.

- Cervantes opiniis singarde ne tro antaŭen aventurriski en tia interparolo, pejzaĝo de krutaĵoj kaj mallumo. Li neglektis repliki.

- La silento etendis peze penan ombron. Blanco de Paz tro sentis, ke Cervantes ne estas persvadita. Post momenta meditado, ŝajnis al li utile meti sian kontraŭulon en la pozicion de malbona kristano, kiu, spite la plej elokventajn admonojn, ne elŝiras la malamon el sia koro.

- Li diris, kun ŝmira, ŝvita, vomiga humileco:

- Sinjoro Cervantes, forgesu favore al tiu, kiu ne forge-

sos, pardonu al tiu, kiu ne pardonas al si, kaj ĉiutage penadas ripari la malbonon, kiun li iun tagon faris. Mi pensas pri vi en la plej oftaj el miaj preĝoj, kaj ofte mi aplikas al vi, tute aŭ parte, la intencon de miaj mesoj.

Jen estas certe io, kio meritis pli ol banalan repaĉigon. Jen io, kio postulis emociajn dankojn.

Cervantes kredis, ke li elturnigos per klinigo.

Sed Blanco de Paz daŭrigis sian avantaĝon kun kruela mildeco.

- Vi estas la homo, kiu plej moligas mian koron. En vi, sinjoro, mi admiras kaj prilamentas la plej belan el la frakasitaj destinoj.

La poeto sulkgigis la brovojn kaj kunstreĉis la lipojn. - Kiel belege komencita vivo - daŭrigis la doktoro - , kaj kiel bela ĝi povis resti ĝis la fino, se la favoro de l'Sinjoro estus lasinta al vi la plenecon tiel de manoj, kiel de langoj.

La parolo estis dirita per tiel afable naiva voĉo, ke neeble estis rebati la insulton. Devigite akcepti la batalon kontraŭ naŭzega kontraŭulo kaj sur peniga areno, Cervantes sin skuis kiel leono en kaĝo.

Per bombasta nobla tono, kiu eble estus ridetiga en alia cirkonstanco, li respondis :

- Se la neeblaĵo estus al mi proponita, se estus al mi permesite retrovi miajn ambaŭ manojn, kondiĉe, ke mi ne estu partopreninta la plej noblan batalon, kiun konis kaj konos la historio, mi repuŝus tiun proponon. Mi dirus al la Sinjoro : "Prefere deprenu la manon, kiu al mi restas, kaj lasu al mi mian gloron de Lepanto."

- Al Dio sola, - severe rimarkigis Aliaga - apartenas la elekto pri tio, kio konvenas al ni. Lia filo mem diris senrezerve kaj senkondiĉe : "Fariĝu Via volo, ne mia".

La lipojn de l'poeto krispigis rideto kune maliceta kaj sintruda. Li diris, krucosignante :

- Benita estu la Sinjoro pro ĉio, kion Li donis al mi; benita estu la Sinjoro pro ĉio, kion Li reprenis de mi.

Sed Blanco de Paz :

- Li traktis vin malmilde, kiel Li traktas la fortajn. Li rezervis por vi la kronon de gloro por eterne, kaj li kronis vin en la tempo per la dormokrono.

- Evidu, fray, la komparojn insultajn al la diaĵo. Lasu

la dornokronon sur la sola frunto, kiu povas florigi ĝin.

- Neniun rekompencan vi ricevis en la mondo. Malgraŭ viaj heroaj faroj kaj meritoj, malgraŭ viaj longaj, ardaĵaj, multaj petadoj, vi restis dek jarojn simpla soldato.

- Lasu dormi miajn servojn kaj meritojn. Ĉi tie, klera doktoro, ne temas pri teologio, kaj mi ne multe ŝatas la laŭdojn de nekompetentuloj.

- Kun malpli da sprito, ol kiom donis al vi la Sinjoro, aliaj, en beletro, ricevas honorojn kaj riĉaĵojn. Vi restis malriĉa, post multaj verkoj, kvazaŭ neniu el viaj libroj iom valoras.

Cervantes estis tremanta, katenita homo, de malkuraĝulo insultata. La malkuraĝulo daŭrigis :

- Sed ja, kial, post relative bonŝancaj komencoj, vi restis dudek jarojn en silento kaj en la polvo de forgeso ? Ĉu via spirito spertis eklipson, aŭ via kuraĝo ?

- Monako ne estas juĝanto en la konfliktoj inter tio, kion oni devas al si mem, kaj kion oni ŝuldas al sia familio.

- Nun, jen vi estas maljuna, laca spirito, blanka barbo.

- Ne per la barbo oni skribas, fray, kaj ekzistas spiritoj, kiujn mallacigas kaj plijunigas la laboro mem.

- Kompatinda unumanulo...

- Restas al mi la mano, kiu skribas. Kaj, se monako povus min ofendi, mi aldonus : Restas al mi, fray, la mano, kiu tenas la spadon kaj punas la spitemulojn.

Aliaga intervenis :

- Oni parolas al vi fratece, kaj vi respondas bataleme.

- Do fratece mi respondos. Mi redonos kompaton pro kompatito. Mi bedaŭros, ke la doktoro, ankaŭ li, ne ĉiam estis traktita laŭ siaj meritoj.

- Mi meritas nur pentopunon kaj humiligon - ĝemis Blanco per la aĉa voĉo de ĉiuj tartufoj.

Kaj li pli fleksis la kurban arkon de sia fojna dorso.

- Iam, fray, vi ricevis malpli, ol vi meritis. Vi meritis, ja tre ekzakte, la tridek denarojn. Sed la deĵo konsentis al vi, kum la ridinda aldonado de buterpoto, unu nuran eskudon.

Blanco de Paz sufokiĝis, kolero, kiu ne kuraĝas esprimi, humiliĝo, kiu ne sentas al si la rajton sin rektigi. Li murmuris :

- Se mi ne estis sufiĉe punita, la korfavoro de l'Sinjoro kompletigu mian punon jam en ĉi tiu vivo !

Aliaga penis konduki la konversacion sur pli pacan vojon :

- Ĉu do, sinjoro Cervantes, vi malpermesas al tiuj, kiuj vi ĉi admiras, ke ili sentu kaj bedaŭru viajn malfeliĉojn ?
- Mi amas tiujn malfeliĉojn, kiuj min instruis.
- Tamen vi permesos, ke mi revu por vi pri destino pli facila kaj pli brila.
- La posteularo diros, ĉu la aŭtoro de Don Kihoto kaj de Persiles brilas aŭ ne brilas.
- La mano, kiu mankas al vi ...
- Neniam malhelpis min plenumi miajn devojn aŭ skribi miajn inventojn. Kiel gravas la korpo kaj ĝiaj kriplaĵoj, tiel longe, kiam ĝi estas subtenata de nevenkita animo ?
- Ĝia elturniĝo fine sukcesis igi la interparolon malpli malfacila kaj malpli personcela.
- La korpo havas ian gravecon en la nuntempo, frato. Mi legis ie - ĉu ne en verko de iu Eklezia Patro ? - ke, se Kleopatra estus havinta pli mallongan nazon, la destino de l'mondo estus aliigita. (1)
- Vi permesu, ke tion mi neniel kredu. La supla, subtila Kleopatra, mi imagas, estus kapablinta uzi la nazon, kiun ŝi havas. Ne en perfekta beleco kuŝas la ĉarmo, ja ne pli ol la kuraĝo en sano aŭ en fizika forto.
- Tamen, la nazo de Kleopatra...
- Malpli interesa ol ŝia rideto, ol ŝia rigardo, ol la promesoj pri volupto faritaj de ŝia fizionomio kaj tenitaj de ŝia korpo. Prefere memoru vi pri la Kleopatra de nia tempo.
- Pri kiu vi intencas diri ?
- Lerta virino genuigis ĉe siaj piedoj, kune, la plej potentan el la reĝoj, la princon de Eboli, suverenan majstron en la kortega arto, kaj Antonien Perez, la plej elokventan genion de sia tempo.
- Ĉu ŝi ne estis bela ?
- Ŝi estis bela per la forto de l'sprito. Sed, malgraŭ ĉarmaj partoj, ŝia vizaĝo havis difekton pli gravan ol nazo iomete tro longa aŭ mallonga.

(1) Fakte tiu maksimumo pri la nazo de Kleopatra troviĝas en la "Pensoj" de Blazio Paskalo, naskita dek jarojn post tiu interparolo. Kompreneble, la aŭtoro bone sciis tion, sed iafaje li amuziĝis per tiaj anakronismoj. (Noto de la tradukinto).

- Mi kredas ja rememori, ke la princino de Eboli estis unuokula.

- Eble la posteularo ne scios pri tiu detalo, kaj, juĝante laŭ la grandeco de la efikoj pri la potenco de la kaŭzo, ĝi atribuos al ŝi belecon perfektan.

- Eble, sed mi persistas kredi, ke la nazo de Kleopatra...

- La nazo de Kleopatra, pri tio ne dubu, estis tro mallonga. Por sukcesi en la grado, en kiu ŝi sukcesis, necesas havi almenaŭ unu mankon por valorigi.

Kaj Cervantes eksplodis per bonhumora rido.

Ankaŭ Aliaga, amuzite, ridis.

La poeto konkludis :

- Eble, post kelkaj jarcentoj, oni legos, en iu stulte profunda verkisto : "Se la princino de Eboli estus estinta unuokula, la aspekto de la okazoj aliĝus, kaj ni ankoraŭ vidus justecon en Aragono."

Ambaŭ aragonaj monakoj havis saman skandalitan geston, kaj Aliaga ekkriis :

- Vi traktas ja tre malrespekte nian sinjoron Filipon IIan.

- Post la morto, nur Jesuo restas Nia Sinjoro. Reĝo, tuj kiam li estas enterigita, apartenas per sia korpo al pu-trado, per sia animo al la juĝo de incitita Dio, per sia memoro al la senkompata historio. Tiu Filipino IIa, kiu, malpli honesta ol rabistara ĉefo, perfidis sian kompli-con...

- Ĉu vi estus aŭdacinta tiel paroli dum lia vivo ?

- Ne antaŭ certaj roboj, fray. Ĉar mi jam renkontis lup-ojn inter la hundoj de l'Sinjoro.

"Hundoj de l'Sinjoroj" estis la populara nomo de la dominikanoj. Ĝi estis neniel insulta. Ĝin kreis kaj dis-vastigis la monakoj mem. Ili amis, per latina vortludo, sin nomi domini canes anstataŭ dominicani.

- La cervido - diris Aliaga, siavice ludanta pri la nomo de Cervantes -, la cervido ne ĉiam fuĝas. Ifoje li provas kontraŭfronti la sanktan ĉashundaron, kaj li frapas per siaj kornoj. Lia tromaltimo povus multe kos-ti al li.

Sekvate de Blanco de Paz, maldika kaj kurba kiel paf-arko, la konfesanto de l'reĝo, peza kiel arma martelego, ektrotigis sian mulon.

Cervantes, kun necerta rideto, rigardis ilin foriĝi.

La maniero, laŭ kiu oni ĵus tradukis lian nomon, elvokis al li la du belajn orajn cervojn de lia blazono. Li vidis unu, kun mallevita kapo, kiu ŝajnas sin paŝti el la sinoplo; sed la alia, kun levitaj oreloj, ĉu li ne aŭskultas proksimigantan dangeron?...

Ĉapitro Kvara.

La spirito de Cervantes estis kreita por ĉiuj kuraĝaj ĝojoj. La neutilajn zorgojn li forĵetis per abrupta movo, finiĝanta per rido kaj poezio. La bildo de lia blazono restis kelkan tempon en la penso de l'poeto, sed baldaŭ ĝia simboleco gajiĝis.

- Ĉu vere, atenta cervo, ci aŭskultas proksimiĝantan danĝeron, aŭ ĉu ne pli vere la kanton de iu birdo ? En ĉi tiu malplaĉa tempo, en kiu la homoj ne aŭdacas paroli, aŭskultu, cervido, kiel la merla fajfado faras el la tuta lumo tremetantan ironion. En ĉi tiu malplaĉa tempo, en kiu la gitaro de ĉiuj Lope de Vega mezbelacĉe grincas, aŭskultu, kiel la himno de la najtingalo plenigas per muziko kaj amo la necertan urnon de la nokto.

Li komencis prifajfi, en la soleco, la senpovan malicon de la monakoj. Nu, lia fajfado akompanis jenajn pensojn :

- Mi kuraĝas diri ĉion, kion mi povas diri. Se mi ne atingus la limojn de la eblo, mi ruĝiĝus pro tro da honto. Sed neniam mi forgesas, ke mi havas virinojn por nutri kaj ŝirmi. Mi ridas pri la dornoj de la Aliaga (1), sed mi evitas la ŝtiparon, post kies brulo oni persekutus tiujn, kiujn mi amas. Eble la posteularo tradukos per klaraj paroloj mian konfuzan fajfadon, kaj ĝi eltrovos saĝon el la ŝajna malsaĝo de iuj el miaj gajaĵoj. Ĝi ridos per la sama rido, levante la singardan robon de sankta Francisko, per kiu mi mortanta kovros mian korpon, levante la singardajn vualojn de miaj simboloj.

Poste, ĉesante fajfi, ĉar lia meditado pli internen profundigis :

- Ho multobla beleco de simbolo ! Ĉiu, laŭ sia forto, levas unu vualon aŭ levas plurajn vualojn. La infano - hodiaŭ, kiu ne estas infano ? - ne suspektas, ke estas io flanken levenda, kaj ĝi amuziĝas per la bildornamaĵo de la supraĵa vesto. Por la infanoj mia Don Kihoto entenas

(1) Aliaga, hispana nomo de ulekso.

multe da naiva rido. Kiam la infano fariĝos plenkreskulo, lia rido kreskos kun li. Lia rido eksplodos, drasta kiel pensoŝtormo. Kiam da pesthaladzoj tiam forbalaos la uragano de l'pensanta rido, kaj kiel malpezaj vi estos kontraŭ ĝi, inkviziciaj monakoj, malgrandaj granduloj de la tero, malalteco de la reĝoj, mensogoj de la pontifikoj...

Kaj antaŭ liaj okuloj repasis la bildo de lia blazono: - Kion vi aŭskultas, atenta, gvatanta cervo, tio estas, en la fajfo de l'nerlo, la disfalo de la estinteco.

Sed li malheliĝis, kvazaŭ ligite kaj paralizite de plej angorigaj demandoj :

- Ĉu la estonteco estos pli bona ol la estanteco ? Ĉu iam malpligrandiĝos la homa malsaĝo ? Ke ĝiaj formoj estas ŝanĝiĝontaj, jen kio ŝajnas certa. Mi scias pri la malsanoj, pro kiuj mi suferas, kaj ke la tempo ilin kuracos. Mi ne scias, kiujn malsanojn ĝi kompanse alportos... Antonio Perez antaŭvidis epokon, en kiu Dio, lacigite de la monarkioj, de ilia orgojlo kaj de iliaj krimoj, faligos ilin por doni al la mondo alian figuron: Ĉu la popoloj pli valoros ol la reĝoj ?... La katolikismo amasigis tro da fiagoj, por ke ĝi ne iam krevu, premegite sub la fia pezego. Kiu entuziasmo anstataŭos ĝin, kaj kiujn krimojn kulpos la nova fanatikismo ? Nenombreblaj murdoj estis faritaj en la nomo de Jesuo la korkompata. Do, eĉ plej fratecaj ideoj armas brakojn kaj inundas la teron per sango.

Li ekskuis siajn zorgojn.

- Kun niaj fervoraj pensoj miksu ni multe da rideto kaj muziko. Vi, rideto kaj muziko, estas la delikataj zefiroj, kiuj sanigas la pensojn; vi malhelpas ilin fariĝi ebrioj kaj murdodeziroj.

Tute droninta en la revo pri estonteco, kiun li ne vidis, li ricevis eksalton kaj abruptan vekon. De la rando de l'vojo sin levis maljuna virino.

- Ĉu vi volas, sinjoro, ke mi diru al vi la bonan aventuron (1) kaj la estontecon ?

Li faris la geston, kiu flankenpuŝas la tedantojn.

- Turnu vin al junuloj, por kiuj ekzistas estonteco; kaj kiuj povas renkonti bonajn aventurojn.

Li ridante montris sian kriplan maldekstran brakon.

(1) diri la bonan aventuron : antaŭdiri la sorton.

- Turnu vin al tiuj, kiuj ankoraŭ havas la manon, el kiu oni legas la estontecon.
- La estonteco legiĝas el ambaŭ manoj kaj sciĝas el aliaj signoj.

Li frapis sur sian teknon plenan je paperaĵoj :

- Turnu vin al tiuj, kiuj posedas la arĝentan moneron, per kiu vi krucosignas antaŭ ol legi la estontecon.

La maljunulino sulkgis la brovojn. Kaj, cidirante al la malriĉulo aŭ la avarulo :

- Ĉu ci estas ja tiel senhava ? Aŭ ĉu ci estus la unua dubanto pri la scienco de Preciosa ?

Li ripetis en mira ekkrio :

- Preciosa ?

Kaj li rigardis la ciganinon.

La vestoj estis de zorgega pureco. La figuro restis rekta kiel ŝpinilo el Guadarrama, la korpo svelta kaj supla kiel Tizona aŭ Colada. La regulaj trajtoj ŝajnis de la faltoj nobligitaj pli ol misformitaj. La rideto montris ĉiujn dentojn, blankajn kaj bonordajn. La tuto formis la plej agrablegan el la maljunulinoj.

- Preciosa, - diris Cervantes, - mi dezirus esti pentristo; mi petus, ke vi pozu por iu Sankta Anna.

Kondukite duone per tio, kion li vidas, duone per rememoro necerte leviĝanta al vekigo, la nomo de la sanktulino vokis kaj kunligis aliajn rememorojn.

- En unu festo de Sankta Anna mi vidis vin unufoje. Kia mirinda dancistino vi estis en la favorjaro 1567, kaj kiel diece vi kantis la kanzonojn, kiujn mi verkis por vi !

Kun la sama avido, en kiu Cervantes ĵus rigardis al Preciosa, Preciosa rigardis al Cervantes. La vivo de civilizulo estas ja pli laciga ol tiu de ciganino, kaj Cervantes estis pli aliĝinta ol Preciosa. Ja certe, ankaŭ li restis bela. Sed lia belo, heroa ruino, estis tiu, kiu igas la virojn pensi, ne plu la virinojn revii. Tamen ŝi rekonis lin kaj ekkriis :

- Kia ĝojo, kaj kia funebro, retrovi, post kvardek ses jaroj, mian Andres Caballeron...

Sed, skuante la kapon en mikso je rido kaj malgajo, ŝi regustigis :

- Pardonu, sinjoro Cervantes. Andres Caballero estas mortinta, kaj ni jam ne estas en aĝo, en kiu ni povus lin revivigi.

Malgraŭ tiuj melankoliaj vortoj, li reviviĝis en ŝi, la ĉarma junulo, al kiu, laŭ la atesto de Vargas Manrique, "Kupido kaj Venus malavare donacis" - kiel Preciosa kaj multaj aliaj virinoj - "tutajn siajn amojn".

Tiel bone reviviĝis li, tiel nuna reĝis la fora epoko, ke per voĉo malforta kaj tremanta, sed restinta pura, Preciosa ekkantis jenajn versojn por ŝi verkitajn de Andres Caballero :

Ciganineto, kiel bela
Oni povas laŭdi vin.
Pro via similo al gemo
La mondo vin nomas Preciosa (1)

Li kantis du aliajn strofojn el la sama kanzono :

Vi diras bonan aventuron
Kaj vi kaŭzas malbonan.
Malsamajn vojojn sekvas
Via intenco kaj via belo,

Ĉar, metante en grandan dangeron
Tiun, kiu vin rigardas admire,
Via intenco vin faras senkulpa,
Via beleco vin faras murdanta.

- Ĉio tio, - ŝi diris - kiel malproksima ! Mia beleco havigis al mi kelkajn semajnojn da ĝojo, duonjarcenton da larmoj. Nun ĝi estas mortinta, sed eble ne mia koro.

Li ŝin brakumis. Li volis meti kison sur ŝiajn velkintajn vangojn. La lipoj de Preciosa serĉis la lipojn de Andres. Li obeis la deziron de la eksamatino. Sed la kiso ne longedaŭris.

El ĝi ŝi eliĝis pli ridetanta, kaj ŝi demandis :

- Kio fariĝis el tio, kion vi nomis la sorĉoj de miaj okuloj ?

Koketo de maljuna virino, kies rigardo estas juna.

Li respondis nur kantante :

Per ilia forto vi antaŭeniras.
Ni vin admiras, kiam vi dancas;
Ni mortas, se ni vin rigardas;
Sed vi sorĉas min, se vi kantas.

Ŝi daŭrigis :

En cent mil manieroj vi sorĉas,
Ĉu vi parolas aŭ silentas,
Ĉu vi kantas aŭ rigardas.

(1) Preciosa : altvalora.

Sed, skuante la kapon :

- Estis tro vere pri vi, tro malmulte pri mi. Por reteni Andres'on, mi aktivigis la cent mil sorĉojn, kiujn vi laŭdis. Tamen vi fuĝis for de mi, kaj vi forgesis min.

- Forgesis, neniam!

- Kaj li kantetis :

Via ĉeesto kaj via foresto

Ambaŭ ardigas la amfajron.

Iumomente ili ruĝiĝis, kredante senti en la emocia scano oni-ne-scias kian etan ridindecon. Sed ilia teneriĝo superis aŭ repuŝis tion, kio estis al ĝi kontraŭstara. Denove ili interkisis. La kiso, ĉi-foje, restis frateca, kio permesis al la brakumo plilonge daŭri, kaj al la larmoj, la dolĉegaj larmoj, dronigi la rideton.

Ŝi diris :

- Kelkajn horojn vi min obeos. Mi volas, ke hodiaŭ vi refariĝu Andres kaj dividu mian tagmanĝon.

- Mia koro kaj mia stomako akceptas.

Kaj, kantante per malseka voĉo :

Super koro plej libera

Vi havas potencon kaj sinjorecon,

Pri tio atestas la mia,

Feliĉa sub via suvereneco.

Ŝi kuntrenis lin al la ranĉo. Tie ŝi estis la sola restanto el malnova epoko. Sed estis neniu, kiu ne sciis pri ŝia historio. La junaj gitanas (1) rigardis kun simpatia scivolemo, kiam ŝi anoncis :

- Mi retrovis Andres Caballero'n.

- Ĉu vi ree lasos forflugi la malfidelan birdon? - demandis maliceta dekkvinjara knabino.

- Eble vi retenus lin unu monaton, kiel mi, kiam mi havis vian nunan aĝon. Sed mi faris lin kaptito nur por kelkaj horoj.

Inter la vojo kaj popla arbareto, meze de lito el erikoj konservantaj kelkajn ruĝajn florojn, la ŝarĝobestoj dormis, ankaŭ la ĉaretoj. Sub la verda kaj ora tremeto de la arboj, la ciganoj, sidantaj aŭ kuŝantaj, atendis la baldaŭan manĝotempon. Multaj interparolis aŭ kantis. Aliaj pigreme revis. Kelkaj plektis salikbrancetojn. Pendantaj de la pli malaltaj branĉoj, felsakoj malvarmetiĝis en la tremado de l'folioj.

(1) gitanas : ciganinoj.

Je mallonga distanco de la popoloj, sur loko, kie la griza roko krevigis la teron, tri palisoj triangule kunmetitaj formis plej primitivan fajrejan pendigilon. De ĝi pendis grandega marmito, el kiu eliĝis bonodora vaporo. La granda fajro kraketanta disjetis en ĉiujn direktojn, inter fumospiraloj, longajn langojn el lekema flamo.

- Mi konfidas al vi Andres Caballero'n - diris Preciosa al la knabinaro - Se vi forprenos lin de mi, des pli malbone por vi.

Dum momento ŝi malaperis. Revenante ŝi portis bukedeton da eriko. Ĝin prezentante ŝi diris :

- Mia koro memoras. Vi naskiĝis en sama tago, Andres.

Li prenis la kampajn florojn, per ili frotetis la lipojn de Preciosa, poste la siajn. La sezono estis jam tro malfrua, kaj, kiam li metis ilin ĉe sian koron, falis iliaj malfortikaj koroloj.

Ĉe tiu vido, la maljuna virino skuis malgajigitan kapon. Sed Cervantes metis novan kison sur la delikatajn branĉetojn. Kaj li diris :

- En vi, aŭtunaj foliaroj, mi vidas florojn ne malpli kolorriĉajn kaj pli daŭremajn.

La kuiristino gaje vokis :

- Al la supo, malbona trupo !

Oni verŝis en grandajn tertelerojn la enhavon de la marmito, kaj la tuta pejzaĝo ŝajnis parfumita kaj apetitiva.

La teleroj estis metitaj sur la grundon. Apud ili la tero kovriĝis de pano, de juglandoj, de olivoj, de fromaĝoj kaj de du jam ekstranĉitaj ŝinkoj; ĉiu, eksidante aŭ sternigante ĉirkaŭ la manĝaĵoj, eltiris sian tranĉilon. Cervantes akceptis la lokon, al li signitan de Preciosa, kaj murmuris la proverbon :

- Kiam vi estos en Romo, faru tion, kion vi vidas fari.

De longe li ne manĝis kaj trinkis kun tiom da plezuro. Ĉiuj kunmanĝantoj ridis kaj ŝercis; neniu vidigis tiom da gajeco, kiom la maljuna poeto. Kiam la apetito estis satigita, la dentoj fine malzorgeme mordetadis. Tiam, ekscitite de ĉies koreco, Cervantes sin allasis al sia vervo, kaj, kiel don Kihoto ĉe la tagmanĝo kun la kapristoj, eldiris kvazaŭ paroladon.

- Ciganoj, kial mia malprudenta junaĝo forlasis vian vivon ? Vere, mi diras al vi, ciganoj, ciganoj, estas ja vi,

kiuj elektis la bonan loton. Vi estas la sinjoroj de kampoj kaj herbejoj, de arbaroj kaj erikejoj, de montoj kaj valoj, de fontoj kaj riveroj. La arboj donas al vi, vivante, siajn fruktojn kaj sian ombron; mortinte, la lignon, kiu varmigas vin kaj kuiras viajn viandojn. Al vi la vitoj oferas siajn traŭbojn, la ĝardenoj siajn legomojn, la fontoj siajn akvojn, la riveretoj siajn fiŝojn, la parkoj siajn ĉasbestojn, la kavernoj siajn ŝirmejojn. Por vi la ĉielaj krudbatoj estas nuraj zefiroj, la neĝoj nuraj refreŝigaĵoj, la pluvoj nur ĝojaj duŝoj. Vi aŭskultas la tondron kiel muzikon, kaj vi rigardas la fulmojn kiel festotorĉojn. Kiu tero estus al vi tiel kruda, ke ĝi ne ŝajnus al vi pluma matraco? Viaj harditaj haŭtoj ŝirmas vin kiel nepenetreblaj armaĵoj. Via malpezeco sin lasas haltigi nek per ferbariloj nek per kradaĵoj; antaŭ ĝi malaltigas la muroj, kaj ĉia limo estas al ĝi ridinda obstaklo. Vi ricevas tion, kion vi deziras, ĉar vi scias kontentiĝi per tio, kion vi havas. Vi vivtenas vin per via industrio, kaj vi malŝatas la proverbon, kiu klarigas la riĉecon de kelkaj unuopuloj kaj la ruinigon de Hispanio: "La Eklezio, la maro aŭ la servado al reĝo". Ciganoj, ciganoj, tiel longe, kiam ekzistos unu el viaj aduar'oj (1), estos en la mondo moviĝanta bildo pri la ora tempo. Vi scias, ke ĉiuj terbienoj estas komunaj, kaj vi ne atendas, ke oni donu al vi vian parton. Vi ne spertas la torturantan ambicion, la malnoblon, kiu dezirus mordi kaj karesas, la disŝirantan envion. Tial ke vi restas fidelaj al patrino-naturo, vi estas kleraj pri la vera scienco, ne pri la ridindaj mensogoj de Alcala aŭ Salamanca (2). Vi scias la honon laŭ la klinsituo de l'suno aŭ la desegno formata per la stelara brodaĵo. Ja por vi la matenkrepusko blankigas orienton, kaj la aŭroro disŝprucigas sian vastegan rozbukedon. Estas vi, kiuj plejbone ĝuas la sezonojn kaj ilian belegan diverscon. Vi estas, ho novaj kristanoj, la solaj honestuloj, en kies ĉeesto oni povas sentime paroli. Via libero konsente elportas najbaran liberon. Inter vi ne estas familiarulo de la Sankta Ofico (3) nek bona katoliko amanta sian proksimumon ĝis tia grado, ke li bruligas lin. Kiam vin persekutas tiuj, kiuj ŝtelis de vi la teron kaj la parolrajton, via

(1) aduaro = duaro. Nekonstanta tendaro de nomadoj (PIV).

(2) Alkalo, Salamanko : universitataj urboj.

(3) Sankta Ofico : Inkvizicio.

kuraĝo ne lasas sin faligi per la ŝnuroj premantaj kaj tordantaj viajn membrojn, nek per ĉiaj torturiloj. Inter jes kaj ne vi faras nenium diferencon krom tiu, kiun necesigas via savo aŭ la savo al viaj fratoj. Vi kapablas esti martiroj, ne konfesantoj, vi noblaj ciganoj, kiuj kantas en karceroj kaj silentas en torturo.

- Se vi volas resti kun ni - diris maljunulo - , vi estas bonvena.

Sed Cervantes ekskuis la kapon. Kaj Preciosa, en rido sen amareco :

- La poetoj estas naskitaj por laŭdi tion, kio estas bona, ne por ĝin fari.

- Tial, maliceta amikino, ke ne estus tre modeste, min mem laŭdi. Mi ĉiam respekteme aŭskultas tiun, kiun mi ne povas akuzi, ke li parolas por sia propra gloro : episkopo predikanta malriĉecon, pastro laŭdanta almozon, kapuceno admonanta al ĉasteco.

Malgraŭ la ĝojaj interparoloj, la rondo fariĝis malpli kaj malpli densa. Unu post alia, ĉiuj foriris al siaj okupoj aŭ plezuroj. Fine, ambaŭ eksamantoj troviĝis solaj.

- Ĉu vi iris malproksimen, Andres, kiam mi interrompis vian marŝadon ?

- Nur al Esquivias.

- Nur !.. Plezure mi vidas, ke Cervantes konservis la krurojn de Caballero.

- Sed al mi restas nur unu el liaj manoj.

- La aŭtuna suno frue subiĝas, kaj Esquivias estas malproksima. Vi alvenos nur en la nokto.

- La nokto estas amiko de la marŝo.

- Ĉu al vi tiel urĝas min lasi ? Restu, mi vin petas, ĝis morgaŭ matene.

La poeto ŝajne hezitis.

- La petoj de maljuna virino havas nenian povon al via koro.

- Al maljunaj virinoj nenion mi kapablas rifuzi. Sed vi restis tiel juna, mia Preciosa...

- Ja per tio, kio en vi pleje maljuniĝis, per la koro.

- Vi parolas maljuste. Do estas juste, ke mi konsentu pri via peto.

- Dankon, Andres. Tiuj kelkaj horoj estos al mi tia festo! Unu monato kun vi parfumis mian tutan vivon. La rememoro pri hodiaŭ ĝojigos la kelkajn jarojn, kiuj por mi restas.

- Ankaŭ mi, Preciosa, kolektas la plej belan kaj la plej daŭrantan bukedon da rememoroj.

- Ĉu vere vi iafaje pensas pri mi ?

- Tiel ofte, amikino, kaj tiel intense, ke mi sentis min kvazaŭ trudita priskribi nian historion.

Si faris malkontentan paŭton.

- Vi memoras kiel verkisto, ne kiel viro.

- Malgraŭ la ŝerco, per kiu mi respondis al vi, kiam vi akuzis la sincerecon de l'poetoj, ofte la verkisto estas en mi nur verkanta viro : en miajn librojn mi metas tutan mian koron.

- Tiel, ke al vi jam restas neniom da ĝi por la vivo.

- Kruela ! Ĉu vi ne metas vian koron en viajn parolojn ? Kaj tamen, ĉu mi vin akuzas ...?

- Tiel malsamaj estas vira kaj virina koroj.

- Mi donos al vi por legi novelon, en kiu via ĉarmo vivas tiom, kiom mi povis ĝin vivi. Dank'al la temo, La Gitanilla estas, laŭ mia opinio, tion plej bonan, kion mi faris.

- Vero de cirkonstanco !...

- Mi diras, kion mi pensas... vi vidos...

- Vidi mi ne volas.

- Vi diras ?

- Mi diras, ke mi ne volas legi.

- Kial ?

- Ĉu vi kredas, ke mi bezonas propravole disŝiri mian kompatindan koron ?

- Ekzistas ĝojaj vundoj.

- Tro malbone finiĝis nia aventuro.

Kaj, skuante la kapon :

- Mi estas certa, ke sinjoro Cervantes ne ekzakte rakontis la forfuĝon kaj la sendankecon de sinjoro Caballero. Mi estas certa, ke vi modifis ĉiujn okazojn de la fino.

- Tio estis necesa por la plezuro de la legonto.

- Do verkisto estas malpli kruela al la legonto ol amanto al sia amantino.

Cervantes silentis, ne sen ia embaraso. Sed ŝi :

- Mi estas maljusta, Andres ne povis fari ion, krom kion li faris. Hidalgo, se li estas poeto, vivos kelkan tempon kun ciganoj, sed lin venke turmentos la bedaŭro pri alia ekzistado. Iu kanzono diras pri viro, kiu amis marvirinon, sed la sopiro al tero mortigis lian amon. Vi ne povis

resti, kie mi estas, nek fortiri min el la medio necesa al mia vivo.

Ŝi resignacie levis la ŝultrojn. Poste, kun moka rideto :

- Mi vetas, ke en la fabelo, Andres edzinigas Preciosan.

- Tio estas preskaŭ la sola maniero fini amrakonton.

- Kaj ĉu li restas en la duaro ?

- Ne.

- Mi divenas. Tuj kiam ili flankeniĝas de la vivo, viaj inventoj inter si similas kaj ripetiĝas. La Preciosa de l'fabelo, ĉu ne ? estas falsa ciganino. Rekonita de siaj gepatroj, kompreneble tre riĉaj, de kiuj ŝi estis ŝtelita en sia infanaĝo...

- Vi ja ĝuste divenis, ho plej subtila el la virinoj.

- Ĉu nun vi komprenas, kial mi rifuzas legi historion, kiu diras kaj misformas la mian ? Tro kruela, la vero; tro banala, la mensogo, per kiu oni ĝin anstataŭigas.

Ĉapitro Kvina.

Unu horon antaŭ la sunleviĝo, Cervantes denove vojiris al Esquivias. En la fortiga matena malvarmeto, la poeto portis pezon de ĝojo kaj melankolio.

Inter ĉiuj amoj de lia vivo, Preciosa okupis la lokon plej emocian. Neniam ŝi aperis en li alimaniere ol iluminate de sunlumo, de strangeco kaj romanesko. Kvardek ses jaroj nek velkigis la memoron nek estingis la aŭreolon. Gravega provo, li retrovis maljuna virino tiun, kiun infana li konis. Antaŭ baldaŭ duonjarcento, iliaj ĝemelaj blindepalpaj provetoj inicis ilin ambaŭkune al plej naivaj voluptoj. Nun, kvankam ili scias la renkonton senestonteca, ĉu ilia maljunaĝo ne retrovis la iaman fervoron? Kun kia emocio ili trovis unu en la alia la tutan tremantan belon de sia aĝo! Kun kia emocio ili trovis unu en la alia, inter la ĉiam freŝaj graciaĵoj de la sprito, la elvolvitajn superbelajojn de la inteligento kaj la tremtantajn profundajojn de la koro!

Tiu, li tion sentis, estis lia vera edzino, la sola al kiu, se viro povus esti fidela dum tuta vivado, li estus ĝoje dediĉinta tutan sian fidelecon. Fronte al la parfuma lumo de tiu animo malaperis ĉiuj amantinoj kolektitaj en Italio, en Flandrio, en Alĝero, en Portugalio aŭ en Hispanio, ĉiuj povraj knabinoj kaj ĉiuj ĉefaj sinjorinoj iam ridetintaj al la longedaŭra juneco de Cervantes.

Kaj la vivo de libero, kiun li estus vivinta apud ŝi, tiu vivo, kiun en La Gitanilla li laŭdis kun maliceta elokvento por nerekte satirumi la hispanan ekzistadon; tiu vivo, kiun hieraŭ, spite la ridetojn de la supera Sanĉo, kiu estas en li, li laŭdis kun la konvinkiteco de iu don Kiĥoto, ĉu ĝi ne estus la feliĉo?

La paŝtako de la vojaĝanto plipeziĝis pro la malrapidiga ŝarĝo de bedaŭro.

Li ekskuis la neutilan pezon.

- Don Kiĥoto - li diris al si mem -, akceptu la faktojn tiajn, kiaj ili estas en la horo, ĝis kiu vi alvenis. Ĉia bedaŭro estas malsaĝa: ĉu la hieraŭa eblo ne fariĝis tiel neebla, kvazaŭ la hieraŭa tago neniam estis? Don Kiĥoto, gardu vin. Se la feliĉo estus nur miraĝo kiel la gloro kaj

la sorĉe ravaj aventuroj...

Li suspiris :

- La feliĉo, ha! la feliĉo...

Kaj li diris duonvoĉe :

- Kiam mi estis infano, mi marŝis kuraĝe al arbo, kiu, vestita de nokto kaj distanco, aspektis al mi giganto aŭ magiisto. Tiel, feliĉo, mi marŝas al vi. Ne kun, antaŭen tenata, la memfida lanco de konkeranto, sed kun akraj okuloj kaj kun mano palpe scivola. Feliĉo, vi malkaŝos al mi, kio vi estas : ĉu pompa armeo aŭ ŝafaro, ĉu giganto kun senmezuraj brakoj aŭ ventmuelilo, kies aloj turniĝas kiel moka promeso aŭ senglora danĝero.

Sur liaj lipoj flirtis necerta rideto, kaj la lumo de liaj okuloj estis hezita.

Sed baldaŭ, frapante la teron per vigla bastono :

- Feliĉo, vi konsistas ne el ricevo, sed el dono. Vi ne estas la naiveco de infano sur la genuoj de la patro; vi estas la profunda kaj elversanta koro de la patro portanta la infanon.

"Vi estas, feliĉo, estanteco sin forgesanta kaj ŝanceliĝanta, ebria je estonteco. Jes, vi estas estonteca ebrio, eĉ en tiuj, kiuj ŝajne jam ne havas estontecon.

"Persona per la maniero, en kiu vi estas sentata, vi havas vian fonton en mi; sed ĉu vi ne estas ĝuste deklivo, eksteran puŝanta el mi la riĉaĵojn de la fonto ?

"Feliĉo, vi estas mia Isabel, tiel longe, kiam restas al mi unu ŝanco savi ŝin de la monaĥinejo. Vi estas ankaŭ aliaj aferoj, se mi ankoraŭ havas aliajn esperajn malavaraĵojn. Vi estas la libro, kiun mi fermas al la nuntempuloj per fermilo el rido aŭ poezio, el oro aŭ mokrida lumo; sed eble la posteularo scipovos malŝlosi la ŝanĝbrilan fermilon.

"Feliĉo, vi estas la martiro, kiu volas lumigi kaj mildigi la homojn, kaj forgesas, ke li riskas krei vengontojn kaj torturistojn. Vi estas Jesuo portanta al kalvario la lignon por la estonta incendio. Li esperas, ke li ekbruligos la fratan amon en la koro de ĉiuj filoj de la Patro, kaj li nescias, ke li ekbruligos, tra la tempoj kaj spacoj, la malamojn kaj la aŭtodaŭtojn.

"Feliĉo, rideto de ludanto, kiu faras el si mem loton por provi, ke la estonteco gajnu, kian kuraĝon vi supozas, kaj kian riskemon...

Li nerve ekridis :

- Jen ĉio, kio vi estas, ĉio, kio vi povas esti por mi. Espero pri estonta elŝpruco en plena lumo por la mizera kaŝitaĵo, kiu mi estas, parolo sufokita kaj subtera en jarcento de silento. Kriplulo freneza pri aktiveco, don Kihoto ĉiam staranta ĉe l'rando de abismo, apenaŭ retenata per la konscio pri eblo, kie vi serĉus feliĉon krom en estonteco sufiĉe malproksima, por ke vi nesciu pri ĝiaj malkonfirmoj ? Sed mi divenas alian, pli grandan kaj belegan feliĉon, la veran, la solan feliĉon. En la firmeco de la nuna tempo, tiu etendas sian larĝan bazon, starigas sian supron orgojlan kaj trankvilan.

"Kalvario, vi ne estas la plej nobla supro. En ĉielo pli alte blua sin levas la monto de l'stoikismo; ĝi superas ĉiujn fulmotondrojn kaj ruĝigas de neniu incendio. Superega feliĉo, vin oni realigas rezignante eĉ pri la estonteco, ridante pri la revo, disfalanta espero, samkiel pri la ekstera realo, ŝlimo kaj enmarĉiĝo. Vi estas la harmonio de animo perfekta kaj sfere volvita ĉirkaŭ si mem. Vi estas la nepridirebla belo de Sokrato la platanazulo, la mirinde bela irmaniero de Epikteto la lamulo. Sed, ĉu iam vin konis iu hispano ?

"O vita beata*", kiun kantis la kordobano Seneko kun jam tute kastilia elokventeco, kiun la kordobano Seneko ne kapablis realigi...

Kiam Cervantes parolis al si duonvoĉe en la libero de soleca kamparo, lia aktiva penso levis kaj urĝis lian paŝadon. Kune, ĝi igis lin forgesi pri la tempo. Abruapta ekmiro forpelis de lia spirito la kordobanon Senekon kaj ties belegan elokventon, kaj ties nesufiĉan saĝon. Rideto ekfloris sur la lipoj de l'poeto.

- Jam Esquivias !...

Je cento da paŝoj la vilaĝo aperigis sian kvietan kuŝejon. Antaŭ la unua domo, kiu, kiel ofte okazas, estis gastejo, pluraj viroj, laŭlonge de tablo, en la ombro de ulmo, okupis benkon el ŝtono. Unu el ili, sin levante, direktis al la vojaĝanto scivolajn okulojn. Li rekonis Cervantes'on, kiu rekonis majstron Tomaso'n Avladoro'n, la barbiron. Ambaŭ dekstraj manoj samtempe faris reciprokajn amikan signon.

* Ho feliĉega vivo

Majstro Tomas ne residigis sin. Kiam la poeto proksimiĝis ne pli ol dudek paŝojn, la aliaj sin levis kun mieno pli akcepta ol respekta. Familiara rideto lumigis ĉies vizaĝon. La gastejmastro, puŝante perkubute la barbiron :
 - Don Tomas de l'Razilo, oratoro de nia trupo, voku sinjoron Cervantes en ĉies nomo.

La gaja tavernestro parolis sufiĉe laŭte por igi neutila la intervenon de majstro Tomas. Ĉi tiu diris :
 - Sinjor' Cervantes, vi aŭdis, elokventan kaj sonorant kiel trumpeto, la konfidencon de tiu, kiun Esquivias plej eminente nomas la Gastiganto. Obeu al la voko de niaj koroj, al la voko de lia voĉo.

- Ankaŭ al la voko de mia koro - respondis Cervantes. Eĉ antaŭ ol mi edziĝis al Esquivias en la persono de mia kara Catalina, vi scias, kiel Esquivias jam estis de mi amata.

Li premis la etenditajn manojn. Kaj la Gastiganto pravigis la deklaron de l'poeto :

- Ĉar, tie ĉi, homoj kaj vinoj, ĉio estas sincera.
 - Ĉio, tie ĉi, varmigas la koron.

Cervantes volis preni, sur la ekstremaĵo de l'benko, lokon, kiu troviĝis libera. Kun gentilaĵoj, kies postulemo fine fariĝis preskaŭ taŭza, oni trudis lin sidiĝi en la mezo. La glasoj, plenaj je ruĝa ĝojo, intertintis en brinde (tosto). La poeto diris :

- Al Esquivias, gloro de Hispanio !
 - Al Sinjoro Cervantes, gloro de Esquivias ! - respondis la gastejestro.

Kaj la barbiro :

- Al la granda Cervantes, senmorta honoro de l'beletro Kastilia !

Kaj la maljuna soldato Rafael de la Rapita :

- Al la heroo de Lepanto, al la noblega brakstumpulo, kiu perdis la maldekstran manon pro la honoro de la dekstra !

Kaj malgranda viro kun vizaĝo falta kaj ruĝa kiel pomo en vintrofino :

- Al Sinjoro Cervantes, princo de l'rido kaj de l'bonaj fabeloj !

Kaj altstatura fortikulo, seka kaj gravmiena kiel predikanto pri la Pasio :

- Al Sinjoro Cervantes, princo de la penso kaj poezio !

Cervantes denove levis sian glason :

- Al vi ĉiuj, princoj de ĝentileco kaj amikeco !

Post kelkaj momentoj, majstro Tomas, sentante en sia flanko la malpacienca kubuton de la tavernestro :

- Sinjor' Cervantes, vi kiu trakuris pli da aventuroj ol don Kihoto mem, vi ĝojigus nin, se vi konsentus al ni la amikaĵon rakonti kelkajn el viaj aventuroj.

Ĉiuj vikle apogis la peton.

Sed la poeto :

- Vi estas tro ĝentilaj al maljuna babilulo. De kiam mi prirakontas min, mi ripetadas en maniero laciga al plej paciencaj oreloj.

La barbiro protestis :

- Ĉiu parolo de Cervantes estas tiel plena, ke pli ĝoje estas lin relegi, ol legi, lin dekafoje aŭdi, ol...

Kaj la tavernestro :

- Via voĉo, elokventa kiel fonta freŝo...

- La akvo de mia fonto valoras multe malpli, ol la vino de viaj felsakoj.

- Mi amas mian vinon, precipe kiam ĝi animas la elokventon de Cervantes.

Necesis cedi al la insistantaj deziroj.

Tial, ke la renkonto kun Preciosa revokis en li rememorojn pri lia unua junaĝo, Cervantes diris pri sia unua junaĝo.

Li komencis per jenaj vortoj :

- Por kuraci miajn proprajn malsaĝojn, mi donas al ili fremdajn nomojn, kaj mi rakontas ilin meze de ridoj, kiuj, iafaĝe, malbone kaŝas la emociion. Vere, fratoj, mia adoleska tempo, daŭranta infanaĝo, estis pli malsaĝa ol la cerbo de don Kihoto sur la ebenaĵo de Montiel, sub la arda suno. Pro iu virino, kiu aspektis diino al miaj naivaj okuloj, kaj eble ne estis supera al la vera Dulcinea, junulo ligita al la reĝa domo kaj mi tre dece interbuĉis nin. Min trafis la malbona ŝanco venki Antonion de Sigura proksimume same, kiel la Kavaliro de l' Trista Miĉeno triumfas super la Biskajano. Mi lasis mian kontraŭulon en sufiĉe malbona stato. Koncerne min, mi konservis nedifektitaj miajn ambaŭ orelojn kaj ne perdis la duonon de kasko, kiun mi ne posedis. Sed ĉiam la sorto malbonvolis al miaj manoj. Mia dekstra estis profunde vundita. Juĝo, feliĉe en foresto, kondamnis min - krom dekjara ekzilo, kiun mia aventuremo estus akceptinta sen troa ĉagreno - al detranĉo de la dekstra mano. Estonta soldato, infano amanta la

gloron de l'bataloj, malfortanime domaĝas la manon, kiu tenas la spadon; tial mi fuĝis.

Li diras la emociojn de l'fuĝado, la tremantan ĝojon dudekfoje eskapi for de la algvaziloj, la ĝojon malicete triumfantan, kaj elflorantan, kaj ripozigan, fine trovi la rifuĝejon de neniŭ suspektotan.

Tiun rifuĝejon li trovis ĉe la ciganoj. Kun dankema vervo li diras la strangaĵojn de ilia vivo. Li laŭdis, inter la beleco aŭ la lindeco de pluraj ciganinoj, la suverenan gracion de Preciosa. Li revivigis, en la tremetado de l'vortoj, la alligan suplecon de ŝia danco, la penetran dolĉecon de ŝia kanto, la gustoriĉan strangecon de ŝia sprito, kaj tutan tiun subtilan ĉarmon, kiu apenaŭ permesis vidi ŝin aŭ ŝin aŭdi sen ami ŝin. Li igis ŝiajn okulojn brili kiel du sovaĝaj smeraldoj, verdaj lumoj serĉantaj kaj karesantaj, aŭ, oni ne scias, mokridantaj kaj fuĝantaj. Li malplektis la orajn harojn kaj igis ilin fali, pli peze belegaj ol la fluo de ruĝa mantelo. Li diris la facilan venkon de l'rideto. Li ne forgesis pri certa foŝeto en la mentono, en kiu liaj rigardoj, iam, liaj rememoroj, hodiaŭ, ŝanceliĝis kaj stumblis kiel en kaptilo. Sed, enfermante sian ĝojon en la koro, li ne rakontis, kiu rapida prefero estis al li konsentita, kaj kiel li prirabis tiom da emociigaj trezoroj.

Cetere, li baldaŭ forlasis la vivon, agrablege vagantan sed iomete simplan, de la ciganoj. Li sukcesis transpasi en Italion, perdiĝinte inter la servistaro de Julio Acquaviva, episkopo, ekstra sendito de l'Sankta Patro kaj estonta kardinalo.

Li nelonge malfruigis en tiu ridinda ofico de Ĉambristo. Al liaj okuloj, tio estis trompovesto daŭriganta tiun de Andres Caballero. En la unua favora okazo, li prenis servoficon en la armeo.

- Lepanto! Lepanto! - ekkriis la maljuna soldato Rafael de la Rapita. - Rakontu al ni la batalon ĉe Lepanto, gloron de Hispanio, kronon de la maro, triumfon de la Kristanaro.

Cervantes estis obeonta al tiu peto.

Sed la gastejmastro intervenis :

- La manĝotempo estas preskaŭ alveninta. Sinjoro Cervantes konsentos al mi la honoron pentofari kun mi kaj mia familio. Se vi revenos post du horoj, vi aŭdos el lia elokventa

buŝo la renkonton, kiun vi deziras.

- Se ni revenos ! - ekkriis la barbiro. - Ni aŭskultis la eklogon kaj la romanon, ni gustumis tutan freŝon de juneco kaj mateno. Ĝis baldaŭ la epopeo kaj la radiado de la granda glora suno.

Poste, sin turnante kun riproĉa mieno al la tavernestro: - Mi ne pardonos al vi, kruela akaparisto, ĝis hodiaŭ vespere, kiam Sinjoro Cervantes bonvolos dividi mian modestan manĝon. Ke mi nun senreziste allasas lin al vi, sinjoro de la Marmito, estas tial, ke mi malfidas, en kuirarto, la improvizojn de mia edzino.

Du horojn poste, la matenaj aŭskultintoj revenis, akompanate de parencoj kaj amikoj. La tavernisto, kiu ĉiam amis la parolon de Cervantes, ĝin amis precipe en sia domo, kien ĝi altiris multajn drinkantojn.

- Jen estas la tuta vilaĝo! - li ĝoje diris vidante la amason alveni.

La ombro de la ulmo estis tro mallarĝa por tiom da homoj. Oni eniris en la vastan ĉambregon. Du katoj kun oreloj kaj vosto tonditaj laŭ la hispana kurtimo, forkuris, sovaĝe strangaj kiel kimeroj, antaŭ la nekutima invado.

La poeto rimarkis ilian fuĝon kaj ridetis :

- Saĝaj bestoj - li murmuris - vi evitas la amason kaj la vantajn rumoron, kiun ĝi disvastigas, kaj la vantajn babiladojn, kiujn ĝi postulas.

Tiel li esprimis nur supraĵan sinceron. Post monatoj da silento kaj meditado, li amis doni al aliaj kaj al si mem unu el tiuj ebriligaj parolfestoj.

Neniam Lepanto estis pli alte beligita, kaj, kune, pli bone eksplikita. Fragmento de epopeo improvizita por kampa aŭskultantaro, pli bela ĉar ĝi estis belegaĵo efemera kaj malaperanta en la turniĝo de la horo. Horo de nobleco kaj entuziasmo, ĉu vian altigantan blindigan brilon vere faris epopea kanto ? Ĉu ne pli ĝuste vi vidis elflori senanalogan majstroverkon, himnon en lumo, lumon en heroeco, herocon en rideto kaj bonhumoro ?

Belo el tremeta silento, la amaso, pende ligita al la lipoj de la rakontanto, formis ĉirkaŭ suverena floro bukedon kaj tremon da emocioj. Neniom da bruoj. Eĉ la spiradoj ŝajne atendis. Pli ol unu buŝo malfermiĝis, kvazaŭ la oreloj ne sufiĉus por ricevi tiom da belaj paroloj. Oni trinkis antaŭe, oni trinkos poste. Sed dum la longedaŭra rakonto, neniu ri-

gardo sin turnis al la glasoj kaj kruĉoj. Escepte de la brakoj sin levetantaj dum plilarĝigas la rideto, escepte de la manoj sin kunpremantaj dum la okuloj brilas aŭ malsekigas pro admiro, neniu el la kunvenintaj viroj faris plej etan movon.

Kiam Cervantes eksilentis, estis longa aklamado. La manoj interbatis kiel en teatro, kaj, kiel en teatro, la buŝoj ripetis: "Vitor! Vitor!". La brakoj etendiĝis por proksimigi al Cervantes la aplaŭdojn; la korpoj kliniĝis por plibone dediĉi al li siajn kriojn.

La tavernisto, uzante la okazon, plenigis la glason de Cervantes kaj sian propran glason. Ĉiuflanke, imitante lian geston, la manoj kaptis la kruĉojn sperte aranĝitajn.

Baldaŭ la barbiro silentigis la braŭn de brindes kaj glugluoj. Meze de ĉies ĝojo, li esprimis nesatecon; kiu sendube dormis en kelkiuj.

- Nia glora amiko rakontis Lepanton kiel la plej elokventa el la historiistoj, la plej sperta el la strategiistoj kaj la plej superbela el la poetoj. Sed li nemulte parolis kiel atestanto kaj memoraĵisto. Li forĝesis Cervantes'on en tiu batalo, en kiu Cervantes forĝesis sian maldekstran manon.

La dekstra mano de l'poeto, plurfoje alten kaj malalten moviĝanta, ŝajnis peti kompaton.

Sed la senkompata barbiro:

- Cervantes, via modesteco kaŭzas al ni tro da domaĝo. La tagon, en kiu, kiel vi ameme diras, vi edziĝis al Esquivias, ĉu Esquivias ne edziĝis al via gloro?

Oni aplaŭdis. La streĉitaj vizaĝoj vokis, postulis la suplementan rakonton.

Flirtanta lumo de rideto flirtis sur la lipoj de l'poeto.

La senpacienca barbiro, tirante el sia zono libreton, ĝin malfermis je antaŭsignita paĝo. Kaj li laŭtleĝis: " - En la kajuto de Cervantes, malsana kaj tremanta pro febro, troviĝis serĝentoj Mateo de San-Istiban kaj Gabriel de Castagueda, kiuj atestis pri tiuj aferoj. Cervantes stariĝis, kaj, malgraŭ ĉies admonpetoj, kvankam li ŝanceliĝis sur siaj malfortigitaj kruroj, kvankam la febro faris el lia tuta korpo tremon, li petegis kapitanon Francisco Santo-Pietro'n, ke li bonvolu destini por li la plej danĝeran postenon. Al niaj reaj insistoj li respondis: "Sinjoroj, kion oni diras pri Miguel Cervantes? En ĉiuj oka-

zoj, kiuj ĝis nun sin prezentis por servo al la reĝo, mi faris mian devon kiel bona soldato. Ankaŭ hodiaŭ, mi nepre deziras tiel fari. Ne estu dirote, ke malsatinda febro estis pli forta ol mia kuraĝo. Mi preferas batali kaj morti pro la reĝo ol resti, kiel virino, tremanta sub kovrilo." Oni do ŝarĝis lin per komando super dek du viroj. Li ordonis al ili malsupreniri en barkon kaj sin ĵetis en la plej ekstreman forton de la miksbatalo. Li batalis kun tia braveco, ke lia kunularo sola, senhelpe, mortigis kvincent turkojn, inter kiuj la komandanto de la kapitana galero de Aleksandrio, kaj kaptis la reĝan standardon de Egiptio. Li ricevis du vundojn en la brusto, kaj lia maldekstra mano estis kvazaŭ milpece frakasita. Lin povis haltigi nek la sango, kiun li perdis, nek la doloro de la vundoj kuniĝanta kun la malsano. Ĉio, inkluzive de la febro, ŝajnis en li turniĝi en heroismon."

... Cervantes interrompis la legadon.

- Mi preferas rakonti mem ol lasi laŭdi min kun tia troigo. La verkisto, kiu tiel bombaste diras pri simpla soldato farinta nur sian devon, kiujn vortojn li povos eltrovi por inde laŭdi kapitanon don Alvaro de Bazan, kiun ni kromnomis "la fulmo", por inde laŭdi don Juan'on de Aŭstrio, grando, lumo kaj flamo, princo, heroo kaj genio ?

Ĉapitro Sesa.

La dua rakonto de Cervantes estis tre malproksime, ĝis ĝi ricevus la sukceson de la unua. Pli ol la atendatajn anekdotojn, li diris sentojn. Nu, tiuj sentoj ne ĉiam estis tiaj, ke ordinaraĵoj hispanoj, katolikoj kaj patriotoj, povus ilin sperti sen premateco kaj korŝiro.

Oni ekzaltigis kiam, voĉo pli forta ol trumpeto, la poeto sonigis la ardon al batalo, la ĝojon kaj orgojlon de la decidiganta venko. Eĉ la terurigan bildon pri la batalo oni vidis kun ebrio.

"De la sango tiel de malkredantoj, kiel de kristanoj, ruĝa estis la maro. Inter la kresto de la ondoj kaj ilia purpura ŝaŭmo, ĉiuj kavoj similis al tiom da kruelaj riveretoj, en kiuj sango fluas.

"La ruĝa rebrilo de brulantaj ŝipoj sange koloris la sangon mem. Ĝis mia lasta horo mi vidis ĝin, la hororan pejzaĝon de agonio, animatan tiom per la batalo kaj ties frakaso, kiom per la malespero, gestoj kaj krioj de kompatinduloj mortantaj inter fajro kaj akvo. En iuj momentoj la ĝemegoj de la mortantoj truis kaj ŝiris la timegigan tumulton de la mortigantoj. En la minutoj, en kiuj la kanoj silentigis sian diablecan voĉon, oni aŭdis, vastan brukriadon de damnitaj, milojn da suspiroj, milojn da singulto, milojn da strangaj voko: "Panjo, Panjo!", milojn da blasfemoj kaj malbenoj.

"Superante ĉiujn bruojn kiel monta pinto komandas al valoj kaj montetoj, subite la kristana trumpeto altigis ĝis la ĉielo la honton de la malkredantoj kaj nian gloron.

"En tiu momento mi estis malgaja. Kun mano streĉe premanta mian spadon, mi sentis tra la alia mano mian sangon kaj mian karnon faladi; mia brusto, truita en du lokoj, kovris mian ventron per varmeta koaguliganta likvaĵo.

"Pli ol pro miaj vundoj, mi suferis pro la vidaĵo. Sed ĉu ne pli ol la vidaĵo min suferigis mia penso? Fulmoj de lumo infera aŭ ĉiela, oni ne scias, havigas al ĉiu mortigo la formon de murdo, la naŭzan koloron de krimo.

"La emocio de l'venko estis en mi venka. La ĝojo, kiu min invadis kun la ĝoja sono de l'trumpeto estis tiel vaste inundanta, ke mi ne pensis plu pri miaj vundoj, kvankam

ilia ŝirdoloro preskaŭ atingis svenigon. Ankaŭ la vundoj de mia animo paciĝis. Dum momento, por miaj okuloj, la sango suprenlevata de la ondoj estis la leviĝo kaj flosado de triumfa purpuro. Por miaj oreloj la krioj de doloro kaj agonio fariĝis la baso subtenanta kaj plilalutiganta la venkokanton."

Ai sep mil mortintaj kristanoj la poeto kontraŭmetis tri-dekmil mortigitajn muzulmanojn kaj nenombreblajn kaptitojn, kaj dek dumil liberigitajn kristanajn kaptitojn, kaj cent dek sep konkeritajn galerojn. Sur la turka reĝa ŝipo, li montris, emociigan bildon, don Juan'on starantan, kun nuda kapo, salutantan la ĉefmaston, sur kiu oni suprenlevis krucifikson.

Sed baldaŭ lia voĉo malgajiĝis. Li jam ne estis la hispano kontraŭmetanta al kristanaj mortintoj muzulmanajn mortintojn. Homo, li sumigis homomurdojn. Li miris kaj incitiĝis, ke homoj, en unu tago, en unu loko, mortigis tridek sep milojn da homoj. Denove li pentris la abomenan bildon. Meze de la ruĝoj de sango kaj incendio, li ĵetis sur la maron la frenezigan flosadon de detranĉitaj kapoj, de brakoj, kruroj, kadavroj, kies dismembrigitaj gestoj interbatiĝas kaj albatigas al la ŝipoj.

" - Neniam estis vidaĵo pli horora kaj kompatinda. Sed kiu, en tiu momento, estis kapabla je kompatado?... "

"Turkoj naĝis ĝis niaj galeroj, kaj, kaptante la remilojn aŭ la direktilon, ili petegis pri mizerikordo. Ho ve! La ardo de l'batalo ankoraŭ ebrigas post la fino de l'batalo. La vino de venko dronigas en la soldato ĉian senton humanan. Anstataŭ akcepti la venkitojn, tiuj kristanoj, dume glorante la nomon de l'Kristo, detranĉis la kompatindajn petegantajn manojn."

Ankaŭ la aŭskultantaj hispanoj ŝajnis ebriaj de la malnova batalo kaj de la malproksima sango. Iliaj krioj aprobis la kruelaĵojn. Sola, la eks-soldato Rafael de la Rapita kredis kompreni Cervantes'on.

- Mi konis tiujn melankoliojn de venkovesperoj, tiel similajn al la malgajoj de festomorgaŭoj. Tromulte mortigi havigas preskaŭ tiom da naŭzo kaj vomemo, kiom tromulte manĝi kaj trinki.

Baldaŭ, eĉ la eks-soldato komprenis, ke li ne komprenas. Cervantes memorigis pri la vorto de don Juan de Aŭstrio: "Jesuo estas via generalo." Li incitiĝis, ke li vidas hodiaŭ Jesuon eltiri la glavon, kiun vivante li repuŝis en la ingon de Petro. Ĉu ja la spirito de Jesuo, ĉu ne la malsaĝo de l'

homoj igis la kristanismon militema ? La koro de Jesuo estis nur kompatemo kaj paco.

- Ju pli bonaj estas Jesuo kaj nia religio - deklaris granda fortikulo seka kaj nodoplana, - des pli konvenas ilin defendi.

Sed Cervantes, en amara rido :

- Ju pli pacama estas nia religio, des pli militamaj ĝi devas nin fari.

- Ekzistas aferoj, pri kiuj konvenas ne tro pensi - sentence asertis la prudento de l'barbiro.

Kaj Rafael de la Rapita :

- Obei en agado kaj en penso, jen estas la duobla devo de bona hispano kaj de bona katoliko.

- Por ĉiuj homoj, - rimarkigis Cervantes, - Jesuo volis morti.

- Tiom pli kulpaj estas tiuj, kiuj repuŝas la fruktojn de lia ofero, - furioze kriis la granda fortikulo seka kaj nodoplana.

La konversacio fariĝis konfuza, kaj Cervantes preskaŭ ĉesis partopreni en ĝi. Li aŭskultis la interŝanĝatajn parolojn, aŭ li revis. Li diris kelkajn vortojn nur tiam, kiam tion postulis la ĝentileco.

Tamen li memorigis pri la emocio de l'papo ĉe la informo pri Lepanto. Li montris Pion V-an kun la vizaĝo dronanta en feliĉaj larmoj, la brakoj levitaj al la ĉielo, ripetanta por la gloro de don Juan la vorton el la Evangelio: "Estis viro sendita de Dio, nomita Johano."

Sed, dum oni admiris, Cervantes ne diris sian penson, ke neniam sendito de Dio aperis kun glavo en la mano. La armiloj de la veraj Anoncantoj estas la potenco de la eksempla, la emocia mor-rigoro kaj tiu voĉo, kiu iafafoje, senlace kriante en dezerto, fine homplenigas la dezerton.

- Kiel bedaŭrinde - diris Rafael de la Rapita - ke maljusto forigas de la armeo la plej bonajn kaj plej bravajn. Eĉ don Juan de Aŭstrio, ĉu li plenumis sian destinton ? Ĉu la ĵaluzo de l'granduloj ne prirabis lin pri dudek venkoj, kiujn li ŝuldis al ni, kaj ni al li ? Kaj vi, sinjor' Cervantes, kiun oni devis nomi kapitano sur la akvoteritorio de Lepanto, oni maljustege lasis vin senfine simpla soldato. Se mi estas ĝuste informita, vi servadis unue kvin jarojn, kaj post kaptiteco pli peniga, pli aktiva kaj pli glorinda ol ĉiuj militkampanjoj, denove kvin jarojn. Kaj

neniam oni havis la simplan naturan juston, konsenti al vi plej etan gradon.

- Aliaj pli valoras ol mi, kaj ne estas plibone traktitaj, Sed la maljuna soldato :

- Mi komprenas, kia naŭzo igis vin forlasi armeon, en kiu ĉio estas donata al favoriteco, ne al merito.

- Alispeca naŭzo ŝiris la armilojn de mia mapo.

- Kion vi intencas diri ?

- La naŭzo pri milito.

Rafael de la Rapita eksentis abruptan skuigon. Sed li ĝin retenis, kaj komplezeme akordis :

- Oni ja laciĝas de plej belaj aferoj.

- Milito ne estas bela afero.

Ĉiuj protestekrisis :

- De tia bravulo, kia vi, - diris la barbiro - jen estas miriga parolo.

- Milito estas kuraĝo kaj kruelo. La beleco de l'kuraĝo ne sufiĉas por kovri la fiegan malbelecon de l'kruelo.

- Necesas konsenti pri la necesajoj...

- Riski propran morton, tio ja estas ebriga. Sed la hororo de mortiga gesto... Kiel ĝi restus ebla post la naivaĵoj de l'junaĝo, kiam oni ĉesas kredi, ke pro io oni batalas ?

- Hispano ĉiam batalas pro Dio kaj pro la Reĝo.

- Kiam oni vidas la reĝojn tiel kruelaj kontraŭ la homoj kaj eĉ kontraŭ Dio...

- Pri kiuj reĝoj vi parolas ?

Sed Cervantes, anstataŭ rekte respondi :

- Mi forlasis la servon post la milito en Portugalio, naŭzite de la abomenindaj kruelaĵoj de markizo de Santa-Cruz kaj de dukoj de Albo.

- Vi ne amas dukon de Albo, tiel grandan generalon, tiel grandan homon, tiel grandan katolikon ?... Kiom da herezuloj el ambaŭ seksoj tiu bravulo mortigis en Flandrio ! Ĉu dukoj de Albo neheredis la koron de Dominiko ? Vere, li meritas esti tiom respektigata kiel sanktulo, kiom akklamata kiel heroo.

- En Portugalio, tiu sanktulo masakrigis, en ununura buĉado, dumil monakojn kulpajn pro tio, ke ili amis la sendependecon de sia lando. Felice mi ne ricevis la ordonon partopreni en la teruriga buĉado. Prefere ol obei, mi lasus, ke oni pafmortigu min. Sed, de la supro de monteto, mi vidis la vaste abomenan spektaklon. Tiu vizio longatempe

min peladis. Dum pli ol monato mi timis frenezigi.

- Mortigi monakojn, estas ja abomeninde.

- Tamen, mi plu restis soldato. Mi ankoraŭ militis en insuloj Terceires.

- Kie don Alvaro de Bazan, markizo de Santa-Cruz, tiel komplete venkis la francan floton ?

Gesto de Cervantes jesis. Sed lia parolo :

- Se Santa-Cruz estis admirinda en la batalo, kiel malglorinda li estis post la venko ! Honto kaj indigno rompis mian spadon.

- Vi mirigas min, - diris Rafael. La admiralo, al mi ŝajnas, faris nenion eksterordinaran.

- Li alterigis ĉiujn okupintojn de la venkita eskadro. Insulo San-Miguel estis la loko de buĉado malpli horora pro la nombro ol tiu de la portugalaj monakoj, pli abomeninda pro la organizo, la rigora ordo kaj la kvazaŭ eklezi-eca pompo.

- Temis pri francoj, el kiuj eĉ pluraj estis herezuloj.

- Al Strozzi, vundokovrita, oni tranĉis la gorgon. Post li oni masakris tricent oficirojn. Sepdek kvin fojojn, ni vidis po kvar el tiuj bravuloj supreniri sur eŝafodon, sur kiu kvar ekzekutistoj, per sammomenta gesto, detranĉis la kvar kapojn.

- Kial mi ne vidis tiel belan aferon ! - bedaŭris la eks-soldato, Sinjoro de la Rapita.

Kaj la barbiro :

- Prave farite. La Reĝo faris plibone ol nur aprobi. Li altece rekompencis kaj nomis Santa-Cruz'on hispana grandulo.

- Kontentigi reĝon aŭ kontentigi sian konsciencon...

- Por bona hispano, ĉu ne estas sama afero ?

- Eble mi ne estas plu bona hispano. Ekde tiu tago, mi estis absolute naŭzita de l'milito.

- Simpla demando pri aĝo, - diris majstro Tomas Avlador;

- dek kvin jarojn pli frue, la sama vido estus ekscitinta vian bravecon.

- Naŭzita de l'milito, - milde reparolis Cervantes, - kaj pli precipe de l'venkado.

Pluraj rideksplodis, kredante pri serĉo.

- Jesuo, - daŭrigis la poeto, - ne nur malaprobis la glavon de Petro. Li rifuzis voki la legiojn de siaj anĝeloj. Kiam li ne povis eviti la batalon, li elektis la malvenkon.

Tial, ke venko estas misformanta. Per orgojlo kaj kruelo ĝi metamorfozas eĉ plej bonajn homojn en sovaĝajn bestojn. Jesuo timis pri tio, kion ĝi farus el la ĉielanoj. Mi fine vidis ĉion, kion ĝi deprenas de nia animo. Mi fine ne vidis plu, kion ĝi eble povus doni al Dio aŭ al justo.

Li havis amaran plidaŭrantan ridon.

- La glavo, kiu ne estas fidela servanto de justo, sin malhonoras. Kiu venkinto iam estis justa? Ĉiu reĝo estas sklavo de sia orgojlo kaj de sia politiko, samkiel don Kihoto estas ludilo de sia demenco.

- De kiam meditado estas la rolo de soldato? - demandis, eklevante la ŝultrojn, la maljuna soldato Rafael de la Rapita.

- Tamen, se la malamikaj soldatoj meditus...

- La venko fariĝus tro facila kaj senglora.

- Ĉiaokaze, - diris la barbiro, - la niaj ĉiam sin gardu kontraŭ certaj meditoj.

- Mediti, - aldonis la gastejmastro, - estas enui aŭ malgaji. Plibone estas trinki.

Kaj la bona tavernisto plenigis la proksime starantajn glasojn.

Ĉapitro Sepa.

Estis jam malfrue en la nokto, kiam Cervantes eskapis de la timinda barbiro. En la dometo ricevita kiel doto de Catalina, blindpalpe li sin ĵetis tute vestite sur la liton, dormis ĝismatene.

Lin vekas la unuaj heloj de la tago. Tualetinte, li malfermas la manuskripton de Persiles kaj Sigismunda, relegas la laste skribitajn paĝojn. Estis rakonto pri en-sorĉado. La epizodo estis kompleta, kaj ŝajne Cervantes estis komenconta alian. Tamen li ne decidiĝis. Li revadis en prokrasto, kaj dume liaj fingroj glitigis la foliojn. Fine liaj lipoj disetiĝas, liaj okuloj malicete akrebrilas, kaj al la aventuro de Rutilio de Sieno li aldonas frazon: "Kiel kristano kaj katoliko, mi ne kredas tiujn aferojn, kvankam ilin montras al mi sperto."

Li ankoraŭ hezitas. Poste, li skribas: "Ĉar tio estas la duobla potenco de l'kredo, ke ĝi igas nin certigi nevideblaĵojn kaj nei tion, kion ni vidas."

Sed li ekskuas la kapon.

- La Inkvizicio, - li murmuris, - ne estas tre lerta por eltrovi ironiaĵojn. La religio instruas al ni tro da solenaj stultaĵoj, por ke ĝi ne facile akceptu kiel veran la naivan sincerecon de iu, kiu eldiras pian stultaĵon. Tamen estas singarde ne tro insisti.

Plurfoje limlegis la du frazojn, kiuj lin gajigis. Per plumo de bedaŭro malrapidigata, li forstrekis la lastan. Sur la streko li skribis ian alian frazon, poste trian, tiel, ke fariĝis neeble deĉifri eĉ unu literon el la unua teksto.

Plurajn horojn li laboris en ĝojo. La inventoj svarmis en lia spirito kiel popolamaso en festo. Li notis ilin per kelkaj vortoj tiel rapidaj, ke nur por li ili havis signifon. Liberiginte el la feliĉa pelado, li skribis paĝon, plurfoje ĝin laŭte relegis, multigis blindpalpajn korektojn kaj definitivajn amendojn, ebrietigis per sonoroj de momento al momento pli firmaj kaj puraj, per subtilaĵoj fajniĝantaj kaj akriĝantaj, per plenaĵoj pli kaj pli belege streĉitaj. Persiles kaj Sigismunda estis la zorgata verko, en kiu Cervantes esperis doni sian tutan mezuron.

Li skribis sur la apogilo de malfermita fenestro. Altstatura knabo haltis antaŭ li, kaj, kliniĝante, murmuris, ne sen timemo :

- Sinjoro Cervantes...

Li estis la pliaĝa filo de l'barbiro. Komisie de sia patro, li alportis du belajn bonege grasajn kokidojn.

La vizitoj de Cervantes al Esquivias vekis en majstro Tomas sentojn diversajn, miksitajn, el kiuj kelkaj restis fuĝantaj kaj nekonesataj. Unue elstaris la plezuro kaj fiere revidi faman amikon. La barbiro gustumis la unuajn rakontojn de l'poeto kun pli da ĝojo ol iu ajn. Baldaŭ la belparolulo, de ĉiuj aŭskultata en foresto de Cervantes, de neniu atentata, tuj kiam Cervantes ĉeestis, sentis ian surdan malkontenton. Tio ne estis ĵaluzo. Eĉ, Avlador ne konfesis al si, ke io mankas al li, kaj ke io lin ĝenas. Oni lin mirigis, indignigis, sciigante, ke li deziras la foriron de sia amiko. Li estus sincere neinta. Sed en li maldormis malica estaĵo, al kiu neniam li konsentis parolarajton, kiu iafoje gvidis iun el liaj gestoj. Ĝi, tiu malica kaj aktiva mutulo, estis rimarkinta, ke se Cervantes ricevis kiel donacon iun delikatan nutraĵon, Cervantes estis hastema porti la donacon al donja Catalina.

Tial la malavara majstro Tomas ne longe prokrastis sendi al sia amiko paron da kokidoj, kiel hodiaŭ, aŭ tre freŝajn ovojn, aŭ iun alian frandaĵon.

La nekonesita kalkulo de l'barbiro trafis rapidan sukceson.

Unu horon poste, Cervantes adiaŭis unue ĉe majstro Tomas, due ĉe la gastejo. Sub ia preteksto, li reekmarŝis al Madrido.

La tavernestro proponis pruntedoni al li mulon. Sed la poeto, ne havante eĉ unu maravedon en sia sako, estus tro suferinta lasi la povran beston sennutra. Li rifuzis, pretekstante sian inklinon al piedirado.

- Dum moviĝas miaj kruroj, mi plibone eltrovas aventurojn. Vere, estas miaj kruroj, kiuj transportas min en revolandon.
- Do movu ofte viajn krurojn, sinjoro, revante pri don Kihoto.

Neniu renkonto malfruigis la revenon. Malofte la paŝado de l'poeto ritmiĝis laŭ la variaĵoj kaj la ŝanĝiĝantaj movoj de lia penso. Ĝi estis deziro alveni, kaj kurado pli kaj pli akcelata.

- Ne sola mi revenas, - li gaje diris hejmen enirante, -

kaj mi esperas, ke vi bone akceptos miajn gastojn.

Li deligis la kontuzitajn krurojn de la kortbirdoj, kiuj eligis kriojn de plendo kaj faciliĝo.

- Dankon, - diris Catalina, - ke vi haste alportis al ni tian provianton.

Kaj, kisante lin :

- Neniom timu; ni scipovos silenton gardi, kaj vi povos, tiel bone, kiel en Esquivias, progresigi vian Don Kihoto'n.

Li ŝin rigardis kun bona rideto, kredante pri ironiaĵo.

Kaj, ĉar en lia spirito flugantaro da inventoj ja agitiĝis ĉirkaŭ la Kavaliro de la Trista Mieno, li malfermis la manuskriptan kofron.

Kliniĝinte, li metis en ĝin Persiles kaj Sigismunda'n. Poste li esploris ĉiujn kaŝangulojn, movis ĉiujn paperojn. Li elprenis ilin, remetis ilin, rekomencis. En li miro tremetis, grandiganta.

Fine :

- Mi ne trovas, - li diris restariĝante.

- Kion vi ne trovas ?

- La Don Kihoto'n.

La kvar virinoj rideksplodis.

- Ŝerco inda je Sanĉo, - deklaris Isabel.

Cervantes direktis al sia filino fingron ŝerce akuzan kaj minacan.

- Kie vi kaŝis ĝin, malicetulino ?

La virinoj pli laŭte ridis.

Sed li sidiĝis antaŭ la tablo :

- Donu al mi ion por manĝi, kompreneble, se tie ĉi troviĝas ia manĝaĵo. Dum mi estos okupita, la maliceta Isabel, sen ke mi tion rimarku, eltiros la inĝenian hidalgon el la kaverno de Montesinos.

Catalina diligentis prezenti al li malmolan panon, maldikan pecon da fromaĝo kaj iom da akvo. En la domo estis nenio alia manĝebla. Cervantes trempis la panon en la akvon por ne vundi siajn malarmitajn maljunajn dentokarnojn, kaj li manĝis malrapide, kaj li ĉirkaŭvolvis la amatinuojn per dolĉaj rigardoj.

Kiam finiĝis lia malpeza manĝo :

- Decidiĝu, mia Isabel. Vi ja scias, kiel mallerta por serĉi mi estas, kaj kelkaj eble inĝeniaj inventoj vokas plumon kaj paperon.

Lia rideto esprimis nur amon. Neeble eltrovi en ĝi, nek en lia parolmaniero, eĉ plej etan malicon.

La virinoj konsternite sin interrigardis.

- Kia senpripensulo! - ekkriis Catalina. Li forgesis Don Kihoto'n en Esquivias.

Ĉu tio estis ankoraŭ maniero riproĉi, ke tien li kunportis Persiles'on ?

Ne, ĉar donja Luisa rimarkigis :

- Eble li reforiris antaŭ la alveno de l'manusripto.

Cervantes rigardis Luisa'n, rigardis Catalina'n, rigardis Isabela'n kaj Costanza'n, rigardis la objektojn lin ĉirkaŭantajn. Poste, glitigante la manplaton sur sia frunto, li diris, iel strange :

- Foje-foje min trafas tiaspecaj sonĝoj. Sed, se ili plidauras, ili fariĝas inkubsonĝoj.

Tiam Costanza :

- Ĉu do, onklo mia, vi povas en la daŭro de du tagoj forgesi tion, kion vi komisiis ?

- Kion mi komisiis ?

Li aspektis tiel fremda al la diritaĵoj, ke Catalina deklaris :

- Ne de Esquivias li revenas; ja de la luno, aŭ almenaŭ de Batuecas.

Kaj Luisa, komplezeme, por envojigi lin :

- Ĉu vi ne renkontis fray Aliagan, antaŭhierau ?

- Mi ja renkontis tiun malagraban vojaĝantan domarbeton (1). Sed kiu rilato ?...

Luisa ekmiris preskaŭ ĝis indigno.

- Ĉu ne sufiĉas reelvoki tiun renkonton, por ke ĉio revenu en vian memoron !

- Malpli kaj malpli mi komprenas.

Catalina, pezapogante sur ĉiun silabon :

- Ĉu vi ne petis la fraile'n, kiu estis pasonta tra Madrido kaj reforironta al Toledo, ke li alportu al vi tion, kio estas skribita el la dua Don Kihoto ?

En la momento, kiam Cervantes malfermis la lipojn kaj skuis neantan kapon, iu frapis al la pordo. Catalina kuris malfermi. Aperis servisto, kiu donis al ŝi pakaĵon.

- Fray Aliaga, - li diris, - komisiis al mi esprimi tutajn liajn bedaŭrojn.

- Kiujn bedaŭrojn ?

- Mi ne scias, pri kio temas. Mi servas diskrete, kiel konvenas en klerika domo. Mia mastro nur komisiis al mi informi vin, ke lia vojaĝo al Toledo estas prokrastita. Urgaj aferoj

(1) Ni rememoru : Aliaga signifas ulekso.

vokas lin al Tordesillas, kaj li resendas al vi tiun ĉi pakon, kiun porti al ĝia adreso malebligas la ŝanĝo en liaj projektoj.

Cervantes kaptis la pakon, ĝin deligis per febra mano. Ĝi estis, manuskripto, plano kaj notoj, ĉio ekzistanta el la dua Don Kihoto.

Longatempe, en medita silento, Cervantes rigardis la paĝojn tiel strange malaperintajn, tiel strange revenintajn.

Dua parto.

Ĉapitro Unua.

Cervantes ellitiĝis, premegita de laciĝo. Li estis mal- multe dorminta, per dormo vizitadita de inkubsonĝo. Sed lia penso, heroa rido, suprenlevis kaj animis lian malfor- ton.

- Al zorgoj kaj ĉagrenoj mi malpermesas penetri en la cita- delon de mia animo. Mia malsato senkuraĝigas kaj malarmas la plej malfortajn malamikojn. Kiuĵ forton havas, tiuj obs- tinas. Ili breĉas en la antaŭstarantaj fortikaĵoj, mi di- ras en mia dormo kaj en la sano de mia korpo. Kiel grave, se mi ĉiam sukcesas ilin forpeli de mia maldormanta spiri- to? Estas neniu venko sen oferoj.

En la daŭro de dek kvin monatoj, la malmildo de dompro- prietuloj estis kondamninta al tri transloĝiĝoj la gloran senhavan maljunulon. Li forlasis la straton de l'Leono por la strato de l'Ĝardenoj, la straton de l'Ĝardenoj por la strato de duko de Albo. Antaŭ unu semajno, juĝdecido lin elpelis el ĉi tiu lasta loĝejo, ne sen elpreni parton el liaj malriĉaj mebloj. Li spertis grandan malfacilon por trovi novan rifuĝejon. Fine li revenis straton de l'Leono, je mallonga distanco de sia antaŭa azilo. Ĉe N° 20, grupo 228, angule de la strato de Francos, en loĝejo pli malvas- ta ol la antaŭa, oni vivis premdense.

Ne nur mebloj restis ekster la nova loĝejaĉo. Senkuraĝ- igitate pro la obstinego kaj la pliakriĝo de l'mizero, Isa- bel rifuzis iri al ĝi. Ŝi eniris en la monakinejon de la Triumuo. Tie, ne konsumiĝante per malbone pagataj laboroj, ŝi manĝos laŭ sia malsato, ŝi ĝuos por si sola sufiĉe am- pleksan ĉelon, kaj, en komunumo, vastegajn halojn kaj vast- egajn ĝardenojn.

Al la koro de l'patro tiu dizerto estis terura bato. La malfeliĉo, al kiu li ne permesis konfuzi la fieran ritmon de lia penso kaj la altecan rideton de lia animo, venĝis al la korpo; la malfeliĉo, malamiko, kiu, furioza pro ne-

antaŭvidita rezisto, bruligas la antaŭurbon kaj subfosas la muregojn. Cervantes jam estis nur ruino. La fingro de la morto estis detruanta la fundamenton; ĉio estis post unu jaro aŭ du, disfalonta.

La inkubsonĝo premeginta lian nokton ne ĉiam montris neblan translokiĝon, dum kiu mebloj ruliĝas kaj elglitas laŭtakte, kiel oni ilin suprenmetas sur ŝarĝoĉareton, dum kiu infano perdiĝas kaj malaperas sen eblo ĝin trovi. Iufoje la inkubsonĝo konsistis el flamoj, odoroj de brulantaj karnoj, el solenaj procesioj, el pompaj drapiraĵoj, el funebraj kantoj, el bombastaj predikadoj, el preĝantaj, kriantaj, ridantaj popolamasoj. Madrido preparis ĝojan aŭtodafeon. Eĉ pli ol liaj personaj malfeliĉoj, tiu baldaŭ katastrofo turmentis la poeton.

- Kial mi ne estas, kiel en Alĝero, soleca homo nenium endanĝeriganta ! Mi ĵetus min, kun fero en la mano, kontraŭ la torturantajn monakojn. Ja certe, mi ne mortigus; mi ne estas plu sufiĉe katolika por mortigi. La plataĵo de mia spado frapus la vangon kaj la dorson de pluraj. Poste, inter la naivaj martiroj de naiva kredo, mi suprenirus sur la ŝtiparon, glora martiro de mia kuraĝo kaj de mia kompatato. Sed la bonaj monakoj ne satigas torturante kaj mortigante la homon, kiu lasas sian racion paroli, aŭ la homon, kiu lasas paroli malsaĝon diferencon de ilia malsaĝo. Ili postpelas lin en lia idaro kaj en lia tuta parenaro. Ni forigu don Kihoton de la malhonora spektaklo kaj de la nerzistebla tento. Al Isabel, al Catalina, al Costanza, al Luisa, mi ŝuldas ekfuĝi. La fuĝo, sola ebla venko kontraŭ certaj demencoj el amo kaj grandanimo.

Li laŭte diras :

- Mi iras al Esquivias por provpeni fini tiun Don Kihoto'n.
- Povra amiko, - rimarkigas Catalina, - kie vi trovos la forton necesan por tiel longa vojaĝo ?
- Mi ankoraŭ malpli havas la forton resti.

Li elĵetis tiujn vortojn kun abrupto kaj malpacienco. Malofte li tiel trafbatis per paroloj kune sentencaj kaj enigmaj. Kiam tio okazis, la virinoj ne replikis.

Cetere la sperto estis al ili instruinta, ke Cervantes malofte reprenis decidon.

Tamen Catalina murmuris :

- La tago estos terurege varma.

Ŝi esploris en angulo, inter malriĉaj strange diversspecaj objektoj malsate lasitaj de la juĝa preno. Ŝi tro-

vis malnovan ombrelon, tute konsistantan el flikaĵoj. Ĝi ĝin prezentis al sia edzo, per hezilita mano.

- Ĝi vin ĝirmus almenaŭ iomete. Sed ĝi estas tiel malbona, tiel malbela, tiel honta.

- Escepte de homaj agoj, ĉio fariĝas bela kaj glora en sunlumo.

Dum li ekzamenis la manuskripton de l'Don Kihoto kaj kunmetis la utilajn notojn, la servisto de Monsinjoro de Toledo alportis la ĉiutagan real'on. Ankaŭ ion alian li hodiaŭ alportis. Pakajon, kiun li transdonis al Cervantes, dirante :

- Mia mastro opinias tiun ĉi libron taŭga por interesi vin, kaj eble vi hezitus elspezi ok realojn por akiri ĝin.

- Mi ja hezitus, - ridante respondis Cervantes, kiu jam de jaroj ne estis posedinta ok realojn. Diru al Monsinjoro, ke mi iras al Esquivias por labori pri tiu Don Kihoto, kiun li tiel ofte estis tiel afabla peti de mi. Diru al li, ke mi legos lian libron laŭlonge de la vojo. Mi ricevas plezuron legante dum marŝado, kaj mi ricevas plezuron, dum marŝado pensante pri tiuj, kiujn mi amas kaj respektegas.

Li ŝovis la pakajon en unu poŝon, la manuskripton en alian. Tuj kiam la servisto estis elirinta, li kisis la tri virinojn kaj foriris.

Jam Madrido estis tute febra pro la preparoj por la festo. Preterpasante, Cervantes rigardas la laboristojn starigantajn la vastan amfiteatron. Li naŭziĝas pro ilia zelo kaj ilia pia aktiveco. Hodiaŭ, tion oni vidas, ili laboras ne pro trudo kaj por salajro, sed pro sia plezuro kaj por sia savo. Unuj kantas kantikojn. Aliaj interŝanĝas naive fanatikajn dirojn. Ili deklaras, ke, se okaze mankus materioj, ili senhezite detruus siajn proprajn domojn por konstrui per la ruboj la efemeran kaj katolikan konstruaĵon.

Cervantes sin deturnas kaj fuĝas.

La fuĝo ne savas lin. Foje la junago ĉeestis la hororan kaj solenan spektaklon. La rajdado de l'memoraĵoj postpelas lin. La konstruatajn eŝafodojn, kiujn li ĵus renkontis, li nun vidas starantaj, meblitaj, loĝataj. En la mezo de unu el ili, la altaro superata de la verda kruco, Ambaŭflanke de la altaro, po unu katedro ; tie ĉi, predikanto laŭdas la bonecon de Dio kaj de la "tre korpar-donema tribunalo"; tie, sekretario legas la mortoverdikt-

ojn. Ambaŭ estradoj estas garnitaj per la du kanonikaroj, kaj, pli malalte, la rondforma galerio hirtiĝas per la minaco de halebaroj.

Sur la frontkontraŭa eŝafodo, sub la duonoranĝo, pli precizaj kaj pli kortuŝaj ol ĉio cetera, estas la figuroj de la kondamnitaj. Vestitaj per la san-benito, ridinda skapulario el flava drapo, kapumitaj per la alta kartona mitro, kun genista ŝnuro ĉirkaŭ la kolo, kun torĉo el verda vakso en la mano, la herezuloj noble staras en sia kaĝo aŭ venkite falas kaj svenas. La penso de l'poeto konfuzas aŭ kompletigas la rememorojn. Inter la viktimoj viditaj de siaj okuloj, li lokas, en la sama senhonoriga kostumo, Jesuon, Sokraton, cent glorajn martirojn, profetojn de la antikva leĝo, sanktulojn de la nova leĝo, filozofojn, kiuĵ kapablis malestimi ĉiujn leĝojn.

Foje-foje, al liaj okuloj de revulo, ŝanĝiĝas la kostumoj, ne plu la vizagoj. Sur la ŝultroj de la herezuloj, la moka purpurmantelo anstataŭas la san-beniton, la mitro sur ilia kapo transformiĝas en dornokronon, la torĉo el verda vakso fariĝas en ilia mano la kanosceptro. Kaj du vortoj ploras en li : Ecce Homo ! Jen la Homo tia, kia lin faris la pastroj ĉiutempaj kaj ĉiulandaj.

Li malespere sin demandas, ĉu ekzistas iu efika rimedo por kontraŭbatali la pastrojn.

- Ho Jesuo, don Kihoto de l'Vorto, savi la mondon ne povis viaj paroloj pli ol la lancobatoj de l'kavaliro. Nek vorto nek glavo povas ion kontraŭ la kuraĝo mortigi aŭ la kuraĝo morti. Kion ajn vi faru aŭ diru, grandanima don Kihoto, morgaŭaj reĝoj kaj pastroj konvertos viajn vortojn kaj varbos viajn gestojn. Ili pruvos al la stulta amaso ke, atakante la reĝojn kaj pastrojn hieraŭajn, vi preparis ilian propran venon. Braveco de don Kihoto, foje okazas, kiam vi diligentas rektekorekti maljustajn torditajn agojn, ke vi rompas ankaŭ iun senkulpan kruron. Mildeco de Jesuo, vi revas ekbruligi en la koroj la grandan incendion de amo, kaj vi ekbruligas, ĉe la pordo de Alcala, ŝtiparon por la homoj al vi similaj.

Vizioj kaj pripensoj kondukis la poeton eksteren de Madrido, sur la kamparon, kiu, ĉar ĝi estas dezerta, naskas impreson de libero, de racio, de espero. Kaj Cervantes laŭte ekkrias en la dezerto :

- Nek per glavo nek per martiriĝo. Sed eble, eble, eble per rido.

Ĉapitro Dua.

La longatinga povo de la komika simbolo estis, de kelka tempo, la preferata temo de la revadoj de Cervantes.

- Mi konsolas min per rido, kaj oni ne scias, pri kio mi ridas, kaj pliposte oni scios, pri kio mi ridis. Miaj ridoj : grajnoj semitaj en la mallarĝa vazo de la nuna parolo. Iu el miaj ridoj eble estas la glano, el kiu kreskos vasta kverko, kaj morgaŭ ĝiaj bravaj radikoj diskrevigos la mallarĝan vazon.

Liaj lipoj duone malfermiĝis, kaj liaj okuloj akrebri-lis. Li revis pri la transformiĝoj de Dulcinea de l'Toboso, sub la demencaj meditoj de l'kavaliro, sub la mensogoj de la armilportisto; kaj li revis pri la transformiĝoj de la Religio de Jesuo sub la blindpalpa kaj necerta laboro de la jarcentoj, sub la avida kaj ambicia penado de la pastroj. - Ho popola belo de la unuatempa kristanismo, kaj vi, vilaĝe simpla belo de Aldonza Lorenzo... Ho ridindaj malbonfaraj princinoj, Religio en la cerbo de la katolikoj, Dulcinea en la cerbo de don Kihoto.

Li rememoris, kiel la simbolo aperis al li, ne longe post kiam la libro estis komencita, en ĝoja fulma blindiĝo. Kiam la kavaliro, renkontante la vendistojn, kiuj iras al Murcio por aĉeti silkon, volis ilin trudi konfesi la unikan belecon de Dulcinea.

La frazoj sonis en li, tintiloj de frenezula ĉapo, kiujn eble la estontularo saĝe komprenos.

" - Sinjor' kavaliro, ni ne konas la bonan damon, pri kiu vi diras. Montru ŝin al ni. Se ŝi ja estas tiel bela, kiel vi asertas, volonte kaj sen ia truditeco, ni, laŭ via deziro, konfesos la veron.

" - Se mi montrus ŝin al vi, kian meriton vi havus en konfeso de tiel evidenta vero ? Ja senvide vi devas kredi, konfesi, certigi, ĵuri kaj persiste tenadi. Se ne, vi havos aferon kun mi, orgojla kaj senprudenta raso."

Ne la kavaliron li vidis antaŭ siaj okuloj. Ja "hundon de l'Sinjoro". Sub la blanka robo, iu Aliaga, iu Blanco de Paz, iu Bernardo de Sandoval proklamis, kun ordona gesto : - Ja senvide vi devas kredi, konfesi, certigi, ĵuri kaj persiste tenadi.

Kiam la timinda persono aldonis :

- Se ne, vi havos aferon kun mi, orgojla kaj senprudenta raso,

... li ne skuis la minacon de fragila lanco, sed li sin ĉirkaŭigis per tuta svarmo el terurigaj vizioj : ŝvitantaj karceroj, skribistoj kun kap-tega masko, ekzekutistoj kun larĝa lipstreĉo, torturiloj, ekbrulantaj ŝtiparoj.

Elfloranta kaj daŭranta lumo, la revado de Cervantes disvolvis la inĝenian simbolon. Li vidis jen la pezan korpon kaj la gajan larĝan vizagon de Sanĉo, jen la lunan vizagon de Aliaga kaj lian vastan grasventron. Malbrilaj ambasadoroj, de kiuj oni postulas revelaciojn pri Dulcinea aŭ pri la Tre-Alta, ili multigas maltrafojn kaj mensogojn. Ilia groteska parolo genuigas don Kihoton kaj la hispanan popolon antaŭ la plej malbela, la plej malafabla, la plej fetora el la kampulinoj; antaŭ la plej kruela al la religioj, tute odoranta de sango kaj bruligataj karnoj. Tamen Sanĉo-Aliaga, elokventa predikanto, proklamas la blindigan belecon de la damo.

Momenton, la penso de l'poeto haltis ĉe la klopodoj de Lutero kaj de kelkaj fremduloj por lavi la kristanismon je ĝiaj plej freŝdataj malpurigaĵoj, ĝin rekonduki al ĝia simpla antikva nobleco. Li ridetis al la fervora provpeno. Sed baldaŭ li skuis la kapon, levis la ŝultr-ojn. Kaj li murmuris :

- Rejunigi Esonon (1)!... Plej bone espereblè, estus vidi disŝiratan la malbonfaran maljunulon, kies karnoj, en la kaldronego, ne ree interfiksiĝos.

Cetere, kiel longe la reformatoroj estas sinceraj ? Kiom da jaroj necesos por igi ilin similaj al la katolikaj pastroj, por fari el ili mensogistojn kaj ekspluatistojn, ankaŭ persekutistojn al ĉiu, kiu povus malgrandigi ilian potencon kaj la fluadon de naivaj riĉaĵoj en la abismon ĉiutage pli profundan de ilia avido ?

Aro da simboloj fluge venis al Cervantes per flugiloj de l'rido. En la spirito de bona katoliko, la skurĝobatoj havas mirindajn efikojn. Ili plaĉas al suverene bona Dio, kaj ili redonas al ensorĉitaj princinoj samkiel al malpurigitaj animoj ilian originan belecon. Tro juste estas malavare pagi la sindonajn estulojn, la noblajn Sanĉojn, kiuj konsentas tiajn pentofarojn. Sed la klerikaj Sanĉoj akceptas la monon kaj kontraŭe donas grimacojn kaj ŝajnig-

(1) Esono : patro de Jazono, reunigita de magiistino Medea.

aĵojn. La batoj pluvas malpli sur iliajn sanktajn dorsojn ol sur la najbarojn, homojn aŭ arbojn.

La riĉa imagpovo de Cervantes kreis komplementajn enscenigitinojn, la malnaivan Altisidoran, la malgajan grafinon Trifaldi kaj la trupon de la barbohavaĵoj duenoj.

La ĝojigo kaj ebriigo de tiom da animhavaĵoj inventoj ekscitis la poeton ĝis impetegaj gestoj en la soleco, ĝis brua rido en la kampara silento.

Eĉ meze de la despoblado (1), tiajn senbridajn gajeksplodojn sekvis, en Cervantes, ia maltrankvilo. Li rigardis, ĉu neniu ekvidis lian malkonformiĝon al la kastilia graveco. Neniu, feliĉe.

La kreada emocio, forgesigante aĝon kaj lacecon, baldaŭ kondukis lin al novaj senkonsideraj gestoj. Lia paŝado, pli kaj pli vigla kaj gajeta, momente fariĝis sekvo de ĝojaj saltoj kaj gajviglaj eksaltegoj.

Sed li sin demandis :

- Davido sen harpo, sen krono kaj sen pano, antaŭ kio vi dancas ? Ĉu vi forgesas, ke la malsaĝo de la gedukoj mokas la malsaĝon de don Kihoto, kaj ĉu vi forgesas, ke ĉiuj sanktaj kestoj estas malplenaj ?

Duone memvola, ia densa kvieto pezis sur li. Liaj akrevidaj okuloj distingis du homojn venantajn direkte al li.

Li murmuris :

- Memoru, ido de cervo, ke la Inkvizicio faras el ĉiuj viaj fratoj viajn spionojn, malamikojn kaj ĉasistojn. Memoru, ke sub katolikaj okuloj, konvenas vivi gvatante, kun la barbo sur la ŝultro.

Sed, baldaŭ poste, li rekonis la venantojn kaj serenigite ridetis.

- Tiuj estas honestaj ŝtelistoj, kun kiuj oni povas konversacii.

Nun li sentis pezan lacecon. Je tripaŝa distanco de la vojo, li rimarkis unuopan arbon. Ĝi estis dikega korkokverko. Li iris sidiĝi en la ombro, apogis sian dorson ĉe la trunkon. Kaj li vokis, kun la manoj ĉirkaŭ la lipoj :
- He! Sinjoro Rinconete, he! sinjor' Cortadillo, se vi ne estas tro urĝataj, venu dum momento interparoli kun amiko.

La pasantoj sin turnis al la voko.

Rinconete kaj Cortadillo ambaŭ havis regulajn trajtojn, kaj iliaj junaj fizionomioj esprimis gajecon kaj spritan ruzecon. Iliaj elegantaj, preskaŭ novaj vestoj, estis ta-

(1) despoblado : dezerto.

men strangaj. La diversaj partoj ne harmoniis inter si, kaj neniu ŝajnis farita por la korpo ĝin portanta. Ĉiu el ambaŭ junuloj ŝajnis kovrita per la senvestigaĵo de pluraĵoj nobeloj.

Ili rekonis ilian alparolinton.

- He! sinjor' Cervantes, kiel fartas via moŝto ?

- Kiu scias ridi, tiu ĉiam bone fartas... sed, junuloj, ŝajnas al mi, ke vi prosperas.

- Ni ne havas por plendi.

- Viaj vestoj estas multe pli riĉaj ol tiuj, kiujn mi vidis sur vi en Sevilo.

Ili kompare rigardis la malriĉan vestaĉon de Cervantes, kaj Rinconete respondis :

- Tial, sinjor' poeto, ke nia metio pli valoras ol via.

- Nur viaj afablaj vizaĝoj ebligis, ke mi vin rekonu.

- Tamen ni aliĝis, - glorie diris Cortadillo.

- Ni fariĝis viroj.

- Al ni kreskis la barbo.

- Vi estas, - diris Cervantes, - la efektivigo de du ĉarmaj promesoj. Kaj nun mi rimarkas kelkajn detalojn konservitajn el via antaŭa ekipaĵo. Se mi ne eraras, vi, sinjor' Cortadillo, daŭre portas vian malnovan tranĉilon kun tenilo el flava ligno, kaj vi, sinjoro Rinconete, estas fidela al via duonspado.

- La mano, - rimarkigis Rinconete, - amas la familieran tenilon, la konatan pezon, la gradon de forto kaj flekseblo, al kiu ĝi estas kutimiĝinta.

- Armilo jam uzita, - apogis Cortadillo, per unu mano karesante la flavlignan tenilon, kaj per la alia frapante sur la ŝultron de sia kunulo, - estas provita amiko, de kiu oni ne volonte disiĝus. Mi amas mian tranĉilon preskaŭ tiom, kiom mi amas Rinconete'n.

- Ankaŭ ili vin bone amas, - ameme diris la kamarado, - kaj ili rompiĝus antaŭ ol ĉesi vin defendi. Sinjoro Cervantes, eks-soldato, certe konas tiajn sentojn, kaj mi ne mirus, se la spado pendanta de lia balteo estus vidinta Lepanton.

- Ĉiuj batalantoj estas samaj, - konfesis la poeto, - kaj inkvizitoro, mi supozas, ne facile rezignus pri torturo kaj brulŝtiparo.

- Ankoraŭ malpli pri la konfiskoj, - rimarkigis Cortadillo kun simpatia rido.

- Permesu, sinjor' Cervantes, ke ni sidiĝu apud viro, kiun ni amas kaj admiras. Tiu ĉi korkokverko donas sufiĉe da

ombro por unu poeto kaj du ŝtelistoj.

- Ĝuste tial mi vokis vin, miaj junaj amikoj, se nur mi ne igas vin perdi altvaloran tempon.

- Heroa aŭ nepardonebla estus vojaĝanto, kiu, en ombro renkontante fantomon aŭ Cervantes'on, fonton de bonaj fabeloj, sin kredus urgata ĝis tia grado, ke li ne trinku. Post la bonaĵoj de la animo, la ĝojoj de l'spirito okupas la unuan rangon.

- Reciti sian rozarion en la daŭro de la semajno; legi kun laŭmerita zelo kaj respekto la belajn librojn ne garditajn de la libristo aŭ de la aĉetinto; aŭskulti, kiam okazis prezentigaĵoj, saĝajn inĝeniajn parolojn...

- Krom kiam spronas nin malsato, ni vicigas la korpon kaj la materiajn bezonojn post la cetero.

- Vi ĉiam estas, - aprobis Cervantes, - la samaj bravuloj, kiujn mi iam ekkonis.

- Pri tio ni rajtas fanfaroni. Neniam en vendredo ni ŝtelis.

- Neniam en sabato mi kuŝis kun virino portanta la respektigan nomon Maria.

- Kaj, mi supozas, vi ĉiam pie ekbruligis kandelegojn antaŭ iu pia bildo ?

- Tion, sinjoro, ni ne preterlasus eĉ pro la ŝarĝo de galiano. La servado al Dio kaj la zorgado pri nia savo estas, kiel konvene, niaj plej karaj okupoj.

- Ni estas honorindaj ŝtelistoj, timantaj Dion kaj nian konsciencon. Tial nia reputacio estas bonega inter la picaros.

- Vi iras, kredeble, al Madrido por la festo ?

- Aŭtodafeo, sinjoro, egalvaloras kvar foirojn. Tie, pli densa kaj pli okupita estas la amaso, en kiu oni povas detondi monsaketojn.

- Kaj tie oni gajnas indulgencojn.

- Profito por la animo kaj por la korpo, - deklaris Cervantes.

La konversacio turniĝis al rememoroj. Oni parolis pri Seviljo, pri ĝia polico tiel juste severa al herezuloj, tiel honesta al la ŝtelistoj, kiuj regule pagadas al ĝi la interkonsentitan tributon. Oni konsentis justajn laŭdojn al Sinjoro Manipodio, genia organizanto de la tuta sevila friponaro.

- Genia kaj justama, - diris Cortadillo. Neniam, en divido,

li malprofitigos la plej malgrandan, eĉ je unu maravedo.

- Necesas ja, ke la justeco estu ie, - rimarkigis Cervantes. Ĝi rifuĝis ĉe la ŝtelistoj.

Preskaŭ tiom laŭdata estis la brava Manferro, tiel nomita pro la fera mano anstataŭanta, ekstreme de lia brako, povran karnan manon detranĉitan de la ekzekutisto.

- Ankaŭ vi, Sinjoro Cervantes, - diris Rinconete, - perdis unu manon en viaj laboroj.

- Sed viajn laborojn kaj vian perditan manon vi malpli profitis ol Manferro.

- Tial, ke soldato estas malpli lerta ŝtelisto, kaj naive laboranta por aliaj.

- Mi konis soldatojn, kiuj sciis rabi, - milde asertis la poeto.

- Nia metio, - konsentis Cortadillo, - povas frukte ekzerci ĉie, kie estas homoj ion posedantaj, en armeo kiel en urbo, en milita atakgrimpoj kiel en aliaj murogrimpoj.

- koncerne la rarajn soldatojn, kiuj ne rabas por si mem,

- diris Cervantes, - kaj laboras nur por la reĝo, ili ne multe konsentas nomi sian laboron per la vorto ŝteli, ĉiam ili prononcas "konkeri".

- Honestuloj kiel ni, sinjor'poeto, ne kverelas pro unu vorto. Nur permesu al ni demandi, kiun profiton vi ricevis de la konkerita Portugalio.

- La soldato, - asertis Rinconete, - malsuperas nin laŭ alia punkto.

- Laŭ multaj aliaj punktoj, - ridante konsentis Cervantes.

- Pri kiu nome vi pensas, sinjor' ŝtelisto ?

- Ni prenas kiel eble plej multe, kaj ni detruas kiel eble plej malmulte. Alies malprofito, kiu ne profitigas nin per iu avantaĝo, ŝajnas al ni malbono. Ĉu ne estas intereso de ĉiuj, priŝtelatoj aŭ ŝtelantoj, ne malgrandigi la kvanton de la riĉaĵoj ? Sed soldato estas malbonfaranto : li bruligas, malkonstruas, detruas kaj fuŝas plimulte, ol li prenas.

- Mi ricevas plezuron, - diris Cervantes, - de interparolo kun sinjoroj ŝtelistoj. Ili estas, mi ja kredas, la solaj homoj, kiuj okaze havas honestajn pensojn.

- Sinjor'poeto, - diris Cortadillo, - ni amas kaj honoras vin pro multaj kialoj.

- Mi ĝojas pro la ideo, ilin aŭdi.

- Don Kihoto estas la plej bela libro, kiun mi konas. La

tagon, en kiu mi sukcesis eltiri ĝin el la poŝo de nobelo, mi faris plibonan aferon, ol se mi estus trovinta tridek dukatojn.

- Kiel malavaraj estas sinjoroj ŝtelistoj !
- Kaj vi tiel bone rakontis nian propran historion...
- La bona ekzemplo, - rimarkigis Cortadillo, - estas iel kontaga, kaj, dirante pri ni, sinjor' Cervantes fariĝis unu el ni.
- Li ja ŝtelis de ni pli ol unu vorton, kiu valorigas liajn Ekzemplodonajn Novelojn.
- Mi estas feliĉa kaj fierra, ke mi sukcesis priŝteli ŝtelistojn tiel subtilajn kaj tiel spertajn en sia metio. Sed, se mi prenis de vi kelkajn vortojn kaj frazojn, ĉu mi ne donis al vi aliajn ?
- Vi ŝtelis de ni veraĵon kaj donis falsajon.
- Vi estas la ingenia ŝtelisto, kiu levas arĝentosakon kaj anstataŭigas ĝin per sablosako.

La tri viroj interparolis kelkajn momentojn plu. Poste Cervantes ekstaris por daŭrigi sian vojiradon.

Nu, kiam li adiaŭis en plej ĝentilaj formoj, Cortadillo ekkriis :

- Mirinde! Sinjoro poeto, kiu havis ion por ŝteli.

Kaj li montris en gaja triumfo la pakon delikate levitan el la poŝo de Cervantes.

- Estas libro, kiun sendis al mi Monsinjoro de Toledo.
- La Granda Inkvizitoro !

Cortadillo krucoŝignis, metis devotajn lipojn sur la objekto, kiun ĝia deveno faris sankta, kaj respekte ĝin redonis.

Cervantes opiniis ĝentila devigo deligi la pakon antaŭ la vekita scivolemo de siaj junaj amikoj.

- Ni vidu, ĉu tiu libro povas utili al nia savo.

Sed li paliĝis kaj ekkriis. Li estis leginta neantaŭviditan titolon :

Dua Volumo de la Inĝenia Kavaliro don Kihoto de la Manĉo, enhavanta lian trian ekspedicion, laŭ licenciato Alonzo Fernandez de Avellaneda, naskita en la urbo Tordesillas.

La junuloj maldiskrete legis super la ŝultro de l'poeto. Cortadillo diris, en kvazaŭstrangolita rido :

- Sinjor'poeto, mi sentas min humiligita. Mi ja ne estis la unua, kiu sukcesis priŝteli vin.

Kaj Rinconete :

- Tiu Avellaneda priŝtelis la ruzulon inter la ruzuloj, la ŝtelinton mem de Rinconete kaj Cortadillo.

Ĉapitro Tria.

La sunlumo fluadis kiel rivero el fandita plumbo. En la lumtremeto, inter la kraketado de l'cikadoj, sona kaj monotona kiel bruo de kastanjetoj, la tero ŝajnis danci oni-ne-scias kian ŝanceliĝan dancon. Kun sia fermita ombrello sub la brako, Cervantes restis nesentema al la inkandesko de l'ĉielo, al la fornega ardo de la tero. Malserene, incitite, li turnadis kaj returnadis la volumon senditan de Monsinjoro Bernardo de Sandoval.

La perfida pruntopreno de la manuskripto de Don Kihoto far Aliaga tro klare diris la veran nomon de Avellaneda. Sed al kiu impulso obeis la plagiato ? La mono, kiun povas havigi literatura sukceso, ne estas sufiĉe peza por instigi ĝis laboro homon ŝarĝitan de profitoj kaj trinkantan el la fonto de ĉiaj favoroj, kiel la konfesanto de l' reĝo. Ĉu, cetere, la plej malgrava inter la hundoj de l' Sinjoro ne kutimas, nenion farante, ricevadi sian riĉan kaĉon ?

Cervantes legis la prologon de la falsa Don Kihoto, kaj li ruĝiĝis sub kaskado da insultoj.

Baldau, li pro malŝato levis la ŝultrojn.

- Tro nature estas, ke riĉa ŝtelisto insultas la malriĉulon, lin prirabante.

Avellaneda, per plej kruelaj vortoj, rememorigis al Cervantes liajn multajn malliberigojn. Li akuzis lin, ke li ricevis en karceroj kutimojn de malsocietemo, malmilda orgojlo, koleremo kaj misfamigemo. Li aludis la hezitojn de duko de Bejar antaŭ la dediĉo de la unua Don Kihoto, mokis la verkiston pro tio, ke inter la nobeloj li ne havas plu eĉ unu amikon, al kiu dediĉi siajn librojn. Li ofendmokis la blankan barbon de l'maljunulo, la kripoleon de l'soldato, al kiu restas "malpli da mano ol da lango".

Tiu insulta prologo senkonfuzo montris, ke la libro estas malame verkita. Cetere la malservo-deziro estis konfesa kun sovaĝaj senhonto kaj ĝojo. Avellaneda flatis al si, ke li forprenas de Cervantes la profiton, kiun li povis esperi daŭrigante sian romanon.

Verko de malalta malamo kaj de fia venĝemo. Verko de grupo da malamoj kaj de armeo da ĵaluzoj. La plumon tenis fray Aliaga. Sed kiom da aliaj stimulus lin, kaj, en malfacile taksebla mezuro, partoprenis en la malica laboro : la gala doktoro Blanco de Paz, kiu neniam pardonos sian propran fimalkuraĝon kaj sian propran perfidon al la perfidito; la enviema Lope de Vega; Bartolome de Argensola, heredanto de la kaŝmalica malamo de sia frato; ankaŭ aliaj. Ĉe la preterpaso, Cervantes per amara rido salutis malnovajn konataĵojn, iun sarkasmon iam pafitan de Blanco de Paz, iun insulton skribitan de Lope de Vega, iun subsugeston de la Argensolaj, kiuj, endormiginte lin per karesoj kaj promesoj, fie malservis lin ĉe grafo de Lemos.

Pli ol al insultoj lin persone celantaj, patro estas sentema al la batoj frapantaj liajn idojn. Al Cervantes estis malagrablega la misformigo de la persono de don Kihoto. La mallerto de la daŭriginto perdigis al la nobla kaj ingenia hidalgo ĉian inĝeniecon kaj ĉian noblecon. La kavaliro nun estis nur sengusta miksaĵo el banala malsaĝo kaj ridinda stulteco. Vulgara demenculo, kiu nenion povas instrui al leganto. Avellaneda ne komprenis, kio unika kaj grandanima estas en la frenezo kreita de Cervantes, lumo nova, kiu dispelas, kiel ekbatego, tenebrojn el kutimiĝado, kaj kiu vidigas al ni, en ekmiro, la trivialajn malaltajn frenezojn. Li ne sciis konservi al la kavaliro tiujn longajn intermitojn da prudento, sprito, gusto, ĝentileco, kiuj faras el li la plej amindan kaj respektindan el la hidalgos. La heroo de l'dominikano estis fuĝiga kiel dominikano. Kio restis el la delica lunatiko, en kiu mistere sin intermiksi ombroj kaj radioj, kaj kies poezia cerbo estas tuŝita nur en unu aŭ du punktoj de la malpeza fingro de fantazio? Kio restis el la heroo, kiu permesas al grandebela revo tiri lin al anakronisma kaj arda agado ? Jen estas kompakta, peza frenezulo, tute konsistanta el tenebroj kaj rampadoj, kies intelekto estas tute formangata de monomanio, kies malsano fluadas en salivaj, deliraj babiladoj. Mensa kriplulo, kiu povas interesi nur scienconan kompaton, kaj finiĝas en la lokoj, kie li ĉiam estus devinta resti, nome en frenezulejo.

Kun tia ĉefrolulo, la verko, kiel konjekteble, perdis ĉian trafopovon kaj ĉian signifon. Ĝi serĉadis la ridon palpeblinde, malofte ĝin renkontis, en plej malnoblaj regionoj,

en koto, kie nenia penso povas vivi. Turnante la pezajn paĝojn, Cervantes ekkriis pro ĉagreno : li vidis don Kihoton rezignantan ami Dulcinean de l'Toboso.

Li fermis la dikan libron, levis la ŝultrojn, skuis la kapon; kaj li marŝis enpenŝiginte, kun la lipoj misformitaj per naŭzogramaco.

Tamen, baldaŭ li denove eklegis. En lia animo la enuo batalis kontraŭ scivolo konsistanta el indigno, kun bezono scii, ĝis kiu grado atingos la stulteco de l'plagiatiso. Lian buŝon malfermis oscedo.

- Al sentalenta verkisto la karaktero de l'kavaliro estis malfacile tenebla. Sed mi estus supozinta, ke la lasta el la stultuloj estas kapabla ĉerpi ian profiton el la armilportisto. Ĉu do la dominikano malsuperas la lastan el la stultuloj ? Lia Sanĉo, pezulaĉo, drinkulo sen io plaĉa, besto aldoninda al la aro de la hundoj de l'Sinjoro. Li jam ne estas homo : felsakego, kruĉventro li estas.

Cervantes revis pri la ligilo simpatia, ĉiam ĉarma, iafoje kortuŝa, per kiu li kunligis siajn ambaŭ heroojn. Ĉe Avellaneda, kompreneble, tiu subtila belo forsvenis.

- Tiu demenculo kaj tiu stultulo vane rajdas unu apud la alia; mense ili dise staras je pli granda interdistanco ol aragona azeno kaj ŝtono de Sierra-Morena. Ili havas nenion por diri unu al la alia. Tial, kiam ili parolas, ili diras nur sensignifaĵojn, kiuj nek interbatiĝas, nek interkroĉiĝas.

Eble pli ol ĉio cetera, Barbara, maldeca kaj kruda karikaturado de la gracia Dorotea, naŭzis la poeton. Nu, tiu malbela aventuro daŭradis, tedege, ĝis la fino de la libro. - Ĉu iu estos tiel kuraĝa, legi tiom da senspritaĵoj ?

Kaj Avellaneda, neelĉerpebla fonto de kotaj stultaĵoj, anoncis plian serion da aventuroj! Li minacis konduki don Kihoton al Avila, al Valladolid, al Salamanca.

Nun la suno perpendikle sagĵetas siajn radiojn, pezajn bruligojn. Malgraŭ sia zorgabsorbo, Cervantes ilin sentis. Li fermis la malplaĉan volumon, malfermis la ombrelon. Kvankam neatentinte sian vojiradon, li tamen sciis, kie li estas, kaj kio ĉirkaŭe troviĝas.

Li forlasis la vojon, direktiĝis al malriĉa forlasita domo kun disfalanta tegmento. Apud la ruina domaĉo, du figarboj kaj kelkaj migdalarboj. La poeto, malsata, haltis ĉe la unua figarbo. La folioj estis sekaj kaj ŝrumpintaj kiel lamenoj el malsana metalo. La fruktoj, sensukaj, kris-

paj, prezentis nur cindrokolorajn tuberojn kaj kavojn. Levante la ŝultrojn, la poeto prenis unu, ĝin fendis. La interno estis polvo kaj insektaraĉo.

Cervantes metis la libron de Avellaneda inter la aliajn sensukajn foliojn kaj senpulpajn fruktojn. Ridante li sin demandis :

- Ĉu mia simbola gesto estas de poeto, aŭ de infano ?

La dua figarbo belege etendiĝis. Ĝiaj largaj intense verdaj folioj siluetis ombro-promontorojn, golfojn el moviĝanta helo. La fruktoj estis plenaj kaj bongustaj. Cervantes frande manĝis ilian parfumitan sukeron. Ankaŭ migdalojn li manĝis. Poste, sin sterninte sub la belan figarbon, li dormis longan sieston.

Vekiĝinte, li reprenis la libron. Li devis ĝin skui, blovi sur ĝin. Ĝi estis, kiel kadavro, invadita de insektoj. Pluraj, alteniĝemaj, obstine rezistis al surblovoj kaj skuoj. La poeto ŝiris branĉeton de sana arbo kaj, ridante, vergis per ĝi la falsan Don Kihoto'n.

Li ŝovis en sian zonon la ridindan volumon kaj apude la senmortan manuskripton. Siajn liberigitajn poŝojn li plenis per figoj kaj migdaloj. Poste, en la sunlumo malpli peza kaj jam oblikva, li reekmarŝis sian longan vojjon.

Liaj okuloj akrebrilis pro maliceto, kiel ĉiufoje, kiam lin vizitis amuza invento. Li marŝis ĝoje, gaje, preskaŭ ridegante. Baldaŭ li plene rideksplodis.

- Aliaga, - li diris, - dorna Aliaga, mi vin metos en vian rajtan lokon.

En li sin desegnis komika epizodo. Li vidis la gravan kavaliron kaj la ŝerceman armilportiston plej solene enirantajn en iun grandan urbon. Popolamaso ĉirkaŭis ilin per sia interpuŝiĝo kaj siaj aklamoj. Sed malicetaj buboj, traglitinte ĝis la rajdobestoj, ŝovis sub la voston de Rosinanta, sub la voston de la azeno, kelkajn vergetojn el ulekso. Kaj tiuj bubaĉetoj estis ne pli punitaj ol la konfesanto de l'reĝo. Ilia eleganta gesto restis anonima kiel lia. Ili haste retroiris, perdiĝis meze de komplika amaso. - En vian lokon, frato Ulekso, en vian propran lokon, sub la vosto de la azeno, en la pasejo de l'falanta fekaĵo !

Cervantes alvenis nokte en Esquivias. La vilaĝo estis dormanta. Li trovis la ŝlosilon de la dometo en la naiva kaŝloko, sub proksima ŝtono. Li blindpalpe eniris, blindpalpe li tute vestite sin ĵetis sur la liton.

Jam je ektagiĝo, lia febra rapida mano ekskribis la aventurojn de don Kihoto kaj Sanĉo, la solajn, tiujn, kiujn kreis la genio, pli veraj kaj aŭtentaj, ne nur ol la povraj imagaĵoj de iu Avellaneda, sed ankaŭ pli ol la ruinigaj riskemaĵoj de iu Karlo-Kvina aŭ la ruinigaj pezaj lanternaĵoj de iu Filipo Dua.

Ĉapitro Kvara.

Sur la apogilo de malfermita fenestro, en la freŝa matenkomenca helo, Cervantes skribis la ĝojajn farojn de l'Kavaliro. La kampuloj ekirantaj al la kamplaboroj pasante lin salutis, kaj li reciprokis per deziroj pri bona tago. Tiel etaj detalokazoj ne haltigis la ardan rajdadon, kaj la diskretaj hispanoj daŭrigis sian vojiron.

Apenaŭ la suno leviĝis, kaj jam, en la fruleviĝa Esquivias, ĉiuj sciis pri la ĉesto de l'poeto.

Kiel Seneko aŭ Kartezio, Cervantes estis el tiuj, kiujn pli ekscitas ol ĝenas la ekstera movado kaj bruado, se nur ili ne turniĝas rekte al la pensanto kaj ne postulas de li precizan reagon. En la dometo ne estis tablo, kaj ĉiam sur la fenestra apogilo laboris la poeto.

Arda estis la sezono. Baldaŭ li fermis la vitroklapojn kaj pendigis, kiel kurtenon, la litkovrilon.

Ĉu hazarde, ĉu intence, la improvizita kurteno ne atingis la plankon. Amanto de lumo kaj vivo, Cervantes vidis la sunhelon kaj la dombestojn invadi la strateton. La pasantoj, pli kaj pli maloftaj, ekvidis lin, jen klinitan super sia papero, jen distritan kaj gajigitan, tial ke koko altigis sian kreston pli ruĝan ol kolero, krenelan kiel kastelmuro.

Ĉirkaŭ la deka horo, iu haltis, frapis la fenestrovitron. Estis la gastejmastro. Cervantes, levante per sia kapo la kurtenon-kovrilon, faris per la mano la geston, kiu petas atendi, poste li kuris malfermi la pordon.

- Sinjor'Cervantes, - diris la vizitanto, - mi ne estus kontraŭ vi, kontraŭ Hispanio kaj Beletro, tiel malĝentila, ke mi longe interrompus vian laboron. Mi nur venas peti vin dividi kun mi kaj mia familio la tagmezan manĝon.

- Neeble, sinjoro.

- Do vi ne estos tiel kruela rifuzi ankaŭ por ĉi-vespero. Vi scias, kiel ni ŝatas tiun honoron kaj tiun plezuron. Vi scias...

- Mi scias, kara sinjoro, ke per viaj lipoj ĉiam parolas la koro. Kaj mi akceptas tiel simple, kiel vi oferas.

- Ju pli frue vi venos, sinjor'poeto, des pli intensa estos nia ĝojo, sentante ke ĝi daŭros.

La bona tavernestro glore aldonis :

- Mi kredas, ke la cetero ne estos malbona, kaj estos melongenoj kun fromaĝo kuiritaj.

Cervantes volis, kiam li estos forlasinta Esquivias'on, liveri al Juan de la Cueva la kompletan manuskripton de la dua Don Kihoto. Tial, kiel ĉiufoje, kiam lia restado estis longe daŭranta, li faris al si prudentan kondutplanon. Li laboros la tutan tagon senmanĝe, akceptante invitojn nur por la vespero. De longe kutimiĝinta al fasto kaj nereguleco, lia stomako sciis kontentiĝi per unu ĉiutaga manĝo. La gastinvitoj, tiele ŝparitaj, liveros la unikan manĝon dum sufiĉe longa tempo. Cetero, se iu tago restos sena, Cervantes iros nokte rabeti fruktojn.

Ĉu tial, ke la laciĝo igis lin forlasi la taskon, ĉu tial, ke li volis larĝe pagi sian parton per longdaŭra ĉesto tre profitdona al la drinkejmastro, Cervantes direktis sin al la gastejo du horojn antaŭ la vespermanĝo.

Proksimiĝante, li aŭdis la voĉon de la barbiro. Tio ne estis nuanca, supla kaj facila voĉo de parolanto. Estis la konstante laŭta voĉo de leganto iel monotona, sin turnanta al multopa aŭskultantaro. Kelkaj vortoj aŭditaj ridetigis la poeton.

Li malfermis la pordon de la ĉambrego lerte ŝirmata kontraŭ varmeĝo kaj troa lumo. Liaj okuloj, ankoraŭ ne kutimiĝintaj al la duonhelo, pli konjektis ol vidis amasosvarmon. Kaj tie, en la loko, kien la solena voĉo altiris la blindserĉon de l'rigardo, li divenis, pli ol li vidis, surpriziĝan, ŝtelrapidan geston; la geston, kiu, meze de maltrankvila subita silento, ion ekkasas.

- Sinjor'barbiro, - li gaje diris, - via diskreteco estas neutila. La ĝentileco de Monsinjoro de Toledo, diferenca de via ĝentileco, ne ebligis, ke mi ne sciu tion, kion vi intencas kaŝi. Mi legis la libron de Avellaneda.

- Libro tiel malnobla per la intenco kiel stulta per la efektivigo, - respondis majstro Tomas Avlador.

La maljuna soldato Rafael de la Rapita faris geston minacan :

- Li meritas, tiu Avellaneda, ke oni detranĉu de li, almenaŭ, la orelojn. Ĉu vi scias, sinjor'Cervantes, kiu senkuragulaĉo ekkauris, por meti siajn fekaĵojn, malantaŭ la vepro de tiu pseŭdonimo ?

Vasta murmuro kaj signifaj kapbalancoj asociis la amason al la vortoj de majstro Tomas kaj de Rafael de la

Rapita.

Se Cervantes nomus la kulpulon, li strange malvarmigus zelon kaj indignon. Kion faras konfesanto de l'Reĝo, ĉu tio povas resti malbona al la opinio de tiel naive obeemaj katolikoj ? Ĉu ne pli probable la aŭtoritato de la persono kredindigus la kalumniojn ?

- La aŭtoro de tiuj fuŝaĵoj, - singarde diris la poeto, - estas aragonano.

- Kiel vi tion scias ? - demandis, ekskuite, majstro Tomas, kies edzino estis virino el Aragono.

- Estu tiel afabla pruntedoni al mi la volumon, kaj post du minutoj vi scios tiom, kiom mi.

La barbiro obeis la deziron de Cervantes, kaj Cervantes malfermis la libron senelekte.

Li laŭtlegis paĝon, rimarkigante kelkajn provincialismojn, iujn nekorektaĵojn, kiujn neniam pekus verkisto naskita en Kastilio, kaj precipe tre aragonajn flanklasojn de la artikolo.

Malgajigita pro tio, ke Avellaneda estas aragonano kiel la familio de lia edzino, Avlador estis ankoraŭ pli mal-kontenta, ke oni nescias la veran nomon de la plagiato. La malestimo, ne povante celi individuon, iel etendiĝis al tuta provinco. Tia estas la justo de l'homoj.

Rafael de la Rapita, kiel juna soldato, estis, pli ol la aliaj, kutimiĝinta malami kolektivojn. La aragonanoj fariĝis "la malamiko". Li grumblis kontraŭ ilin precizajn insultojn kaj malprecizajn minacojn.

Majstro Tomas rimarkigis, ke ĉie estas bonuloj. Tiu vero ĉesas esti populara, tuj kiam estas ekscititaj la naciaj aŭ provincaj malamoj.

- Ĉu inter la maŭroj estas bonuloj ? - murmuris iu malbonhumore.

Kaj alia :

- Ĉu ne ĉiuj portugaloj estas frenezaj ?

Per interjekcioj kaj demandoj pli asertaj ol amasigo de asertoj, Rafael de la Rapita starigis inter kastilianoj kaj aragonanoj pasian paralelaĵon. Ĉiuj virtoj estis rendevuintaj en Kastilio; ĉiuj malvirtoj, en Aragono.

La kastilia aŭskultantaro aplaudis. Sur la lipoj de Cervantes alternis la maliceta rideto de observanto, la melankolia rideto de grandkora homo.

Incitite, embarasite, konjektante, ke rekta repliko le-

vus huadon, la barbiro sentis siajn nervojn krispiĝi.

En li fariĝis stranga laboro. Lin invadis ia simpatio al tiu Avellaneda, kiun tiel severe mallaŭdis lia konscienco, antaŭ ol scii, ke li estas aragonano, antaŭ, precipe, ol pro li oni solidare kondamnis tutan Aragonon.

Li diris :

- Ni penu esti justaj kontraŭ ĉiuj. Ja certe, Avellaneda estas kulpa, kaj la honestuloj el ĉiuj provincoj - ĉar en ĉiuj provincoj estas honestuloj - lin repuŝos kaj malkonfesos kiel sian.

La amaso eksplodis :

- Li estas fikompatindulo.
- La lasta el la homoj.
- La plej aĉa el la rabistoj.

Kaj Rafael de la Rapita :

- Por ĉion diri : aragonano.

La barbiro reparolis :

- La plej aĉajn banditojn oni ne kondamnas ne aŭdinte ilian defendon. Do lasu min, se eĉ nur iel lude, pledi la aferon de Avellaneda.

- Ne tre honesta ludo !

- Mi ne pelos mian bravecon, kaj, se vi permesas, ke mi tiel esprimu, mian donkiĥotismon, ĝis pretendo, ke la akuzito estas nekulpa. Sed eble mi eltrovos en lia afero kelkajn malpligravigajn cirkonstancojn. Ni flegme pristudu la specan kazon, kaj, sen eĉ postuli la ordinaran antaŭsupozon pri senkulpeco, ni almenaŭ supozu, provizore...

Vane la barbiro strebis multigi la jurajn terminojn, transformi la disputon en parodion kaj amuzaĵon. Neniu konsentis kunludi.

Iu ekkriis plej serioze :

- Kiaj cirkonstancoj povus malpligravigi tian krimon ?

Kaj Rafael de la Rapita, tre altigante sur longiĝanta kolo sian malgrandan kapon :

- Trovi malpligravigajn cirkonstancojn al aragonano !

Majstro Tomas, ordinare supla oratoro, sin returnis pene kaj mallerte :

- Krimon povas akompani pligravigaj cirkonstancoj.

- Tiujn cirkonstancojn, ni ĉiuj retrovos ĉi tie.

Estis ankoraŭ Rafael, kiu asertis, sen ombro de hezito.

- Kion vi scias ? - demandis la barbiro. Vi nescias, kiu estas Avellaneda, kaj kiuj motivoj lin agigis.

Pluraj replikis antaŭ Rafael :

- Nur tro klara estas lia prologo.
- Li estas enkarnigita demono de envio.
- Li volis malhelpi, ke Cervantes kolektu sian rikolton.
- Li elrabis alies kampon.

Sed Sinjoro de la Rapita, pli nereplikeble :

- La aragonano agis aragonane; estas ĉion diri.

Kun malpacienca ekmovo, majstro Tomas sin turnis al la gastejmastro :

- Ĉu vi bonvolas, - li diris, - momenton pruntedoni al mi vian Don Kihoto'n ?

La gastejmastro petis la libron de sia edzino, kiu kuris preni ĝin.

Dume la malbenoj kontraŭ la aragonanon pludaŭris, eble elĉerpiĝis.

La barbiro, ricevinte la libron, ĝin levis per afekta gesto kaj demandis :

- Ĉu vi bonvolas permesi, sinjoroj, ke mi laŭtlege paŝon el la majstroverko, kiun ni amas ?
- Legu, - diris kelkiuj.

Sed Rafael :

- Ĉar Cervantes estas meze de ni, ni preferus aŭdi la voĉon de Cervantes mem.

- Sinjoro Cervantes, sendube, bonvolos post la vespermanĝo rakonti al ni unu el tiuj fabeloj, kiuj nin ravas. Sed li estas laborinta, se mi scias kalkuli, dek-kvinon da horoj. Ni lasu al li momenton da interripozo.

La okuloj sin turnis al la poeto. Li havis premitecan sintenon, la sintenon de laceco, kiu momente forgesas sin kaŝi.

Li sentis la rigardojn sur li. Kun rigida, kvazaŭ grincaca energio, li rektigis buston, kiu kurbiĝis kaj kunpremiĝis, kaj li revokis la rideton al siaj misformitaj lipoj.

Majstro Tomas, tenante la libron malfermita, ŝajnis voli komenci sian legadon. Sed majstro Tomas ne eklegis.

La malfermita libro estis en liaj manoj nur ŝajnigo kaj oratora ruzo. Li memore citis la lastan prozlinion. Malprecize kaj senpromese donas al ĝi "esperon pri tria eliro de don Kihoto". Poste la barbiro sonigis emfaze la version, pruntitan de Ariosto, per kiu finiĝas la volumo :

Forsi altro canterà con miglior plettro (1)

(1) Eble alia kantos kun (akompano de) plibona plektro.

- Ne, sinjoro Cervantes, - ekkriis la elokventa Avlador, - neniu plektro estas plibona ol via, neniu mano pli sciplena, neniu liro pli riĉa, pli supla, pli lerta por nin eksciti, jen ĝis larmoj, jen ĝis admiro, jen pli ofte ĝis rido kaj ĝojo. Neniu plibone ol vi scias konduki nin, tra misteraj vojetoj, al pensanta revo, al revanta penso. Ni, kiuj konas vin, ni, kies avida espero sekvas de sezono al sezono viajn laborojn kiel la laboron de Dio en niaj kampoj, ni komprenas, kiom da rideto kaj ironio kuŝas en la stranga finaĵo, en kiu vi ŝajnas, ne provizore pendigi, sed lasi fali la instrumenton. Ni tamen provpenu meti nin en la lokon de fremdulo, de iu loĝanta for de Madrid kaj de Esquivias, ekzemple en Aragono. Li pripensas, tiu fremdulo, ke Don Kihoto aperis jam antaŭ dek jaroj. De tiam la aŭtoro publikigis aliajn verkojn kaj ŝajnas esti forgesinta tiun ĉi, tiel profunde, kiel certan Galatea'n, nefinitan de kvaronjarcento. Sed ĉu li ne rigardas sian Don Kihoto'n kiel kompletan? Inter la okazoj gajigantaj la romanon, ĉu estas eĉ unu, kiu ne ricevis sian konkludon? Sekvo estas ebla; nenio igas ĝin necesa. Per sia longa silentado kaj per siaj aliaj laboroj, la aŭtoro montras, ke neniam li intencis ĝin skribi, aŭ ke li rezignis pri tiu intenco. La fremdulo, pri kiu mi parolas, aŭdis kiel inviton al sprituloj tiun strangan, tiun signifoplenan:

Forsi altro canterà con miglior plettro.

Koncerne min, mi konfesas, se mi vivus for de tie ĉi, se neniam mi estus renkontinta sinjoron Cervantes, kaj se mi kredus havi verktalenton, mi estus sentinta la deziron respondi al lia voko, esti tiu "altro", kiun li ŝajne deziras, fari tion, kion li ne faras, ĉerpi el la mirinda invento tion, kion la aŭtoro neglektas ĉerpi.

- Kaj insulti lin por pagi vian ŝuldon?

- Kiel vi, pli ol vi, se eble, mi kondamnas la insultojn entenatajn en la prologo. Ili evidentigas malnoblan animon.

Sed la ideo mem daŭrigi la Don Kihoto'n povis ekveni en noblan kaj grandaniman spiriton.

- Do ankaŭ vi estus pelinta la grandanimecon ĝis trudprano de alies apartenaĵo?

- Temas pri apartenaĵo, kiu ŝajnas forlasita, kaj kies rikolton povas postuli la publiko.

- La aragonano havis kiel unuan devon informiĝi, peti permeson de la proprietulo. Sed tiu senhonta plagiato...

- Ni ne forgesu, sinjoro, ke ĉiam kavalirromano estis verko de pluraj aŭtoroj. Amadis de Gallio, kiun sinjoro Cervantes tiel juste nomas "la unua kaj plejbona libro tiu-speca", konsistas el dek du ĉapitroj skribitaj de dek du diversaj plumoj. Kaj tiu ekzemplo estis senescepte sekvita. Ĉu la Rolando mem de Ariosto ne daŭrigas...

- Kion tio pruvas ? - diris Rafael de la Rapita, levante, ambaŭflanke de l'senkarna kolo, siajn pintajn ŝultrojn.

- Tio pruvas, ke, se la nova Gil Polo... Sinjoro Cervantes multe amas Gil Polo'n, kaj, kvankam lia Amanta Diano estas la sekvo al verko inventita de alia poeto, Cervantes deklaras ĝin tiel altvalora, kiel se ĝi estus verkita de Apolono mem... Se do la hodiaŭa Gil Polo havus la talenton de la antikva, se lia libro egalvalorus laŭ invento kaj stilo tiun, kiun ĝi pretendas daŭrigi, se, anstataŭ insulti sian Jorge de Montemayor'on, li pagus al li rajtan tributon el laŭdoj, ankaŭ ni adresus al li gratulojn kaj dankojn. Kaj eble, ja, ni ŝuldas al li, inter niaj malaprobaj pro lia sendankemo kaj niaj mokridoj pro la misaj partoj en lia libro, kelkajn dankojn.

- Vi ja havas aŭdacon...

- Aŭdacon de barbiro.

Kaj Rafael de la Rapita :

- Aŭdacon de viro, kiu iris edziĝi en Aragono.

Majstro Tomas ekiĝis ruĝa kiel papriko. Kaj li kriis :

- Ni ne estu sendankaj eĉ kontraŭ sendankuloj ! Ni ne imitu kontraŭ Avellaneda la sintenon de Avellaneda kontraŭ Cervantes.

- Ĉesu, duon-aragonano, viajn insultajn komparojn.

- Ni ne faru mem tion, kion ni mallaŭdas en aliulo. Ni ne kulpu maljuston kontraŭ la plej aĉan el la maljustuloj. Avellaneda kulpis neniun realan malbonon.

- Pri malbono vi estas ja postulema.

- Liaj fimalaktaj insultoj povas nur pligrandigi nian respekton kaj nian admiron al la fenikso de l'sprituloj.

- Ĉu vi estas certa, ke tion ja deziris la aragonano ?

- Krome, la ridinda verkaĉo ekscitos la Majstron, instigos lin pli rapide skribi la novan ĉefverkon.

Cervantes gaje diris :

- Mi obeos al justo kaj al majstro Tomas. Mi dankesprimas al Avellaneda. Lia afabla spronbato igos Rosinantan, la azenon kaj min kuri ĝis la fino de la kurvojo.

La aŭskultantaro rideksplodis. Kaj la barbiro, sin asociante, por profiti el ĝi, al la ĝenerala ridgajo :

- Ni kunigu niajn dankojn kun tiuj de sinjoro Cervantes. Dank'al Avellaneda, ni baldaŭ legos...

Sed la senindulga Rafael de la Rapita :

- Dank'al Judaso, Jesuo savis la mondon. Anstataŭ ĉiam adori la nuran Jesuon, do iom adoru lian altvaloran kunlaborinton, kaj gloru la kison, kiu malfermis al la homaro la pordojn de l'ĉielo.

Majstro Tomas, suple kaj ne lasante sian ridon estingi :

- Neniam ni forgesu, karaj amikoj, en kia grado malbono estas necesa al la praktikado de bono. La maliculo, ankaŭ tion ni ne forgesu, estas blindulo, kiu iafaje plenumas bonon, kredante realigi malbonon.

- Kion vi intencas diri, reĝo de l'babeluloj ?

- Tiu, kiu pro malamo aŭ venĝemo, tondis la viton de sia najbaro kaj unuafaje plorigis la vitbranĉojn, tiu riĉigis la malamatan najbaron, riĉigis la tutan estontecon. Feliĉa kulpo! dirus Sankta Aŭgusteno. Feliĉa kulpo ankaŭ, tiu de Avellaneda. Li kredis ŝteli, kaj li donis.

- Mi ŝatus scii, kion li donis.

- Impeton kaj kuraĝon... Eble ankaŭ ion alian. Eĉ la stulteco povas esti inspira al genio. Ankaŭ li tondis vitojn, kiuj portos duoblan vinberrikolton.

- Kiel admirinda predikanto vi estus estinta! - ekkriis la tavernisto, versaŭte por trinki al majstro Tomas.

Sed Rafael de la Rapita, ne sen prezenti sian propran glason :

- Se majstro Tomas estus predikanto, li ĉiam estus tio, kio li nun estas, nome la advokato de l'diablo.

De post la rapida interveno de Cervantes, la diskutado, ĝis tiam akra kaj drasta, fariĝis rida kaj amuza. Eĉ Rafael de la Rapita nur iumomente retrovis sian ordinaran mildon.

Avlador, trinkinte, reparolis :

- La koko de la fablo renkontis perlon en la sterko. Lasu min disgrati la kotamason kolektitan de Avellaneda. Se ni estus en ĝi eltrovontaj iun perlon de invento...

- Atendu, gratisto, antaŭ ol grati kaj disŝuti vian aragonan sterkon. Lasu al ni la tempon ŝtopi nian nazon.

Cervantes vokis filon de la gastejestro, donis al li la

ŝlosilon de sia domo, mallaŭte diris al li kelkajn instrukciojn.

La lerta barbiro svingis, kun ridema afekto, la volumon de Avellaneda.

- Jen estas, - li diris, - la sterkamaso. Nun kiam vi povis antaŭzorgi kontraŭ la parfumojn, kiujn mi levos, mi tremante komencas mian serĉadon. Eble mi trovos nek perlon nek miligrajnon. Eble, kiam mi min ĵetegas al io brila, mi renkontos nur pajleron.

La lerta oratoro, al kiu ne mankis literatura gusto, komence flatis la opinion de sia aŭskultantaro, rimarkigis kelkajn malbonaĵojn de la verko.

- La kavaliro de nia granda amiko estas belega spiko staranta sur longa tigo; en sunlumo de justamo kaj kuraĝo, sub vento de nobla demenco, li balancas kapon ankoraŭ pli plenan je nutraĵo ol hirtan de frenezaj pikaĵoj. La don Kihoto de Avellaneda, ho ve! jam ne estas io alia ol pajlo kaj pikaĵoj. Malplena kapo, lia senharmonia agitado, abrupteskuo, rompas tigon sekan kaj senfortan.

Oni aplaudis. La kritikanto, per multigataj ekzemploj, montris, kiel vulgara, absurda, sensignifa kaj seninstrua estas la malsaĝo de l'falsa don Kihoto. Li levis la ŝultr-ojn, kiam la stulta naivulo imagas, sen ombro de preteksto, ke li estas Akilo. Li malŝate paŭtis, kiam la kavaliro, sen iu incitanta cirkonstanco, prenas por Rolando kampulon sur ties melonejo. Li ridis pri lia stulteco, kiu lin igas nomi Romo vilaĝon dekkvinhejman; kiu lin igas saluti la unue renkontitan pastron alterne per la nomoj Lirgando aŭ arkiepiskopo Turpeno.

Li same priridis la Sanĉon de Avellaneda, trivialigitan, plipezigitan, senigitan je sia gustoplena prudento, samkiel lia mastro estas senigita je sia bela entuziasmo, je la grandanima ardo, la vastaj pensoj kaj la ingeniaj paroladoj.

Tro okupite aŭskulti la elokventan barbiron, la aŭskultantoj ne rimarkis la filon de l'gastejmastro, kiu ŝtelmove reeniris kaj transdonis manuskripton al Cervantes.

Transpasante al detaloj, majstro Tomas signis la mal-lertajn, malriĉajn imitojn de la unua parto. Li longe montris, kiel la epizodo de la anseroj ripetas en Avellaneda la epizodon de la kaproj, kiun Cervantes rakontigis de Sanĉo, kaj kiel la plagiatanto, kredante plibonigi sian

modelon, difektas kaj misformas ĝin.

Kiam li estis sufiĉe karesinta la sentojn de sia publiko, la lerta oratoro kredis, ke li povos montri en la kondamnita libro kelkajn eltrovojn kaj kelkajn intencojn.

Li laŭtlegis la aventuron de vojaĝantaj aktoroj, kiuj prezentas en gastejo dramon de Lope de Vega. Oni simpatie ridis. La barbiro, valorigante ĉion amuzan en la invento de la epizodo, eĉ atentigis pri ia lerteco en la aranĝo de la sceno. Poste li ekkriis :

- Se sinjoro Cervantes estus ricevinta tian ideon, kian profiton li estus ĉerpinta el ĝi !

- Aŭskultu, - milde diris Cervantes, - la profiton, kiun mi ĉerpis el ĝi kelkan tempon antaŭ sinjoro Avellaneda.

En ĉies grandiganta ĝojo, inter ridoj kaj aplaŭdoj, li laŭtlegis la historion pri Maese Pedro, la montristo de marionetoj.

- Jen estas alia afero ol via Avellaneda ! - oni kriis al majstro Tomas.

- Jen bona rido, ne el Aragono venanta !

- Tio estas senfalsa kiel Esquivias-vino !

La barbiro kliniĝis. Poste, foliumante la libron, aŭ, kiel li diris, prifosante la sterkamason, li serĉis la mistifikaĵojn spertitajn de don Kihoto ĉe don Alvare Tarfe. Li laŭtlegis kelkajn, kiuj gajigis.

Sed Cervantes siavice legis, tiel similajn kaj tiel superajn, - graciajn, spritajn kaj belajn fratinojn de kelkaj ridantaj maritornoj, - la respondajn aventurojn ĉe la gedukoj.

Plu daŭris la stranga duelo. Ĉiufoje, kiam Avlador eltrovis inĝenian kaj malkompletan rakonton, Cervantes kontraŭmetis la saman rakonton ekvilibrantan, potencon, ĝis majstroverko pelitan.

Fine, la venkita barbiro demandis :

- Sed do, Avellaneda ja legis vian manuskripton ?

- Krom miraklo, ja verŝajne.

- Tiaokaze, ŝajnas al mi malfacile, ke vi nesciu, kiu estas Avellaneda.

- Se mi konus la veran nomon de l'plagiatisto, eble mi estus sufiĉe grandanima por ne sciigi pri ĝi.

- Jen kion mi nomas maltaŭge lokita grandanimeco, - grumbliis Rafael de la Rapita, svingante siajn ambaŭ sekajn manojn ĉe la alto de siaj malgrandaj okuloj.

- Kaj kruela al senkulpuloj. Por domaĝi kulpulon, vi mal-honoras milojn da aragonanoj.

- Ne tiom da miloj, - diris Rafael. Mi suspektas, ke mal-multaj el tiuj azenoj scias skribi kiel iu Avellaneda.

- Ankaŭ kelkaj, - replikis majstro Tomas, - scias ĝuste uzi la artikolon.

Kaj, ektrovante la plej admirindan kaj konvinkan el la argumentoj :

- Ĉu vi kredas, ekzemple, ke la konfesanto de l'reĝo, se li sin miksus en verkadon...

Sed Rafael de la Rapita levis la ŝultrojn :

- Pastro, - li grave diris, - ne estas plu aragonano. Samkiel la bapto lavas la originan kulpon, la ordina sakramento kaj la sankteco de la vivo faras el ĉiu bona pastro nobelon kaj kastilianon.

Oni insistis kelkan tempon por elpeti la nomon de la plagiatisto. La poeto multigis la respondojn ŝercajn kaj evitajn.

- Sinjoro, - fine diris la barbiro, - ni fariĝas maldiskretaj, kaj jam de longe forpasis la vespermanĝa horo. Kredeble ĉio estas brulinta en ĉiuj niaj kuirejoj.

La amaso eliris, promesante al si reveni post unu horo.

Alveninte ekstere, majstro Tomas deklaris kun mistera mieno :

- Neutile peti de Cervantes la nomon de l'plagiatisto. Mi fine komprenis, kial li neniam ĝin diros.

- Sciigu al ni tiun teruran sekreton.

- La konfeso estus al li tro afliktiga.

- Kion vi intencas subkomprenigi ?

- Cetere, ni ĉiuj konas tiun nomon.

- Do oni povas ion scii senkonscie.

- Avellaneda, aŭskultu, nomiĝas Avellaneda. Kaj li estas parenco de glorfama amiko.

- Kion vi diras ?

- La nomo Saavedra, kiun sinjoro Cervantes aldonis al sia, apartenis al lia prapraavino.

- Li ja ĉion scias, tiu gratisto de mentonoj kaj de sterko! Jen li estas klera pri geneologio !

- La prapraavino, pri kiu mi diras, filino de don Juan Arias de Saavedra, nomiĝis Juana Avellaneda. Ŝi edziniĝis al don Diego de Cervantes, komandoro de la ordeno de Sankta-Jakobo, praavo de la poeto, kiun ni amas.

La informo donita de la erudicia barbiro estis ekzakta. Sed tiam jam ne ekzistis iu havanta la nomon Avellaneda.

Impresitaj de la deveno de la subskribo, la Esquivias'anoj, ekde tiam, plej zorgeme evitis nomi en ĉeesto de Cervantes homon, kies perfido certe estis al li tiel malagrabla.

- Kiel malfeliĉe, - konvinkite diris Rafael de la Rapita, - ke la plej granda el la verkistoj, la plej brava el la soldatoj kaj la plej bona el la kastilianoj havas parencojn en Aragono !

Li aldonis, balancante, ĉe l'ekstremaĵo de longa kolo, ne ridetantan kapon :

- Ja certe, neniu estas perfekta.

Ĉapitro Kvina.

Post la manĝo, la gastejmastero, helpate de sia edzino kaj de siaj filoj, elmetis la tablojn kaj seĝojn, aranĝis la glasojn kaj potojn.

En familioj aŭ amikaj grupoj, la tuta vilaĝo alvenis, avida aŭdi iun rakonton de Cervantes.

En la delikata malvarmeto de la komenciĝanta nokto, Cervantes rakontis la historion de sia kaptiteco ĉe la berberianoj. En la lumo de plena luno kaj la vasta trembrilo de la unuaj steloj, la luno estis nur tenera helo kaj reva rideto.

Aŭskultu, kion diris la poeto :

- Pli malfrua estis la sezono, kaj septembro preskaŭ forpasinta. Sed la nokta ĉielo elvolviĝis, belega kaj vasta, simila al la nokto, kiu, en tiu ĉi momento, se mi aŭdacas diri, nin lumigas.

"La apenaŭ plaŭda mildo de la maro murmuris, kiel amantina voĉo, ĉiajn esperojn kaj ĉiajn feliĉojn. Mi interparolis pri estonteco kaj gloro kun mia frato Rodrigo. Mi kredis pri la blujaj kantantaj promesoj de l'ĉielo, de la astroj, de l'zefiro, de la akvo kaj de la ondetoj. Mi kunportis por la Reĝo kaj por la ministroj leterojn, en kiuj miaj modestaj servoj estis laŭditaj kun troa grandanimo, ne nur de la glorfama duko de Sesa, sed ankaŭ de don Juan de Aŭstrio, la plej noble granda el la herooj. Tiuj leteroj ŝajnis al mi breveto de kapitano. Mi jam parolis pri "mia roto", kvazaŭ mi estus jam de jaroj ĝin komandanta.

"Nia galero portis nomon tiel radiantan kiel miaj pensoj. Tiu nomo estis "La Suno". Mi ne suspektis, ke tiu suno havas kiel ombron kaj nubon mian destinon.

"Ni estis en viddistanco al Ĝenovo, kiam subite nin ĉirkaŭas tuta eskadro da korsaroj, dek kvin ŝipoj.

"Nek sur tero nek sur maro la hispana soldato facile konsentas cedi kontraŭ la nombro. Tie ĉi, eĉ la fuĝo povis nur per malegala, glora batalo malfermi al si vojon. Tio estis unu el tiuj okazoj, en kiuj la singardemo laŭtigas la voĉon kaj ordonas esti maltima.

"La vento estis favora. La kapitano decidis kuri al la malamiko. Pafante per ĉiuj siaj kanonoj, li esperis rompi

la linion de la sieĝantoj. Plej prudentaj dispozicioj estis faritaj. Pedro de Diaz komandis la babordan artilerion. Mi havis la honoron estri la babordan.

"La Sinjoro, ho ve! volis puni nin pro niaj pekoj. En la momento, kiam estis komencota la manovro, de kiu ni atendis nian savon, jen falas la vento. Senmovigitaj pro volo de l'ĉielo inter dekkvinoble pli multaj malamikoj, ni forlasas nek kuraĝon nek esperon. Eble, tre baldaŭ, denove sin levos la vento, Eble, tre baldaŭ, helpemaj veloj florornamos la horizonton.

"Dek ses horojn ni batalis. Tiel longe, kiam estis sur la galero unu pafaĵo kaj unu pinĉpreno da pulvo. Unu alĝeria ŝipo estis dronigita; pluraj difektitaj. Kadavroj de piratoj embarasis la ferdekojn kaj plenigis la ebenan surfacon de l'maro. Sed ni havis neniom plu da municioj; sed de ĉiuj flankoj envenis akvo en niajn ŝipojn; sed tri kvaronoj el ni jam dormis sian eternan dormon aŭ baraktis en agonio. Necesis kapitulaci.

"La leteroj de don Juan de Aŭstrio kaj de duko de Sesa kaŭzis al mi pli da malbono ol mi esperis da bono. La bombastaj laŭdoj, kiujn ili enhavis, persvadis la korsarojn, ke la povra soldato Cervantes estas konsiderinda persono, kaj ke el li oni tiros dikan elaçetpagon. Admiralo Dalmami tenis min en sia batalakira parto. Sama sorto trafis mian fraton Rodrigon.

"En Alĝero, oni ĉion faris por plipezigi mian bedaŭron pri libereco kaj mian sopiron al reaĉeto. Oni ĵetis min, ŝarĝitan per katenoj, en unu el tiuj profundaj fosaĵoj, en kiu la aero estas densa de mallumo kaj de pezaj fetoroj, sur kies fundo kaj vandoj svarmas parazitaĉoj, kaj kiuj estas nomataj mazmorras. El tie ĉiutage kelkajn horojn mi estis tiritita por mueli maizon en brakmuelilo. Dum tiu brutpeniga laboro, mi rimarkis ĉirkaŭ mi, inter tiom da preme malĝojaj vizaĝoj de kaptitoj, kelkajn sen nazo kaj sen oreloj. Tiuj estis kompatindaj kristanoj punitaj pro elŝteliĝoprovo.

"Mi estis ankoraŭ en la aĝo, en kiu danĝero estas voko pli loga eĉ ol amo. Sed la subkaŝataj, detalzorgaj, enplektitaj ĝojoj de l'ruzo devis antaŭi la voluptojn de agado, potencajn kaj elvolviĝantajn.

"Mi sukcesis aspekti plej obeema kaptito. La elŝprucoj de mia delira naturo, helpataj de mia daŭra strebado, mon-

tris min ankaŭ kiel la plej gajan kaj senzorgan el ĉiuj homoj.

"Mi ridis kun la maŭroj. Mi senkolere diskutis kun ili pri religiaj temoj. Mi zorge malarmis mian ŝercadon je ĉiu pikilo kaj je ĉiu veneno. Iafoje, mi faris al la amuzataj berberianoj paroladojn bombaste komikajn; kiel la amuzistoj de l'reĝoj, mi ŝovis, inter emfazaj deliraĵoj kaj burleskaĵoj, kelkajn lecionojn pri saĝeco, grandanim-eco kaj korkompatemo. Pli ofte mi inventis fabelojn por tiuj homoj, kiujn fabeloj admirigas. Sed mia ŝajna malzorgemo aŭskultadis ĉion diratan ĉirkaŭ mi; mia memoro konservis la utilajn informojn. Mi gvatis la okazon kiel senmova rabobesto gvatas, sub ŝajne fermitaj palpebroj, la predon, pli-malpli frue pasontan.

"Mi estis skribinta al mia familio por peti, ke ĝi el-aĉetu Rodrigon kaj min. Sed mi ne forgesis pri la malriĉeco de mia parencaro, kaj mi nenion atendis krom de mia inĝenio kaj de mia kuraĝo. Mi ĉerpadis mian forton el mia malespero mem, el la sento, ke la morto estas preferinda ol la daŭrigo de tia vivo.

"Pli kaj pli mi ŝajnis modela sklavo, kiu rezignacias kaj endormiĝas en servuteco kiel bona katoliko en la sekur-eco de l'dogmo. Mi kaŝis mian suferon kaj miajn intencojn sub ridanta masko. Sed mia penso orientiĝis, se tiel diri, al okcidento. Mi revadis pri Orano okupata de niaj trupoj, kiel marveturanto en ŝtormo perdita serĉas la nordan ste-lon.

"Du vojoj al Orano. Unu, mallonga kaj facila, sed ĝi necesigas la posedon de ŝipo. La alia, peniga, longa, barata de senakvaj sabloj, trarabata de sovaĝaj bestoj kaj de mahometanaj rajdistoj. Tiu ĉi necesigas nur bonajn kru-rojn, paciencon kaj kuraĝon : provizoj malpli multekostaj ol ŝipo. Do la teran vojon mi elektis, aŭ pliĝuste la ne-ceso elektis por mi.

"La atentemo de miaj gardistoj iomete duondormiĝis en la tintado de miaj ridoj, en la lulkantoj de miaj rakontoj. Ni estis dekduope forirontaj. Eble kelkaj el vi konis iujn el miaj bravaj kunuloj, Bertran del Salto y Castillo, ka-pitano Francisco de Meneses, leŭtenantoj Rios kaj Gabriel de Castagneda aŭ serĝento Navarrete. Arabo, por salajro, konsentis esti nia gvidanto. Ĉiu el la fuĝontoj estis sin provizinta, kiel li povis, per armiloj aŭ nutraĵoj. Mia-

parte, mi sukcesis prepari, per ovoĵoj, faruno kaj mielo, dek funtojn da biskvito, kaj havigis al mi tri paroĵojn da lignoŝuoj. La loko kaj horo de la kunveno estis elektitaj. Miaj katenoj estis antaŭfajlitaj. La lastan nokton, mi disrompis ilin. Mi supreniris sur la terastegmenton de mia mastro; de tie mi atingis la najbarajn domojn. Mallongdire, mi havis la ĝojon trovi ĉiujn miajn amikojn ĉe la rendevuo. Ni bonŝance trairis la ĝardenojn kaj fruktarbejojn, kiuj randas la urbon. Ni eniris en la dezerton, kiu dividas Alĝeron disde Orano kun la fluga volupto, kiun devas senti la animoj, kiam ili eniras en la dezerton inter la forlasita purgatorio kaj la paradizo.

"La unuan tagon, ĉio okazis laŭ niaj deziroj. Tamen konversacio kun nia gvidanto plenigis min de konsterno. Tiu arabo estis ricevinta nian monon en la espero, ke ni nepovos efektiviĝi nian projekton.

" - Sed, li asertis, mi estas viro de honoro, kaj, kiel ajn endanĝerigos min mia fideleco, mi diras, kiel vi diras, sinjoroj hispanaj : "Unu homo, unu vorto."

"Jam matene de la dua tago, la viro de honoro, fidelo kaj vorto, ektimis, ke li voĵeraris.

" - Atendu tie ĉi, li rekomendis, dum mi supreniros sur tiun altaĵeton por rekoni la voĵojn.

"Zigzage grimpante al supro, li baldaŭ malaperis al niaj okuloj. Mi hezitis kaŭzi al miaj kunuloj verŝajne neutilan maltrankvilon. Ĝojo kaj fido estas ja tiel necesaj subteniloj en tiaj ekspedicioj...

"Fine mi diris :

" - Lasu, ke mi sekvu tiun berberianon, kaj ke mi faru al li ŝerceton, pri kiu ni ĉiuj ridos.

" - Gardu vin, sinjoro Cervantes, ke vi ne malfavorigu homon, de kiu dependas nia savo.

"Nur duone mi sukcesis trankviligi miajn amikojn. Vane mi rememorigis ilin, ke miaj plej riskaj chocarrieras (1) estas sen malico, ke ili gajetigas eĉ la plej malfavorajn mahometanojn : ĉiuj insistis por antaŭe koni mian projekton.

"Mi, kiel vi ja pensas, estis neniun farson imaginta; mi protestis, ke la pikantaĵo de la afero sidas tuta en la surprizo. Mi eskapis, kaj dume balanciĝis mallaŭdaj kapoj, leviĝis malaprobaj ŝultroj.

(1) pr. ŝokarrieras : blagoj.

"Neniu pado sur la deklivo de l'monteto. Malantaŭ ro-kaj ondoj, dise faŭkas kavernoj. Tio estas mallumaj buŝoj, kiuj aspektas ne profundaj. Sed pluraj el ili, post kurbigoj, kiuj rompas kaj haltigas la lumradiojn, konjekteble traboras la dikon de l'monteto.

"Tiu altaĵo ŝajnis artifika de la diablo mem por ebligi al la viro eskapi de ni, se li dezirus; por inspiri al li, se ankoraŭ neniu perfido vekigis en lia koro, la tenton malaperi.

"Mi supreniris ĝis la mallarĝa supro. La viro ne estis tie. Miaj okuloj traesploris la horizonton, nenion eltrovante.

"Eble, lasta espero ! li remalsupreniris la deklivon, sin direktis al miaj amikoj. Mi mem malsuprenkuris per tuta rapido de miaj kruroj. La maltrankvilo, pli ol la kurado, anheligis mian spiron kaj mian koron.

"Ĉu bezone diri al vi la pensojn, kiuj interbatis en ni, kiam ni certigis pri la perfido kaj forlaso ? La espero, tra la ĉie samaspekta dezerto atingi la malproksiman Oranon, malaperis kiel tiuj miraĝoj, kiuj promesas al onia soifo plej klaran kaj refreŝigan akvon, sed aerdisiĝas, kiam oni alkuras, kaj lasas onin fronte al la varmega realo kaj al la ardega sablo.

"Neeble iri sen gvidanto sesdek mejlojn (1) tra nekonata dezerto, sen difinitaj vojoj, trarabata de sovaĝaj bestoj, kaj en kiu la mordoj de l'suno estas ne malpli kruelaj ol leonoj. Ni estus vagintaj en suferegoj ĝis morto. Feliĉe, mi estis zorge rimarkinta la apartaĵojn de la irita vojo. Ni povis senerare, senprokraste kaj sensufere eskapi el la infero de l'dezerto, nin reĵeti en Alĝeron, purgatorion, en kiu agoniis la espero.

"Estis mi la organizinto de la elŝteliĝo, mi la forloginto de miaj kunuloj. Mi plenumis la plej simplan devon. Mi depostulis antaŭ niaj mastroj respondecon, kiu ja devkoncernis min. Mi esperis, ke, punbatita laŭ la kutima severo, mi estos liberigita per la morto. Sed Dali-Mami atendis pri mi tro altan elaĉeton. Li ne konsentis detrui tioman riĉaĵon. Kredeble por ne malpligrandigi mian valoron, li eĉ lasis al mi, kiel vi vidas, orelojn tamen neni-el konsiderindajn, kaj nazon, kiu ja valoras sian egalpezon da karno."

(1) Temas pri "franca" mejlo = 4 km.

Cervantes rakontis aliajn provojn. Neniu malsukceso lin senkuraĝigis. Li ĉiam esperas, ke venontafoje li estos pli bonŝanca. Aparte maltima provo kaŭzis al li de la incitita deĵo kondamnon je dumil bastonbatoj.

"Dumil, kiam temas pri bastonbatoj, estas nombro. Dumil mahometanaj bastonbatoj, tio sufiĉas, amikoj miaj, por suprenigi bonan katolikon ĝis la ĉielo de la martiroj. Mi jam vidis min, kun palmobranĉo en mano, aliĝantan al la glora falango, kaj mi ridetis al la duonfermita paradizo. Mi pensis ankaŭ pri la suferoj, kiuj antaŭas la supreniĝon. Tiuj suferoj estos dividotaj de kompatindaj insektoj, kiuj ricevos neniun parton el la eterna rekompenco. Fratoj, ĉu mi diru ? Ne la tuta insektaraĉo de la mazmorra restis en la malluma fundo kaj sur la fetoraj vandoj. Mi laŭte esprimis mian kompaton por la mizeraj pedikoj, kiuj malgrase sin vivtenis el la karno de mia dorso kaj de miaj ŝultroj. Kun elkora elokvento mi kompatis la senkulpulojn destinitajn al pereco en ŝtormo, kiun ne ili provokis.

"Iafoje sufiĉas malmulto por ridigi mahometanojn. La ĉeestantoj, tiklitaj infanoj, sufokiĝis de ridego. Eĉ la deĵo perdis la severan dignon de sia sinteno. Tiu viro, feliĉe, pretendis pri sprita inĝenio. Li deklaris :

" - Mi favorpardonas al ciaj pedikoj. Nun ciavice, ĉesu cialajn kruelaĵojn kontraŭ ili, kaj ne plu endanĝerigu ilin.

"Doble ripetiĝis la ridoj de la korteganoj, infanoj sin mem tiklantaj. La serioza mieno, kiun mi gardis, ŝajnis eksciti ilin, kiel la senmoveco de roko ŝajnas eksciti la ond-ojn.

"Tamen miaj gepatroj estis garantidonintaj siajn tutajn bienojn kaj eĉ la dotojn de miaj fratinoj. Ili estis ekspeditaj al Alĝero la sumon tiel amasigitan. Dali-Mami taksis ĝin nesufiĉa por la elaĉeto de Miguel Cervantes y Saavedra, tiel alte laŭdita de don Juan de Aŭstrio kaj de duko de Sesa. Sed li akceptis ĝin por la elaĉetpago de mia frato Rodrigo.

"Ni tre esperis, ke tiu mono liberigos ankaŭ min kaj kun mi kelkajn kamaradojn. De Valencio aŭ de Balearoj, Rodrigo sendos ŝipon al precize signita punkto de la marbordo, je duonmejlo oriente de Alĝero, proksime de vastega ĝardeno. La ĝardenisto de tiu bieno estis kaptito, en servuteco maljuniĝinta, kiun malfidi pensis, neniu mahometano. En la plej funda parto, tiu brava Juan estis eltrovinta naturan groton.

Lia kaŝa pacienca laboro pliampleksigis tiun rifuĝejon. Unu post alia, dek kvar kristanoj venis kaŝiĝi tie.

"Mi estis devigita atendi ĉe mia mastro ĝis la lasta momento. Mi estis min ŝarginta, malfacila tasko, nutri la malgrandan subteran respublikon. Mi estis varbinta renegaton nomitan Le Doreur (1), kiu revis reveni al sia religio kaj al sia patrio. Ne vekante suspektojn, li aĉetis nutraĵojn kaj portis ilin al miaj povraj malsatantoj.

"Proksimiĝis la tempo signita per miaj kalkuloj. Mi fuĝis de ĉe Dali-Mami kaj rifuĝis en la groton. Eble tro frue. Le Doreur tremante raportis al ni, ke mia malapero kaŭzis grandan emocion, kaj ke la deĵo ordonis plej severan serĉadon.

"Pasis ok tagoj en pli kaj pli streĉaj angoroĵoj. Ĉu mia frato elspezis, por plenumi sian mision, pli da peno kaj da tempo, ol difinis miaj kalkuloj?... Ĉu la ŝipestro estis fidela ?

"La ŝipestro, tion ni poste eksciis, estis Viana, honesta, decidema viro, kiu admirinde konis la marbordon. Rodrigo ne povis plibone elekti.

"En ĝojo malpli kaj malpli hezita, ni fine ekvidas la atenditan brigoskunon. De ĝi barko sin disigas, kaj ja al ni ĝi rapide veturas. Pluraj el miaj kompatindaj amikoj, tro longe restintaj en la malseka sufokeco de la groto, ŝajnis nekapablaj marŝi. La espero, jam preskaŭ realigo, por momento donas al ili mi-ne-scias kian ĝojan forton, mi-ne-scias kian flugilhavan, ridantan sanon.

"Ire-reire veturis alĝeraj fiŝistoj. Kelkaj ekzamenas la brigoskunon, maltrankviliĝas, eksuspektas. Ili eligas kriojn, multigas vokajn gestojn. De loko al loko ripetiĝas bruado kaj movado. Ekagitiĝas la haveno, poste la urbo. Cent berberiaj ŝipoj, hundaro ĉasbeston ekvidinta, impetas kaj hastas. Viana nenion povas krom etendi siajn velojn kaj fuĝi al marmezo.

"Mi ne diros al vi pri la premega, freneziga malespero de malfeliĉaj fuĝuloj tiom suferintaj, kaj, en la sama horo, renkontantaj elreviĝon kaj abismon. Plu restadi en la groto, ĉu ne estus kondamni al morto la plej malsanajn inter ni ? Kaj por kia utilo ? Nun kiam la atento estis vekita, certe la brigoskuno jam ne povus ŝtelŝoviĝi inter la gardoj kaj suspektoj. Al la aventuro mi vidis nur unu eblan solvon. Mi devis min liveri por savi tiujn, kiujn

(1) Pr. proksimume Le Dorer, franca nomo.

mi logis, kaj al kiuj mi ne kapablis teni miajn promesojn. Ĉiuj tiuj bravuloj kontraŭis mian projekton kun grandanim-eco, kies memoro plenigas mian koron je amo kaj miajn okulojn je fieraj larmoj. Por ne humiligi min per sia ofero, ili silentis pri la veraj motivoj de sia decido. Neniu parolis pri mia danĝero. Ĉiuj rifuzis reveni al servuteco. Ĉiuj asertis, ke Dio konsentos miraklon al niaj preĝoj. Baldaŭ persvaditaj per siaj propraj vortoj, ili komencis esperi spite ĉian maleblon, multigi infancajn planojn, certigi, ke iu el ni baldaŭ eltrovos la savrimedon.

"Du tagoj pasis. Niaj nutraĵoj estis elĉerpitaj, kaj Le Doreur ne reaperis. Li reaperis la trian vesperon. Lin akompanis multaj soldatoj, kiujn li gvidis. Ni pardonu la malfortan, ŝanceliĝantan, doloran homon, el kiu teruro faris Judason.

"Tuj kiam ni ekvidis la hororan trupon ĉe la enirejo de l'ĝardeno, mi estre, febre ordonis al miaj amikoj, ke ili malkonfirmu nenium el miaj vortoj. Kaj, marŝante al la soldatoj, mi kriis la simplan veron :

" - Neniu krom mi estas respondeca.

"Ni reeniris en Alĝeron tra Bab-Azun-pordego*. Tie nin atendis amaso pli moviĝanta kaj hurlanta ol luparo. Ŝajnas al mi nenecese raporti la insultojn, kiuj akompanis nin tra la stratoj. Vi ankaŭ konjektas, kiajn molajn aŭ malmolajn pafaĵojn la popolaĉo ĵetis al ni.

"Antaŭ la deĵo mi ekparolis. Nenia fanfaronaĵo. Nenia ŝerca vorto. Mi elektis plej simplajn, plej dignajn parolojn. Mi rakontis la okazojn; mi eksplikis la cirkonstancojn. Mia rakonto demonstris, ke mi sola ĉion faris, ĉion organizis, ĉiujn kuntiris. Tiuj, por kies okuloj la provo estis kulpa, devis, povis puni nur la solan Cervantes.

"La deĵo blekegis insultojn, grumblis minacojn. Ankaŭ, foje-foje, lia voĉo mildiĝis, kaj li provis logi min per plej karesaj promesoj. Tiam estis en Alĝero patro Jorge de Olivares, el la ordeno de l'Pardono, komandoro de Valencio. La deĵo revis impliki lin en la afero, ŝirpreni lian pasporton kaj postuli de la trinitatanoj grandegan elaĉetmonon.

"Kun interna rideto, kiun mi ne lasis supreniri al miaj lipoj, mi rememoris la utilan diraĵon de l'ciganoj : "ne

* Konscia pleonasmo : en araba lingvo Bab ja signifas pord(eg)o.

estas plimultaj literoj en no(1) ol en si(1)". Ekzistis neniu pruvo kontraŭ patro Olivares. La deĵo estis trudita rezigni pri elaĉeto de li. Por parte kompensi tiun preterlasitan profiton, li aĉetis min de Dali-Mami por kvincent eskudoj, kaj deklaris, ke li liberigos min nur kontraŭ duobla sumo.

" - Sinjoro, mi diris al li, vian spekulacion mi povas nur laŭdi; mi ĉiam ŝatis vetludon kaj vetpasiulojn.

" - Mi komprenas, li replikis, kaj mi promesas al ci, ke mi streĉe ludos. Se ci sukcesos eskapi de mi, mi konsentas, ke oni detranĉu mian kapon.

" - Mi ne kuraĝas esperi, sinjoro, ke la cirkonstancoj min favoros ĝis tia grado, ke estu al mi permesite postuli tian vetajon.

"Ja longtempe Hasan-paŝao tro streĉe ludis, ke mi povu ion provi.

"Ĉiuvespere kaj ĉiumatene estis kontrolataj la katenoj ŝarĝantaj miajn brakojn kaj krurojn. Tage kaj nokte mi restis enŝlosita en la Granda Punejo per kradoj garnita, kie svarmis provosoj kaj gardostarantoj. La deĵo ofte revokis la zelon de miaj gardantoj. Li asertis, kun la natura troigemo de tiuj popoloj : "Se nur la hispana brakstumpulo estas bone gardata, mi rigardas kiel sekurajn miajn sklavojn, miajn ŝipojn kaj la tutan civiton."

"La plej spritpeza homo fariĝas ingenia, kiam kaptite li revas nur pri libero. Tiu povra deĵo havis multajn priokupojn. Mi havis nur unu. Se ne ekzistus perfiduloj, mi hontus, ke mi ne gajnis en ludbatalo.

"Licenciato Giron, naskita en Granado, estis forlasinta la kristanismon por la mahometa kulto. Multaj estas en Alĝero la kompatinduloj, kiuj, por liberigi sian korpon, servutigas sian animon. En pluraj el ili la memoro pri la unua religio kaj la patrio estas konsciencriproĉo pli dolora ol la kontuzo de l'katenoj aŭ la bastonbatoj. Kiom el ili, inter larmoj jen bruligaj, jen refreŝigaj, revadas reveni en Hispanion, genuiĝi en la malgranda preĝejo, kiun pligrandigas kaj plenigas la rememoroj el ilia infanaĝo, trovi la neforgesitajn pejzaĝojn, la familion, la iamajn amikojn. Precipe per ilia helpo singardema kaptito povas

(1) no = ne, si = jes. (france, ankaŭ "non" kaj "oui" havas saman nombron da literoj).

provi fuĝon. Jam plurfoje kelkaj el tiuj homoj estis servintaj al mi. Ja certe, mi konis la malsolidecon de tiaj instrumentoj. Ne sen tremo oni konfidis al tiuj povraj ŝanceliĝaj koroj. Sed la neceso min devigis gvati la bedaŭrojn ĝermantajn el tiuj glitaj teroj. Kiam la planto ŝajnis havi kelkan firman radikon, mi ĝin kulturis ĝis mi kolektos, medikamenton aŭ venenon, ĝiajn febrajn fruktojn.

"Sincera estis la deziro de la licenciato pri pento kaj reveno. Mi instigis lin aĉeti malpezan ŝipon, pretekste kaperi. Neniu projekto povis ricevi de la deĵo pli favoran akcepton. La ŝipon aĉetinte, Giron, promesante al la deĵo parton de la kaperaĵoj, ricevus de li dunge ŝipanaron el kaptitoj. Bedaŭrinde la renegato ne posedis la monon necesan por la alloga entrepreno.

"Onofre Exarque, riĉa bankiero el Majoroko loksidanta en Alĝero, estas unu el la plejbonaj homoj, kiujn mi konas, mi kiu konis, per tute certaj spertoj, tiom da diversaj homoj. Ofte li vizitis la kaptitojn enŝlositajn en la Granda Punejo, alportante al ili, kun kelkaj materiaj dolĉaĵoj, kuraĝigojn kaj konsolojn; mi eksplikis al li mian projekton. La plano ŝajnis al li bone konceptita. Mi havis neniun garantion por oferi krom la oro de mia parolo. La malavara bankiero kontentiĝis per ĝi kaj pruntedonis al mi mil kvincent dublonojn. Giron, akirinte fregaton, ricevis de la deĵo la permeson elekti, por okupi la dek du benkojn de ramistoj, sesdek kaptitojn.

"La neceso igis nin meti tro multajn homojn el la sekreto. Tamen, nia elekto estis tiel singarda, ke inter la sepdek sciantaj ne troviĝis unu perfidulo. Malfeliĉe, inter ili troviĝis unu babilulo, aŭ pli ĝuste unu tro konfidema knabo. Sen mia permeso, li instigis al fuĝo kun ni certan Blanco'n de Paz, kiu estis dominikana religiulo kaj doktoro pri teologio. Kiel naiva katoliko, kaj juna, estus malfidinta sciencoplenan teologon kaj hundon de l'Sinjoro ?

"Blanco de Paz estis ema, eble, al ununura peko. Sed temas pri ĉefa peko, sufiĉa por la ruinigo kaj la morto de animo. La doktoro pri teologio estis enviema.

"Niaj malbonaj instinktoj ĝiam trovas nutraĵon, kaj nenia malsatego mortigas ilin. Ĝis en la divido de ekstrema malfeliĉo, la maltrankvilo de enviulo trovas ion por envii. Se Blanco de Paz estus estinta la ĉefo de l'provo, Blanco

de Paz estus restinta honestulo. Kiel li estus al mi pardoninta organizi entreprenon, kiun eĉ nur koncepti li ne kapablus? Se mi estus sukcesinta, la povrulo estus mortinta pro ĵaluzo. Ni ne postulu la morton de l'pekulo, kaj ni lasu lin defendi sian vivon, kiel li povas.

"Jus informite, Blanco de Paz komisiis certan Cayban, florencanan renegaton, averti la deĵon. Vokite al la palaco, la doktoro pri teologio, ŝvelanta pro tia favoro, ĝoje elverŝis ĉion, kion li sciis.

"Feliĉe, li sciis malmulton. Al neniuj kaptitoj mi malkovris la rolon de Onofre Exarque. Ĉiu konspiranto konis nur min; la listo de la galeranoj elektotaj de Giron estis unika kaj restis en mia mano. Feliĉe, ankaŭ, mi estis instruita de sperto. Mi perceptis, laŭ signoj por mi nerimarkablaj kelkajn jarojn antaŭe, la glitajn indicojn de perfido. Vanta kapteniĝo de Blanco de Paz; certa rideto, triumfa kaj mistera; iu moka vorto pri la fido, kiun pluraĵ metis en min, kaj kiom ĝi povus kosti al ili: per ĉio tio mi estis informita, kiel se mi aŭdus, ĉirkaŭ la deĵo, la karesajn boĵetojn de la hundo de l'Sinjoro, kiel se mi vidus ĝian rampadon, ĝian svingatan voston kaj ĝian lekantan langon.

"Mi konjektis, ke Hasan-Paŝao, dezirante kapti ĉiujn konspirantojn per ununura retĵeto, atendas kaj gvatas la horon de la efektivigo. Mi glutis la paperon, kiu endanĝerigus sesdek kunulojn. Mi avertis Gironon, ke li sin kaŝu. Mi mem sukcesis fuĝi el la Granda Punejo kaj kaŭriĝis ĉe malriĉa kuraĝa samlandano, leŭtenanto Diego Castellano.

"Onofre Exarque, prave maltrankvila, fine sukcesis eltrovi min. Li sciigis al mi - detalon al mi kaŝitan de la grandanima Castellano - , ke estis juĝdecidita mortopuno al kiu ajn donus al mi azilon. Kaj la bankiero proponis min reaĉeti kaj tuj enŝipigi.

"Malavara ofero, sinjoroj, sed la cirkonstancoj ne permesis, ke mi ĝin akceptu. La deĵo - laŭ kutimo de tiuj, kiuj aŭdacas juĝi - certe punus iun. Ĉu mi povis konsenti, ke la punoto estu alia ol Cervantes Saavedra? Mi ankaŭ ne povis kuntreni en mian ruiniĝon la bravan Diegon Castellanon. La devo fariĝis klara kiel fontakvo. Rajtante nek foriri nek kaŝiĝi, restis al mi nur la eblo min liveri.

"Plej malfacila afero estis trankviligi Onofre Exarque'n. Eĉ la plej bona el la tro riĉaj homoj sin sentas trafbla

en siaj riĉaĵoj, kaj li facile timtremas. Malgraŭ la nobleco de sia koro, la tremanta bankiero, mi ja kredas, neniam komprenis la neceson de mia decido, neniam pardonis min pri la teruroj, kiujn ĝi kaŭzis al li.

"La deĵo ligigis miajn manojn malantaŭ mia dorso, ĉirkaŭigis mian kolon per ŝnuro, kies kontakto eble ŝajnis al li plej elokventa konsilo. Poste li postulis, se mi ne volas esti tuj pendigota, la nomojn de miaj komplicoj. Vi divenas, fratoj, ke mi senhezite liveris la nomojn. Miaj kunkulpuloj estis en nombro kvar, ne unu pli, ne unu malpli. Mi nomis kvar hispanajn nobelojn, freŝdate elaçetitajn, kaj, en la horo, kiam mi parolis, salutantajn patrion kaj liberon.

"Kolare ekkriis la vicreĝo. Malgraŭ la verŝajno, kiun mi sciis havigi al fabeloj, li asertis, ke li ne kredas min. Mi ridetante rimarkigis, ke estas tempoperdo demandi iun, kies parolo ne inspiras fidon. Mi aldonis, ke se mi estus libera, mensogakuzo metus al mi la spadon en manon. Kaptite, mi sentis min supera al unua ofendo, kiun mi ne povis antaŭvidi. Sed mi ne duafoje elmetos mian vorton al insulta pridubo. De nun, mi enfermiĝas en plej neflekseblan silenton.

"Vi povas, sinjoro, premigi mian gorgon. Tio estas la sola al vi restanta rimedo por movigi la langon de Ĉervantes.

"De tiu momento, neeble estis eltiri el mi ununuran vorton. Al minacoj kaj demandoj mi respondis per la sama rideto kaj per la sama gesto montranta mian resignacian kolon.

"Ĉu Hasan-paŝao, antaŭ tiu sinteno de viro ofendita, fiera kaj indiferenta kontraŭ morto, kredis, ke mi veron diris?... Ĉu lin simpatie movis kuraĝo, kiu tamen estis tre facila?... En Hasan-paŝao, kruela kaj avara, mi preferas kredas pri kelka kalkulo ol pri grandanima movo. Mia morto estus monperdo. Homo trovinta la dek kvinmil dublonojn necesajn por la puninda entrepreno ja certe fine trovos la prezmonon por sia elaçeto. Tiu rezonado, supozeble, savis mian vivon. Mi estis nur ĵetita en karceron.

"En la fundo de la ĉelo, en kiŭ mi pasigis kvin monatojn, mi konceptis projekton pli vastan ol la antaŭaj. Helpe de pacienco, singardemo kaj persistemo, mi sentis la eblon ribeligi la dudek kvinmil kaptitojn en Alĝero. Ĉefe de tiuj bravuloj, kial mi ne provus konkeri la urbon en la nomo de l'reĝo?

"Mia plano estis solida, ekvilibra; mi antaŭvidis ĉion

antaŭvideblan en tiel riska entrepreno. Mi esperis, kun Dia helpo, flirtigi la hispanan flagon en la alĝeraj ventoj kaj transformi la rabistejon de la mahometanaj piratoj en remparon de la kristanaro.

"Iom da bonŝanco, amikoj, kaj mi sukcesis en la vasta entrepreno, kiu senmortigus min. Fratoj, bonŝancon mi neniam havis. Aŭ pli ĝuste, la mizerikorda severo de l'Sinjoro ĉiam volis, per la malprospero de miaj plej bone konceptitaj planoj, humiligi mian orgojlon kaj puni, jam en tiu ĉi vivo, miajn sennombrajn pekojn.

"Benu ni la Sinjoron egale pro tio, kion lia boneco juĝas konvene doni al ni, pro tio, kion lia boneco juĝas konvene rifuzi al ni.

"En la momento, kiam ĉio, eĉ la espero, estis perdita, plaĉis al dia kompato fine konsenti pri mia liberigo.

"Hasan-paŝao estis fininta sian vicreĝan tempon. Lia posta oficulo estis jam instalita, kaj la eksdejo foriris al Konstantinopolo. Amaso da kaptitoj ŝtopis liajn multajn galerojn. Mi estis en holda fundo, kun katenitaj manoj kaj piedoj. Nenia kuraĝhelpo krom en rezignacio. Mi jam ne kuraĝis diri: "Forigu de mi tiun kalikon". Nenian rimedon mi vidis por ne eltrinki la servutecon ĝis la feĉo. Konstantinopolo havis nenium interrilaton kun Hispanio. Mi estis certa, ke mi finos en kaptiteco mian malfeliĉan ekzistadon. Kaj mia preĝo diris nur: "Fariĝu Via volo".

"Tiam, pere de fray Juan Gil, la plej bona el ĉiuj, kiuj iam sin vestis per la robo de Elaĉetado, Dio manifestis al mi sian mildon kaj mizerikordon.

"Mortinta estis mia patro, kiu ruiniĝis sen finsukcesi pagi mian elaĉeton. Tiu katastrofo kaj kvin jaroj da senefikaj provpenoj ne povis malkuraĝigi mian patrinon kaj miajn fratinojn. Neniam ili ĉesigis siajn urĝajn klopdojn; neniam ili interrompis siajn severajn seniĝojn. Ili sin faris almozulinoj, la noblaj virinoj, por min elaĉeti.

"Se al bona katoliko estus permesite juĝi pri tiaj demandoj senpere per sia konscienco kaj sia koro, mi lokus patron Juan Gil super plurajn kanonizitojn.

"Li estis fame konata en Alĝero. Heroe li estis tie pasiginta kvar jarojn kiel ostaĝo por garantii sumon da kvarmil dukatoj pruntitaj de lia kompatemo kaj uzitajn por elaĉeti malriĉajn kaptitojn. Hazarde mia patrino kaj miaj

fratinoj eksciis, ke la reĝo sendas lin elaçeti kelkajn sklavojn aparte protektatajn. Ili kuris al Madrido, donis al li ĉiom, kiom ili povis amasigi, tricent dukatojn. Hasan-paŝao postulis mil, kaj kiel vi konstatas, oni estis malproksime de akordiĝo.

"Andaluzo kaj monako, Juan Gil estis duoble obstina kaj duoble lerta. Li divenis, kian timon miaj multigitaj provoj naskis en la animo de mia mastro, kaj per tio li superege ludis. Li kredigis al li ke, ĉar la malespero paroksismigos mian malamon, mi estos en Konstantinopolo konstanta danĝero por lia vivo. La malplej granda malbono, kiu povis okazi al li, estis esti devigita sin gardi per mia propra morto, kaj tiel foroferi la tricent bonajn dukatojn al li proponitajn.

"Hasan-paŝao, afliktita komercisto, fine rezignaciis neniom profiti de tiu Cervantes-afero, kiu havigis al li tiom da zorgoj. Sed lia avara energio rifuzis perdi eĉ unu maravedon. Li obstinegis. Li ripetadis, ne volante ion plu aŭdi: "Estu honesta kaj repagu al mi, almenaŭ, la kvincent dukatojn, kiujn li kostis al mi." La fraile havis nur tricent, kaj ambaŭ pozicioj ŝajnis neakordigeblaj.

"En la horo mem, en kiu la ŝipareto de Hasan-paŝao estis tuj deankriĝonta, la Patro finsukcesis akceptigi, por la mankantaj ducent dukatoj, la oron de sia vorto.

"Mi ne diros al vi, amikoj, kia ebriiga ĝojo estas la rekiro de libero. Por tiaj emocioj ne ekzistas vortoj. Fine mi estis revenonta en mian karan Hispanion. En ĝi mi trovos mizeron pli drastan ol tiu de kaptitoj. Okazos, ke mankos al mi pano, kio neniel gravas, kaj okazos, kio estas terura, ke mi vidos panon manki al estuloj de mi amataj. Sed estas ja tio, la ĝojo; ĝi estas la intertempo inter la malfeliĉo, de kiu oni fuĝas, kaj la malfeliĉo, al kiu oni kuras. Ni benu la bonecon de l'Sinjoro; malantaŭ la transa flanko de l'monto, ĝi favore nevidebligas la estontan malbonon, kaj sur la vojo tien kondukanta ĝi semas fragilajn florojn.

"Ĝojo, velkanta floro, almenaŭ mi sciu konservi en la vazo de mia koro vian senmortan parfumon."

Kiam la poeto estis fininta sian rakonton, la anoj de Esquivias ariĝis ĉirkaŭ li, premante lian manon aŭ brakumante lin. Poste, naiva procesio, sed pli glora ol reĝa eskorto, ili akompanis lin ĝis lia dometo. Kaj ĉiuj parolis nur pri Alĝero kaj pri Cervantes.

Lasante ilin por preni kelkajn horojn da dormado, li suspiris :

- Tio estis la bona tempo !

La maljunuloj kredis kompreni. Ilia bedaŭro sin turnis - kiel lia bedaŭro, laŭ ilia supozo - al la forsveninta jun-ago.

Sed la maljunuloj miskonjektis, kaj Cervantes pensis en aliaj profundoj.

Li komparis la brutalan barbarecon de la maŭroj kaj la kaŝperfidan kruelecon de la Inkvizicio, la bastonbatojn kaj la torturkonfesigon, la ŝnuron kaj la brulŝtiparon. Li komparis precipe sian ardan liberecon de sklavo, kiu riskas nur sian propran vivon, kun lia malhela servuteco de libera homo, kiu timtremas pri la vivo de la amatoj.

Se li estus ankoraŭ tiel libera kiel en la kaptiteco, kia impeto lin kuregus al Madrido, kaj kiel laŭtege iĝus lia voĉo por krii al la katolikaj torturistoj lian tutan malestimon kaj lian tutan naŭziĝon...

Tuj kiam li troviĝis sola, li sin lasis fali sur seĝon. Kun klinita kapo, kun vangoj malsekaj de larmoj, li ripetis :

- Tio estis la bona tempo, la tempo, en kiu mi rajtis esti kuraĝa...

Tria parto

Ĉapitro Unua.

Cervantes estis ĵus perdinta duafoje sian filinon, kaj enferminta en la tombon tiun, kiu sin enfermis en monakin-ejon. Sur lia vivo, senripozhalta batalado, batalado en la etaj kiel en la grandaj aferoj, ĝis premeĝo plipeziĝis la frua maljuneco. Lia kuraĝo estis kvazaŭ heroa kavaliro, sublevanta kaj iamaniere portanta elĉerpitan ŝevalon. Li sentis, ke lia korpo, subtenata de lia nura volo, daŭros nur nemulte da monatoj plu. Li timtremis, ke li renkontos la finon de siaj tagoj antaŭ la fino de Persiles.

La poeto kaŝadis sian zorgon, kaj liaj lipoj ridetis ne malpli ofte ol iam. Sed lia gaja mieno estis masko, kaj li jam nur sukcesis estri la supraĵon kaj la eksteran aspekton de ŝia estaĵo. Li sentis en si, kunpremitan, li-nesciis-kian inciteblan fermenton. Se li ne bridus la internan impeton, la plej eta spitbato ĵetus lin al riproĉoj kaj kolerkrioj. Ĉar li ne permesis al malicaj aŭ frenezaj bestoj eliĝi, ili pli konsumis lian sanon. Ilia agitado kaj bruado plenigis lian doloran atenton, igis lian laboron pli malfacila.

Tri virinoj, lin amantaj sen inteligento, ĉiuokaze lin superŝutadis per plej amemaj kaj plej incitaj riproĉoj. Ili ĉirkaŭigis lin per la detalplena troabundo de tiuj aŭblaĵoj, per kiuj sin ĉarmas juna aŭ daŭrema infano, ĉar infano ja deziras, ke oni ĉiam okupiĝu pri ĝi, sed kiuj tedeas veran homon, kaj venas konsterni kaj malkoncentri lian penson en la momento, kiam ĝi kunkolektis siajn elementojn kaj sian forton. Li sentis, ke en Madrido neniam li finos sian libron.

Li pretekstis, ke la kamparo resanigos lin. Li ne havis plu la forton piediri la vojon. Li atingis Esquivias'on sur luita mulo. La publikigo ĉe la libristo Villaroel de dek ses teatraĵoj (inter kiuj la dek du rifuzitaj, dank'al Lope de Vega, de Juan de la Cueva) kaj la prospero de la

dua Don Kihoto ebligis, dum sennuba tempeto, tiajn malgrandajn luksojn. Ĉi-foje Cervantes lasis ĉe strato de l'Leono la necesan monon por kelkaj magraj monatoj, kaj, se Cortadillo esplorus la dekstran poŝon de la kavaliro, li trovus en ĝi kelkajn monerojn. Ĉar Persiles ŝajnis al li tre supera al Don Kihoto, la poeto naive esperis, ke Persiles produktos por lia vidvino sufiĉan profiton, por ke ŝi vivtenu sin kelkan tempon. Tiom por la savo de liaj amatinoj kiom por lia propra gloro, necesis finverki Persiles'on.

En Esquivias, tiu maljunulo, tiu mortiganto laboris kun fervoro nekŝanta eĉ de lia junaĝo. Li povis pagi por si kandelojn, kaj la limoj de la taglumo ne plu estis tiuj de lia penado. Dormo vizitis lin malofte. Malofte li sin interrompis por preni nutraĵon. Sed li havis apud si grandan kruĉon kaj du alkarazojn. Je ĉiu finita frazo, ankaŭ je ĉiu hezito de sia penso aŭ de sia plumo, li trinkis larĝajn plenglasojn da malvarmeta akvo. Kiam la akvujoj estis malplenaj, li kuris ilin plenigi ĉe la fontano.

Nenia apetito por la manĝaĵoj. Sed neestingebla, turmentanta soifo. "Soifo de danaidina barelo, kiu ruliĝus en la flamoj de la kristana infero."

Li ankaŭ diris :

- La seniĝoj amuziĝis donante al mi riĉulan malsanon. La malsatulo fariĝis hidropsa kiel tiuj, kiuj dum sia tuta vivo tro lukse manĝadis. Tial ke mi estas ridemulo, la morto venas al mi kiel mokrido.

Li rifuzis preskaŭ ĉiujn manĝinvitojn. Kiam li eliris, tio estis tial, ke la plumo elfalis el liaj fingroj de krampo rigidigitaj, aŭ ke liaj malklarigitaj okuloj ne vidis plu la paperon, aŭ ke lia kapo turniĝis. Li ne nur transpasis la limojn interne de kiuj la laboro restas ĝojo, impeto kaj freŝo. Li penetris tre antaŭen en la blinda regno, kie peze sin trenas la penado, grinca kaj senefika. "Oni povas, mi sperte scias, ankoraŭ marŝi aŭ skribi, dum oni jam dormas". La morgaŭon, li reprenis la paĝojn produktitajn en tiu somnambuleco de laciĝo kaj kutimiĝo. Estis al li pli penige vesti ilin per beleco kaj natureco, ol per unua provo krei larĝajn harmoniojn, kies kanto, jam denaske preskaŭ perfekta, necesigas nur ridetajn plibonigojn. Ili estis, tiuj ĉi, liaj grandaj rekompencoj. Ha! la volupto dekfoje relegi, per voĉo pli kaj pli ĉarmita, malpli kaj malpli serĉanta kaj blindpalpanta, la noble belan frazon, kiu, tion oni sentas, ankoraŭ plibeligiĝos kaj plinobliĝos...

En la vesperoj de plej peza laciĝo, li revenis kelkajn horojn en la drinkejon, ripozis en revenoj al pasinta tempo, en rakontoj pri kelkaj okazoj el sia vivo.

Eble nun, en tiaj vesperkunvenoj, li pensis pri sia plezuro pli ol pri tiu de aliuloj ? Reardigi la iamajn flamojn fariĝas bezono en tiu, kiu baldaŭ estingiĝos.

Li rakontis kun sia kutima bonhumoro. Sed, ĉu ne estis sekreta amareco, kredeble de li mem nesciata, en la elekto de la epizodoj, kiujn li plej volonte rakontis ?...

Krom por kontentigi precizajn demandojn, kiujn liaj amikoj devis ankoraŭ ripeti, li flankelasis siajn ĝojojn kaj siajn sukcesojn, sian infanaĝon ĉe la ĉarmaj bordoj de rio (1) Henares, sian junaĝon ŝarĝitan de promesoj kaj amoj kiel printempa arbo, siajn tagojn de espero, siajn horojn de videbla heroeco. Tuj kiam oni lasis lin gliti laŭ sia deklivo, li ridante diris la mizerojn kaj la malsaton. Li mokridis siajn "plej sklavajn jarojn", kiujn li lasis tute formangi de la administraj taskoj, tiujn dudek jarojn, dum kiuj la malavaraj libertempoj, al li donitaj de lia patrio, permesis al li verki ĝis tri sonetoj. Li glitis pri la ĝojoj de sia edziĝo kaj longerestis ĉe la tri jaroj da ĉiutage pli premege luktado, kiuj sekvis. Li devis fuĝi de Madrido kaj Esquivias, serĉi panpecon en Sevilo, "azilo por malriĉuloj kaj rifuĝejo por malfeliĉuloj". Sed la frukto-dona Andaluzio estis, por li kaj por liaj familianoj, despoblado (2) kaj lando de malsato.

Por ne vidi plu suferi pro malsato siajn amatinojn, li estis petinta ofiĉon, kiun ajn, en Ameriko. Ĉar antaŭ la granduloj, ĉiam tiel okupitaj kaj tiel senatentaj, necesas precizigi, li aparte difinis kvar oficojn tre neegalajn, sed kiujn li sciis egale vakaj.

Ĉio estis al li rifuzita kun favorkoreco, kiu, li asertis, lin tuŝis ĝis larmoj. Filipino IIa degnis propramane prinoti la humilan petskribon de la poeto. Li skribis, tiu granda skribmania reĝo, jenan emociigan linion : "Ekzamenu por fari al li kelkan favoron en tiu ĉi lando mem". Tia noto kaj tia provpeno de reĝa mano devas plenplenigi koron kaj nutri familion. Post tia gloro, se nur oni ne estas ĉiam ĉeestanta kortegano, ĉiam embuske gvatanta, en ĉiu

(1) rivero.
(2) dezerto.

oportuna okazo petadanta; nenio plu esperebla. En tiu ĉi aŭ en alia lando, neniam venis favoro por Cervantes.

Dum dudek vagaj kaj senfruktaj jaroj, la poeto uzadis sian spiriton por plej neatenditaj taskoj. Li mastrumis, ĉe la bordoj de Guadiana, fabrikon de pulvoro kaj salpetro; li estis vicprovizumisto de la floto, komercagento aŭ advokato konsilanta, agento de salimposto, impostkolektisto, enspezisto de rentoj por la granda monakejo de Sankta-Johano de la Manĉo. Ne estis eĉ unu el tiuj malriĉaj oficoj, kiu ne kaŭzis al li malfacilaĵojn kun damo Justico. Tial, deklarante pri ĝi la respekton, kiun ĝi inspiras al kiu ajn de proksime ĝin vidis, li nomis ĝin "la plej malpura kaj la plej ŝtelema el ĉiuj putinoj". - Ĝi vendas sin al riĉuloj, kaj ĝi volonte loĝigas la malriĉulojn, pri kiuj ĝi okupiĝas.

Kiomfoje ĝi loĝigis Cervantes'on !

- Neniam mi posedis sufiĉe por lubriki la mekanismojn. Tial, ĝi ĉiam faradis ĉirkaŭ mi pli da bruo kaj knarado ol bova ĉaro.

Milita proviantisto, li estis enkarcerigita pro tio ke, laŭ ordono de lia ĉefo, en kondiĉoj kune leĝkonformaj kaj profitigaj por la ŝtato, li estis vendinta certan kvanton da greno; sed la rutino postulis, ke oni lasu ĝin putri en la magazenoj.

- La hazardo, kiu estas justa unu fojon el cent, povis rekompenci la viron havintan la utilan ideon kaj donintan la ordonon. Ĝi preferis ĵeti en malliberejon tiun, kiu utile obeis.

Precipe kiel impostisto Cervantes spertis longajn kaj reajn persekutadojn. Li konfesis, ke li larĝe meritis ilin.

" - Mi estis la plej malbona kolektisto imagebla. Se komercisto, pro ne konsentita pagprokrasto, ŝajnis premita al muro de bankroto, mi konsentis la prokraston, kiu iafoje ne malhelpis la bankroton, sed sendis min en malliberejon. Ĉu malfeliĉuloj ploris antaŭ mi, tial ke ili ne povis kontentigi la fiskajn postulojn ? Mi forkuris por ne plori kun ili. Kie mi estus trovinta la kuraĝon reveni, akompanate de persekutistoj, por vendi la dometaĉon kaj la liton de tiuj povruloj ? Se ĉiuj ŝtatoficistoj similus al mi, tio estus, mi konfesas, granda malbono por la monarkio. Multaj impostistoj kiel Cervantes, kaj Filipo

Ila estus kondamnita subteni kelkajn spionojn malpli, iom malpli grasigi niajn bonajn kanonikojn, dronigi iom malpli multajn ŝipojn kaj maristojn en la ekspedicio de la Nevenkebla Armada. Li ne havus la gloron esti pereiginta, inter siaj popoloj, tiom da martiroj de liaj vastaj projektoj, kaj li ne estus plu estinta sufiĉe riĉa por komplete ruinigi Hispanion. Vi ja ridas, fratoj, mi estis pli milde punita ol meritis miaj krimoj, pli milde ol postulis la bona ekzemplo."

En 1597, la kontrolo de la libroj de Cervantes konstatas deficiton de 2 646 realoj. La malbona oficisto kvitiĝis per trimonata mallibereco, sekvita de dek unu jaroj da persekutoj kaj periodaj repostuloj. De 1608 la Administracio pelis la pardonemon ĝis ne plu repeti pri la sumo. Sed la poeto ne diris, je kia prezo li aĉetis tiun malfruan indulgon.

Li ne diris, ke laŭ konsilo de sia amiko, licenciato Francisco Nuñez, li sin akceptigis en la pia kunfrata societo de la Preĝodomo de la Tre-Sankta-Sakramento kaj en la Tria-Ordeno de Sankta-Francisko. Tie ĉi kaj tie, li serĉis protektantojn. Sendube iu el ili akiros por li plenkvitancan pri ŝuldo, kies nura penso lin preme gas. Malgraŭ ripetitaj promesoj, neniam oni konsentis al li regulan kvitancan. Neniam oni repostulis de li. Sed oni opiniis bone lasi lin daŭre sub la minaco je denovaj persekutoj.

Plurfoje malliberigita pro indulgo al malriĉuloj, li estis ankaŭ enkarcerigita en Argamasilla, tial ke li pelis la maldecon ĝis postuli de riĉuloj ilian ŝuldon. - Feliĉa mallibero! - li ekkriis - benitaj libertempoj! Ja en la karceroj de Argamasilla, unuafoje, aperis al mi la inĝenia hidalgo don Kihoto de la Manĉo.

Sed la malliberigo, kiun li rakontis kun plejmultaj detaloj, estis la lasta, kiu, en 1605, frapis lin kune kun lia filino, lia nevino kaj unu el liaj fratinoj. Kun ilia komplaceco, li faris la krimon helpi nobelon mortantan de spadopiko.

Mi detaloj interplektiĝis kaj enmallumiĝis, rubusuja retaĵo en senluna nokta. Estis nur kompreneble, ke la Justico estis laŭcele erarvaginta : por ŝirmi la kulpulojn de ĝi konatajn, sed al kiuj ĝi volis nenian malagra-blajon kaŭzi, por doni al ili la tempon fuĝi malantaŭ la

polvokurteno kreita de ĝiaj klopodoj, ĝi laŭhazarde arestis iujn ajn senkulpulojn.

Oni kredis ankaŭ kompreni, ke Cervantes nun scias tiom, kiom la Justico mem, kaj, pro motivo de singardo, ne povas diri pli. Lia silentemo estis incitanta; sed la tuta kolero sin turnis kontraŭ la juĝistojn. Oni ripetis proverbon, tiām popularan en Hispanion :

- Laŭ ordono de potenculoj aŭ por sufiĉa prezo, la juĝistoj deklarus Abelon murdinto de Kaino.

Ĉapitro Dua.

Cervantes estis skribanta sur la apogilo de l'fenestro, kiam li aŭdis vokon ĉe sia pordo. Li ekmiris : malofte la Esquivias'anoj malhelpis lian laboron, kaj tiam antaŭ li ili haltis. La senmova ombro sufiĉis por averti la poeton, ke iu deziras paroli al li, aŭ, se li tro malrapide revenis de la ensorĉaj landoj, tiam al la vitro, por lin malsuprenvoki sur teron, frapis malpeza fingro.

- Fremdulo! - li murmuris.

Li kuris malfermi, malprecize atendente pri iu mesaĝo de Catalina.

Tiu, kiu frapis ĉe la pordo, estis nekonato; sed Cervantes ridetis al li, kune kiel al maljuna amiko kaj kiel al juna virino.

La rideto floranta sur la lipoj de malsano kontuzitaj estis ne nur la unua esprimo de universala bonvolemo. Ĝi esprimis ankaŭ la ĝojon naskitan de rara kaj stranga belo, ŝajne konsistanta el lumo kaj poezio.

La nekonato estis granda deksejara knabo, kun sinteno trankvila kaj milda. Kion oni unue rimarkis en lia nobla vizaĝo, tio estis frunto belege ampleksa. Poste, sub la larĝaj, delikate arkaj brovoj, oni mergiĝis en la serena kaj samtempe ĝoja klaro de l'rigardo kiel en fonta freŝo.

La junulo ekparolis. Lia voĉo estis, sur la gracio de lia sinteno kaj de lia vizaĝo, preciza kanto, de instrumentoj subtenata.

- Sinjoro, mi venas de Madrido por vidi la princon de la hispanaj verkistoj, kaj, se lia ĝentila komplezo egalos mian maldiskreton, por unu horon konversacii kun li.

Cervantes kliniĝis, envenigis la junulon kaj, montrante al li unu el la du seĝoj, kiujn posedas la domo :

- Poeto ? - li demandis.

- Mi strebas, sinjoro. Sed kiu, antaŭ vi, aŭdacus preni al si la gloran titolon ?

La nekonato daŭrigis :

- Mi estas infano, kiu vin admiras, lernoknabo, kiu vin pristudas, ĝermo, kiun Dio elvolvigos aŭ sekigos laŭ sia ĉiam adorinda volo.

- Via modesteco, - diris Cervantes, - estas al vi plia

Ĉarmo kaj kvazaŭ naiva florĉapelo. Ĉar vi ne povas nescii, junulo, ke vi egalas laŭ beleco la plej emociantan el la virinoj. La antikvuloj estus al vi dediĉintaj amoversojn kaj starigintaj statuojn.

La bela nekonato grave respondis :

- La belecon mi amas nur pli malfruan, kiam la ekstero tradukas la internon, kiam la animo disponis sufiĉan tempon por modli la trajtojn.

Li haltis post la ĝenerala formulo. Sed liaj okuloj, admirantaj, faris la specialan aplikon, ili kantis plej elektitan komplimenton.

- Ho poeto, - ekkriis Cervantes, - ne nur via frunto estas bela; bela estas ankaŭ la danco, kiu elvolviĝas malantaŭ via frunto. Ne sole via rideto lumas; lumas ankaŭ viaj paroloj. Ne sola via voĉo kantas, sed ankaŭ via penso estas supla melodio.

La nekonato delikate ruĝiĝis. Sur la preciza belo, tiu ruĝo metis tremeton, kvazaŭ flugon, el virga, preskaŭ infaneca gracio. Cervantes ravita diligentis plidabriĝi kaj renovigi la ĉarman ruĝiĝon. Tamen la diskreta ĝentileco haltigis la komplimentojn, tuj kiam ili ŝajnis fariĝi reala embaraso por la junulo. Kaj la maljunulo demandis :

- Poeto, ĉu vi jam verkis ?

- Mi estas, - diris la adoleskanto, - el tiuj urĝataj estuloj, kiujn oni nomas frumaturaj infanoj. Antaŭ du jaroj, okaze de la transporto de la cindro de Sankta-Izidoro, mi verkis soneton, kiun pluraj laŭdis kun grandanima indulgo. Poste, ĉu mi ne pelis la malsingardemon ĝis prezento de komedio, kiun oni bonvole aplaudis ? Kaj kelkajn aliajn mi verkis. Se nur neniu printempa frosto venos kontuzi tro hastajn florojn kaj senfruktigi arbon, kiu ignoras paciencon...

Sed li skuis la kapon kun naiva kaj senkoketeca gracio :

- Sinjor! Cervantes, ne por paroli pri mi, mi estis tiel maldiskreta ĝeni vian rifuĝiĝon. Ja por alporti al vi tutan mian admiron kaj tutan mian blindiĝon. Kaj ankaŭ, se ĝis tie vi pelos favoron kaj ĝentilecon, por kolekti el viaj kleregaj lipoj kelkajn altvalorajn konsilojn.

Cervantes ne hastis respondi. Li ŝajnis ne povanta satiĝi je la belo, kiun li vidas. Eble li provis legi, en la okuloj de la nekonato, iom el la estonteco de la kastilia belestro.

- Ĉiu hispano, - daŭrigis la junulo, - nomas Ruy Diaz de Bivar'on : mia Cid. Ĉu ĉiu verkisto el kiu ajn lando ne devus nomi Cervantes'on : mia Cid ?

En movo, en kiu maltimo kaj humilo miksiĝis kaj kunfandiĝis en gracion, la nekonato ekkaptis la manon skribintan Don Kihoto'n, ĝin premis al siaj lipoj.

Tiu omaĝo de la estonteco tuŝis Cervantes'on. Sed, kaŝante sian emocion, li demandis :

- Mi kredis kompreni, ke vi destinas vin precipe por teatro ?

- Vi ja ĝuste komprenis, mia Cid.

- Do Lope de Vega estas la sola princo, al kiu devas sin turni viaj devotaĵoj. Tiu monstro de la naturo tiel forte ekkaptis la komedian monarkion...

- Lope de Vega ? - diris la adoleskanto, levante la ŝultr-ojn. - Mi fordonus ĉion, kion de Lope mi konas, por la sola Numanco, aŭ por la sola Konfuzita, aŭ por la sola Feliĉa Rufiano.

Tiuj vortoj trafis rekte al koro de la misŝatata teatroverkisto. Tamen li kontraŭdiris :

- Lope de Vega kaj Juan de la Cueva kondamnas tiujn verk-ojn, kaj deklaras, ke tio, kion mi faras, ne estas teatro.

- Jen kion ili diras kontraŭ ĉio, kio estas kune bela kaj vera, arda kaj profunda, kontraŭ ĉio, kio kondamnas iliajn banalajn, supraĵajn komediojn... Tiel la aŭtoroj de Amadis kaj de Palmerin rifuzus rekoni romanon en Don Kihoto.

Eksaltis Cervantes :

- Ĉu vi scias, mirinda infano, kiel profunda estas tio, kion vi ĵus diris ? La teatraĵoj de Lope de Vega estas ja la lastaj kavalirromanoj. Liaj hidalgaj kaj damoj baraktas sur la stratoj kaj la balkonoj de Madrido anstataŭ kuri tra la vojoj, la kasteloj kaj la gastejoj. Sed ili diras la samajn elegantajn absurdaĵojn, plenumas la samajn bombastajn malsaĝaĵojn, staras same malproksime de la reala viro kaj de la reala virino. Kiu Don Kihoto fine triumfos super la mensogoj de tiu kavalirteatro, kiu kreas, situaciojn kaj karakterojn, nur fikcion ?

- koncerne min, - diris la junulo, - mi verkas, kaj ankorau kelkatempe verkados laŭ modelo de Lope de Vega. En la beletra armeo oni akiras liberon nur gajnante aŭtoritaton, kaj obeado estas la vojo al la gradoj, kiuj permesas komandi. Sed poste, kiam mi faros, kion mi volas, neniu el

miaj teatraĵoj estos el tio, kion ili nomas teatro.

Dum sekundo li enpenŝiĝis. Poste, kun suprencelanta rigardo kaj rideto simila al ekflugo :

- Tamen, ho mia Cid, ne al tero kaj realo mi sentas min tirata. Sed, ĉu la supro de la sierras (1) ne starigas, pli alte ol la plej altaj nuboj, neĝon pli blankan ol la blankaj nuboj? Ĉu la vera poezio ne leviĝas sur pli fortaj flugiloj ol la malvera, kaj ĉu la suprenimpeto de la aglo ne superas la flirtadon de la papilio?

- Vi posedas, - grave diris Cervantes, - tiun miksaĵon el poezio kaj praktikemo, kiu faras la grandajn venkantojn. Kaj li demandis :

- Filo, kiu estas cia nomo?

- Calderón.

- Calderón de oro !

Ĉu tiu, kiu rakontas tiun historion, kuraĝos traduki la krion de Cervantes?

En Hispanio, la suno nobeligas ĉiujn vortojn de la lingvo kiel ĉiujn homojn de la raso. Neniu estas de tiel modesta origino aŭ de ordinara ofico tiel malalta, ke li ne povu, ŝvela kaj ebria pro amo, sin vesti per la grandeco de horo aŭ de frazo, ĉu termino aŭreolata de subita lumo, ĉu embevecido (2), kiu, ĉar li staras apud sia amatino, restas kapvestita antaŭ la reĝoj, kaj, de la entuziasma alto de sia feliĉo, superas la majestojn. Vortoj(3), lernu via delikata supleco, kiam tion postulas la gloro de la cirkonstancoj, rektiĝi nobele kaj reĝe; scipovu via griza supleco, kiam necese, radii per stranga, suna enhavo; kiam la hazardo faras el vi heroldojn de la nova belo, altigu kaj vastigu la gracio de via murmuro ĝis la plej kornuŝaj elokventoj.

Aŭreolita de poezio, la nomo Calderón estas, por beletra klerulo, belego kaj brilego. Ĝi egalvaloras la silabojn, kiuj nomas, kune, ridinde funebran birdon kaj tiun Corneille (: korniko), kies impeto perdiĝas en pli brila radiado ol la flugo de la agloj. Ĝi egalvaloras la silabojn, kiuj kune nomas la subteran serpentadon de planto kaj tiun harmonian

(1) montoj.

(2) embevecido : absorbito, atentkaptito, ĉarmito.

(3) en la teksto : francaj vortoj.

Racine (: radiko), pli luma ol la elfloro de ĉiuj lilioj kaj de ĉiuj rozoj. Sed la stulteco de certaj ridemuloj kaj de kelkaj naŭzigemuloj faras danĝera la aŭdacon traduki tiajn nomojn. La stultuloj de la delikateco kaj la stultuloj de la rido ofte kondukas la tradukiston transformi la heroon razteleron en kaskon de Mambrin. Tamen estas neeble nomi Ujo, Baseno aŭ Cimbalo tiun, kiun la historio, genuanta antaŭ la riĉo de l'metalo kaj la belo de l' sonoj, nomas Calderón. Vortoj el ĉiuj lingvoj, obeu, kiam tion permesas via feliĉo, al la granduloj kaj al la grandaĵoj. Forskuu la ridindecon de la pasintaj vulgaraĵoj, kaj stariĝu indaj je la nobla mesaĝo al vi komisiita.

- Ho brila kaj sonora Kaldrono el oro, - ekkriis la ekstazo de Cervantes, - via brilo kaj via bruo trapasos la jarcentojn... Vi estas, mia Calderon, nek don Kihoto sur Rosinanta, nek Karlo-Kvina sur la kimerio; ankaŭ ne, sur la timema malrapido de azeno, la pezeco de Sanĉo Panca aŭ de Filipo IIa. Heroa kaj praktika, konkeranto inda je la konkerero, ho nobla kaldrono de oro...

La maljuna poeto haltis, tro emociita kaj la mano skribinta Numanco'n premis, amemo, admiro kaj espero, la manon skribontan La Vivo estas sonĝo'n kaj la Princo konstanta'n.

Ĉapitro Tria.

Ambaŭ poetoj pasigis la tagon kune, intersanĝante plej ingeniajn kaj profundajn parolojn. Sed la admiro de Cervantes ne restis senmiksa :

Calderón estis demandinta, kio estas tiuj Laboroj de Persiles kaj Sigismunda, kiujn li prilaboris.

- Tio estas proza epopeo, la epopeo de l'pardono.

La junulo ne povis teni duoblan mirektron.

- Proza epopeo!... Epopeo de l'pardono!

Li deziris ekkoni kelkajn paĝojn el la duoble nebla poememo. La aŭtoro legis certan epizodon pri la polo, kiu lia opinie konsistigis la moralan centron de la verko.

Unu nokton, en Lisbono, puŝtuŝegita de pasanto, polo estis albatallinta kaj mortiginta la ofendinton. "Li lasis la korpon sur la tero, kaj la animo iris, Dio scias kien". Postkurate de algvaziloj, la murdinto eniras tra la unue renkontitan malfermitan pordon. Li marŝas blindpalpe, kiel en sonĝo de frenezo, kaj fine ekvidas en la ombro homon.

Li diras sian aventuron kaj sian danĝeron. Respondas al li voĉo de maljunulino. Mano prenas la manon de la fuĝanto, lin kondukas en kaŝejon. Alvenas servisto kun lumigilo.

"Sinjorino, diras la servisto tremanta pro emocio, via filo estas ĵus mortigita, kaj oni kredas, ke la murdinto estas en via domo". Ĉe tiuj vortoj alvenas la algvaziloj. La maljunulino deklaras, ke ŝi nenian vidis. Ŝi forsendas la policanojn kun tiu deziresprimo : "Al Dio plaĉu, ke vi ne trovi la kulpulon, ĉar unu morto ne estas repagata per alia morto". Kiam la danĝero estas for, la nobla virino vokas la nekonaton el lia rifuĝejo. "Mi volas, ŝi diras, ke mian venĝemon paralizu mia vorto... Metu viajn manojn sur vian vizaĝon. Ĉar mi povus kontraŭvole malfermi la okulojn, kaj mi ne devas koni vin."

La polo eskapas el ĉiuj danĝeroj kaj vojaĝe atingas Indion. De tie riĉa li revenas. En gastejo en Talavera li renkontas junulinon, kies beleco "efektas al li kiel printempo, ĝoja majo, floroj kaj parfumo de la nova sezono". Li ŝin edzinigas. Kelkan tempon poste, la sendankulino forfuĝas kun amanto, kaj forprenas la riĉaĵon de la edzo.

La polo postpelas la edzinon kaj la forleginton. Li fi-

das, ke morgaŭ li atingos ilin. En li jam agitas la tim-eginda venĝoĝojo. Feliĉe, li renkontas survoje Persiles'on, kavaliron de l'mizerikordo. La polo rakontas sian aventuron, sian projekton, sian krudan esperon. Persiles respondas per plej kristana kaj malplej hispana parolo. Memore pri la dolora patrino pardoninta la murdon de sia filo, li pacigas la ofenditon kaj igas lin rezigni pri siaj kruelaj intencoj.

Ĉarmita kaj blindmirigita per la beleco de la vortoj, per la belkolora gracio de la bildoj, per la supla rajdado de la ritmoj, la estonta poeto de venĝo tamen aŭskultis en-skandalita konsterno.

- Ho mia Cid, - li fine ekkriis, - kiel ajn brilegaj estas la oro kaj purpuro, per kiuj vi vestas viajn sentojn, kiel ajn harmonie falas viaj drapiraĵoj kaj viaj frazoj, neniuj hispano iam akceptos vian doktrinon. Kaj se ĝin esprimus iu alia ol la heroo de Lepanto kaj Alĝero, li sin elmetus al justaj insultoj. Ĉar, en ordinara homo, ĝi estus nur malkuraĝo kaj kulpa forlaso de honoro.

La maljunulon afliktis aliaj paroloj kaj aliaj malkonsentemoj. Calderón diris sian admiron pri la Feliĉa Rufiano, "la plej bela el la komedioj pri sankteco". Post kiam li legis ĝin, li pensis pri temo, kiun li deklaris analoga. Kaj li rakontis kun intensa poezio sian estontan Devoteco al Kruco'n. Li rakontis kun kredo kaj ardo, kiuj mirigis kaj afliktis la maljunan skeptikulon. Ne, Cervantes ja ne estis en la ĉeesto de filo de lia spirito. Singarde li indikis, kia distanco kaj kia senfinaĵo malproksimigas ambaŭ konceptojn :

- Via Eŭzebio estas malbonega krimulo savita per la kredo kaj per speciala pieco. Mia Christobal de Lugo kunportas en la sankteco la grandanimon de don Kihoto aŭ de Persiles. Mi amas lin tial, ke, antaŭ la malespero de mortantino, li forgesas ĉion, kio koncernas lin mem kaj eĉ lian propran eternan saviĝon. Li donas tion, kio sola por li valoras, ĉiujn siajn amasigitajn meritojn. Li amas sian proksimulon suferantan ĝis tia grado, ke li volas preni por si alies inferon. Via koncepto estas admirinde poezia. Sed ĝi ŝokus la racion de nekredantoj kaj skandalus ilian koron. Kontraŭe, eĉ la plej senkreda admiros la geston de Christobal de Lugo.

La maljuna poeto pensis :

- Strikte katolika, strikte ligita al la hispana honorsento kaj al vengemo, tiu junulo havas ĉiujn malnoblajn religiojn de sia tempo kaj de sia lando. Poeto kaj ne pensulo, eĥo, kiu laŭtigas kaj beligas, sed bezonas, ke la unua sono venu de ekstere, li estas kondamnita resti en la kirliĝanta centro de sia tempo, kaj ripeti ĝiajn mil bruojn. Li estos tiu, kiu altigas kaj beligas la banalaĵojn. Li ne estos la nova voĉo, kiu krias en la dezerto la neaŭditajn vortojn, kaj riskas homplenigi la dezerton.

Kaj, kun mikso el rajta fiereco kaj afliktiĝo :

- Estas dekoble pli da estonteco en mia mortiganta penso ol malantaŭ tiu admirinda frunto de floranta juneco.
 - Ho mia Cid, - demandis Calderón, - ĉu tiuj, kiuj ridas legante Don Kihoto'n komprenas Don Kihoto'n ?
 - Mi volas, ke unue oni ridu. Poste mi deziras aliajn aferojn, kiuj eble venos.

Sed, ĉar la juna poeto demandis, kiuj estas tiuj aliaj aferoj, Cervantes respondis singarde, kiel konvenas antaŭ katoliko :

- Tion mi diros nek al vi nek al iu ajn. Ĉiu devas mem trovi. La trezoro, kiu kostis nenian penon, kian valoron ĝi konservus ? Serĉu, kaj vi trovos. Vi trovos laŭ la forto de via spirito kaj la libera nobleco de viaj sentoj.

Ĉapitro Kvara.

Ĉirkaŭ la mezo de aprilo, Cervantes finis La Laboroj de Persiles kaj Sigismunda'n. La penado kaj la malsano estis tiel elĉerpintaj lin, ke li murmuris, skribante la lastan linion :

- Libro kaj aŭtoro estas finitaj.

Li deziris morti inter siaj familianoj. Ĉar majstro Tomas kaj Rafael de la Rapita havis aferon en Madrido, la malsanulo uzis la okazon por vojaĝi en amika akompano.

Ekscitita de la printempa aero kaj de la paŝado de sia mulo, li estis en unu el siaj plej gajaj tagoj.

- Cervido, - li diris al si, - bone gustumu ciajn lastajn bonodorajn herbojn. En ĉiu el niaj horoj, al kiu scias ilin malfermi, enestas ĝojo, iafoje tiel abunda en la lastaj, kiel en la unuaj. Kia festa girlando kronis la tagon, en kiu ci renkontis Calderón'on, esperon, se ne de la penso, almenaŭ de la poezio kaj beletro kastiliaj ! Kia girlando el rozoj kaj imorteloj (1) kronis la tagon, en kiu ci finis Persiles'on, la plej klerecan, la plej bonfaran, kaj baldaŭ, se en la mondo estas kelka justo, la plej gloran el siaj libroj.

Kun intenseco iom propravole diligenta, li ĝuis la belon de la aĵoj kaj de la animoj, blindiĝis en la brilfluo de la lumo, sin varmigis per la elkoraj paroloj de siaj amikoj. Li aŭdis malantaŭ li homon pelantan sian rajdobeston kaj penantan atingi la malgrandan trupon. La poeto ne turniĝis, sin amuzante ne malgrandigi la baldaŭan surprizon. Sed baldaŭ voĉo vokis, petis, ke oni atendu.

Oni obeis la ĝentilan vokon, kaj vidis alveni nekonaton rajdantan sur azeno. Unue oni prenis lin por minimo, poste oni konstatis, ke li estas studento.

Grize vestita, la viro portis gamaŝojn, rondpintajn ŝuojn, spadon en longa ingo. Sed kio altiris rideman atenton, tio estis lia vasta amelrigida kolumo, malpura, malbone ligita per du linrubandoj. Tiu larĝa pendkolumo, delokiĝante ĉe ĉiu movo de la azeno, ŝajnis voli kovri jen la deks-

(1) helikrizoj. fr. immortelle = eternfloro.

tran, jen la maldekstran sultron. Ĉiumomente, hastema mano ĝin pelis, ĝin relojigis.

- Viaj sinjoraj mostoj, - diris la studento, - se mi konjektas laŭ la rapido de ilia marŝo, iras al la kortego peti oficon aŭ prebendon. Mi estis devigita peti de via ĝentileco, ke vi bonvolu min atendi. Tamen mi rajdas sur azeno, kiu, pro sia rapido, plurfoje venkokantis.

La barbiro respondis :

- Kulpas la mulo de sinjoro Miguel Cervantes Saavedra, kies paŝo estas tre longa.

Apenaŭ la studento estis aŭdinta la gloran nomon, tuj li eksaltis de sur sia azeno. Lia vestkofreto falis unuflanken, lia kuseno aliflanken, ĉar li ne vojaĝis sen kelka pakajaro. Lia maliceta kolumo kaptis la okazon por kovri lian vizagon. Tamen la junulo venis al la poeto, kaptis lian maldekstran brakon kaj ekkriis :

- Ja estas li, la fama brakstumpulo, la profunda verkisto, la favorato de la muzoj, la lumtorĉo de medicino.

Cervantes amuzite ĵetis la brakojn ĉirkaŭ la kolon de la junulo, intence kompletigante la malarangon de l' kolumo. Kaj li replikis :

- Cervantes mi ja estas. Sed mi estas nek la favorato de la Muzoj, nek iu ajn el la belaĵoj, kiujn vi ĵus diris. Rekapitu vian azenon, sinjor' studento, resaltu sur ĝian dorson, kaj ni daŭrigu en ĝojaj interparoloj la vojon, kiu restas al ni por iri.

Tiel faris la juna entuziasmulo. Kun bridoj en manoj, pli malrapidpaŝe, la plimultigita trupo daŭrigis sian vojiron.

La novveninto estis babilema. Li, preskaŭ sola, provizis la konversacion.

- Sinjoro Cervantes, mi estas jam skribinta la duonon de libro, kiu plaĉos al vi.

- Sufiĉas vidi vin, sinjor' studento, por diveni, ke libro de vi ne povus esti alia ol plaĉa.

- Tiu, por kiu mi laboras, estas, kiel vi povas konjekti laŭ mia juna aĝo, mia unua provo.

- Samtempe, mi ne dubas, ĝi estos majstrofaro.

- Ankaŭ mi ne dubas, sinjoro. Aŭskultu kiel elokvente ĝia nura titolo jam pledas por ĝi. Ĝi simple nomiĝas : Belaĵoj de praktika medicino eltrovitaj en la mirinda historio de la inĝenia hidalgo don Kihoto de la Manĉo.

Kvankam jam de longe Cervantes ne estis facile mirig-
ebla, li rigardis la studenton kun kelka mirkonsterno.

- Ĉu, - li sin demandis, - mia Don Kihoto, kiu esperis ku-
raci kelkajn frenezulojn, kreis novajn frenezulojn ?

La aŭtoro de la Belaĵoj de praktika medicino eltrovitaj
en la mirinda historio de la inĝenia hidalgo don Kihoto de
la Manĉo parolis nun kun triumfa rapidfluo.

- Mia libro analizas la demencon de don Kihoto laŭ ĉiuj
aspektoj kaj de ĉiuj vidpunktoj. Ĉar, kiel pruvis la gran-
da Hipokrato, necesas ekzameni la malsanojn en rilato kun
iliaj ecoj, iliaj kaŭzoj, iliaj formoj, kun la individuo,
kiun ili invadas, la organo, kiun ili afekcias, kun ilia
elvolviĝo, daŭrigo kaj ĉesiĝo.

- Kia abunda doktrino, - ekkriis la poeto.

Kaj li mordis siajn lipojn por ne rideksplodi.

- Malpli abunda ol via, sinjoro Cervantes. Mi salutas en
vi la rivalon de Hipokrato kaj la venkinton de Galieno.

- Vi kovras min per konfuzo.

La studento daŭrigis, arde kaj rapide :

- Havante por priskribi apartan frenezon, vi prudente ko-
mencis konsiderante la situacion kaj la vivon de la perso-
no, kiun vi intencis malsanigi; vi penetris la econ, la
karakteron kaj la naturon de la afekcio, kiun vi estis pri-
pentronta; vi kunmetis, kun senlima arto kaj perfekta sci-
enco, ĉiujn antaŭinklinojn utilajn - pli ĝuste diri : mal-
utilajn - kaj la kaŭzojn plej taŭgajn por naski kaj kresk-
igi la koncernan afekcion. Vi difinis ties sidejon; vi re-
vuis ĝiajn periodojn, observis ĝiajn transformiĝojn kaj
ĝian finiĝon; vi diskutis la prognozojn; vi adoptis la plej
propre taŭgajn kuracrimedojn. La tuto tiel konforme al la
leĝoj de naturo kaj medicino, ke via libro devas utili kiel
gvidilo al la plej doktaj kaj plej filozofaj.

- Mi certigas vin, sinjoro studento, ke neniam mi sonĝis
meti en mian libron ĉiujn tiujn sciplenajn aferojn.

Sed la sinjoro studento ekkriis :

- Ho sen-egala belo de la modesteco, kiam ĝi akompanas la
genion, mi diras la solan valoran genion, la medicinan
genion !

Kaj la juna aŭtoro, ŝajne timanta esti denove interromp-
ita, akcelis sian parolon :

- Mi solide argumentas mian demonstron. Mi komencas, kiel
konvene, per la antaŭinklinoj kaj la kaŭzoj. Nu, la cirkon-

stancoj akompanantaj la frenezon estas ekzakte en nombro dek unu, ne unu pli, ne unu malpli. Ĉiujn vi admirinde observis.

Tiam komenciĝis la nombrado, kapturna kuro :

- La unua el la cirkonstancoj, pri kiuj mi diras, estas gala, melankolia temperamento. Nu, mi parkere scias ĉion el Don Kihoto, kio havas valoron, t.e. ĉion, kio rilatas al medicino. Kaj jen kion diras pri tio la unua ĉapitro : "Li estis altstatura, fortika, malgrasa, sekvizaĝa kaj vilkorpa." Galieno kaj Hipokrato kune ne farus prezenton pli precizan, pli elegantan kaj pli koncizan. - La dua observenda cirkonstanco estas, ke "la mensmalsano prefere atakas maturaĝajn homojn". La inĝenia hidalgo estas ĉirkaŭ kvindekjara. - Tria interesa punkto : la frenezo, delikata gasto, pli ŝatanta palacojn ol dometojn, pli volonte invadas la viglajn kaj kulturitajn intelektojn. Don Kihoto estas spirite inĝenia, lia memoro estas riĉa, lia erudicio abunda, kaj liaj paroladoj estas mirbelajoj de elokvento. - Ni trovas kvaran favoran cirkonstancon (ĉar mi stariĝas sur scienca vidpunkto, sed, se prefere paroli humane kaj vulgare, mi diros : kvaran malfavoran cirkonstancon) en la rasa orgojlo kaj la vanta memadmiro de nobeleco en la observata persono. Kihoto estas hidalgo, li prenas al si la "don", li estas vantema kiel ĉiuj manĉanoj, kaj li estas rekta praido de Guttierre Quijada, venkinto de la filoj de l'grafo de San-Polo. - En kvina vico konvenas loki la fortegajn korpekzercojn; kaj don Kihoto (kiel la unua ĉapitro ne preterlasas indiki) ĉasadas leporojn. - Sese, la transpaso de aktiva vivo al vivo senokupa. "Don Kihoto (mi recitas) sin fordonis al legado kun tiom da gusto kaj plezuro, ke li preskaŭ tute forgesis la ĉasekzercadon kaj la administradon de siaj bienoj." - Sepe, la mallaksaj, viskozaj, malbonnutraj manĝaĵoj. La kutima dieto de don Kihoto estas konsistigita kun plej mirinda genio. "Puchero (1) pli ofte el ŝafaĵo ol el bovaĵo; vina-grosaŭco preskaŭ ĉiuvespere; sabate kaj vendrede, lentoj, al kio aldoniĝis dimanĉe kelka kolombeto". - Oke, la sezonoj somera kaj aŭtuna. Don Kihoto spertas siajn plej terurajn frenezatakojn en la 28a de julio, 17a de aŭgusto kaj 3a de oktobro. - Naŭe, la ampesioj. Menu pli amorema tem-

(1)puĉero : bŉlpoto, viandopoto; en plilarĝigita senco, la manĝaĵo en ĝi kuirita.

peramento ol tiu de la adoranto de Dulcinea. - Deke, la eksceso en legado. Mi ankoraŭfoje recitas : "Lia sciivolo kaj ekstravaganco atingis tian gradon, ke li vendis plurajn akreojn da tero por aĉeti librojn." - Dekunue, fine, la longedaŭraj maldormadoj. "Don Kihoto (diras tiu miriga unua ĉapitro, trezoro el neegalita kaj neegalebla scienco) tiel fervorege legis, ke liaj noktoj tute pasis en legado de vespero ĝis mateno, kaj liaj tagoj de mateno ĝis vespero. Tiel ke, pro nesufiĉa dormo kaj multega legado, li sekigis sian cerbon ĝis perdo de la menso."

Post numerado de la dek unu cirkonstancoj, Cervantes denove ekprovis ridetan proteston. Sed la studento per sendiskuta gesto ĝin flankenigis, kaj li reparolis :

- En via verko, samkiel en la naturo, la simptomoj de frenezo modifiĝas laŭ la diverseco de la malsano kaj de ĝiaj kaŭzoj. "Ĉar don Kihoto, vi genie rimarkigas, estis finperdinta la prudenton kaj prenanta por reala ĉion, kion li legis en libroj pri kavaliro kaj amo, lia imago pleniĝis de ensorĉoj, bataloj, provokoj, vundoj, ŝtormoj, de mil neeblaj ekstravagancoj; li tiel enŝovis en sian kapon, ke tiu tuta amaso el revaĵoj estas la realo mem, ke por li baldaŭ ne estis plu en la mondo iu pli certa historio".

Li montris, la neelsekigebla studento, kiel logike la simptomoj varias kaj disvolviĝas de epizodo al epizodo. Li medicine admiris ĉiun troon el orgojlo, maltime aŭ furiozo. Li studis, kiel ĉiu ekstera objekto prezentita al la sentumoj de la malsanulo ĵetas en lian menson novan laŭan konfuzon. Li pravigis la prezenton de la supreniĝaj kaj malsupreniĝaj fazoj de la malsano. Li miriĝis pri la neerar-ema scipovo, per kiu estas priskribitaj, en la diversaj eliroj de la heroo, la komencon, la progreson, la apogeon, la ekfiniĝon de la frenezo.

- En tiu longa disertacio, sinjoro Cervantes, en kiu vi igis la mensmalsanon vestiĝi per ĉiuj siaj necesaj formoj, vi, kiel konvene, aparte pezinsistis pri certa monomanio atentigita de la sciplena Aretius : "Ekzistas, diris tiu rara geniulo, speco de demenco, en kiu la malsanulo disŝiras siajn membrojn kun la pia konvinko, ke la dioj tion postulas, kaj ke tia konduto faras lin agrabla al iliaj okuloj." Kiel ajn admirinda estas la analizo de la sciplena Aretius, kiom pli nin instruas la epizodo, en kiu don Kihoto, sur la sierra Morena, imitas la pentofaron de la

Bela Tenebrulo !

"Sed, sinjoro Cervantes, vi nenion nescias. Vi scias, ekzemple, kiel la frenezuloj amas ŝanĝi sian nomon. Tial, post kiam li modifis sian nomon Quijada, Quesada aŭ Quijana, don Kihoto ankaŭ adoptas sinsekve la kromnomojn Kavaliro de la Trista Mieno kaj Kavaliro de la Leonoj. - Nun mi scias, - diris la poeto en ĝoja rido, - kial, estinte longatempe nomita Miguel Cervantes, mi nomigis min Miguel Cervantes Saavedra.

Sed la studento ne aŭdis. Ĉar li ne estis interrompinta sian torentan paroladon.

- La kuraciloj, kiujn vi aplikas al la malsanulo, estas ne malpli admirindaj ol ĉio cetera, ho plej genia el la kuracistoj estintaj, estantaj kaj estontaj. Por kuraci malsanon kune korpan kaj mensan, vi unuigas, en plej trafa proporcio, la psikan kuracadon kun la fizika. Ĉar vi ne nescias, vi kiu nenion nescias, ke la stomako estas la laboratorio, en kiu distiligas la sano.

"Vi ankaŭ rememoris, ho mirinda trezoro de erudicio, pri iu el la plej profundaj rimarkoj troveblaj en Hipokrato. La plej grandan inter la scienculoj, kiuj vin antaŭis, instruis al vi, ke ofte malsano kuraciĝas per la samaj kaŭzoj, kiuj ĝin produktis. Trovinte Hispanion infektita kaj enparazitita de kavalirlibroj, vi verkis unu, kiu mortigis la aliajn. Nu, ĝi mortigis ilin ne nur per rido, sed ankaŭ per kavalirecaj meritoj pli abundaj kaj pli eminentaj. Ĝisnaŭze vi supersatigis nin per tio, por kio ni malsatis, kaj mortigante malsanecan apetiton, vi nin operaciis je la plej ridinda kredemo".

Dum tiu senfina babilado, la barbiro fojfoje levis la ŝultrojn. Sed Rafael de la Rapita balancis aprobantan kaj admirantan kapon. La okuloj de la naiva soldato ne estis sufiĉe grandaj por la tuta blindiga brilo, kiun li sentis, kaj lia buŝo restis duone malfermita kiel ostro en sunlumo.

Cervantes fine ekkredis, ke li povas danki pri laŭdoj, en kiuj la ĝentileco certe havis pli grandan parton ol...

La bolanta studento ne permesis, ke li finu sian frazon.

- Fininte la libron, - li diris, - mi komencos duan, kiu titoliĝos : "Aliaj medicinaj distingindaĵoj eltrovitaj en la mirinda historio de la ingenia kavaliro don Kihoto de la Manĉo. En ĝi mi pristudos la kazon de Cardenio. Poste

mi faros trian verkon. Vi certe amos kaj admiros la subtilan titolon de tiu ĉi. Ĝi titoliĝos, aŭskultu kaj aplaudu, ĝi titoliĝos... Mi bonvolus lasi vin diveni ĝian titolon. Sed mi ne kredas, ke eĉ via genio tien atingus. Do mi grandanime diros al vi titolon, kiun neniu krom mi estus kapablinta trovi. Tiu verko nomiĝos : "La diafana trezoro de la medicina kristalo". Sed mi tuj klarigos la emociigan kaj enigman belon de tiuj vortoj. Jen estas mia kompleta titolo : La diafana trezoro de la medicina kristalo, aŭ la eminentaĵoj el praktika medicino eltrovitaj en la plej mirinda el la historioj, tiu de Tomas Rodaja, la vitra licenciato.

"Mi plenigos vin, sinjoroj, per konsternego kaj stuporo; post tiuj tri gigantaj verkoj, mi ne ripozos. Mi skribos la komplementon kaj la kontraŭparton al miaj unuaj verkoj en La falsa don Kihoto, aŭ la senvualigitaj nescioj de Avellaneda, la plej aĉa medicina azeno en nia jarcento.

- Unika fekundeco! - ekkriis Cervantes.

Sed la barbiro :

- Ĉu vi faros al ni la favoron, sinjor' studento, sciigi al ni la titolon de via kvina verko ?...

La sinjoro studento levis la ŝultrojn kiel du pintmontojn el malŝato, kaj, de alte rigardante majstron Tomas :
 - Kiam mi estos skribinta tiujn kvar majstroverkojn, mi rajtos ripozati kiel Dio mem post la kreado. Tiun rajton mi uzos, sinjoroj. Kaj se iu aŭdacos pretendi, ke mi ne sufiĉe faris por mia lando kaj por la homoj, mi provokos tiun malbonvolulon kaj mensoganton piede kaj rajde, per spado aŭ per lanco. Konfesu, sinjoroj, ke mi estos atinginta kaj transpasinta la limojn de la homaj fortoj; atinginta kaj transpasinta la ekstremajn limojn de l'genio. Voli pli antaŭen, estus tenti Dion. Feliĉe, mi estas sena je ĉia trompado. Kiam mi estas farinta ĉion al mi eblan, dekoble pli ol estus ebla al iu alia, mi aŭskultas la konsilojn de saĝo kaj ripozo. Senbadaŭre mi mortos, sinjoroj, lasante la memoron pri plej utila, plej plena kaj plej glora ekzistado. Post la kvar sensaciaj verkoj, pri kiuj mi parolis al vi, mi kantos kvarfoje la kantikon de la maljuna Simeono... Mi silentas, sinjoroj, ĉar, se mi dirus pli, mi timus manki je modesteco.

Cervantes adresis al la modesta studento la dankojn kaj gratulojn al li ŝulditajn.

- Mi bedaŭras, - li poste rimarkis, - ke mi ne estas tiel lerta kuracisto, kiel deklaras via tro grandanima ĝentileco. Mi uzus iom el mia lerteco por kuraci mian propran malsanon.

- Ĉu vi ja estas malsana, sinjor' poeto ?

- Mia vivo finiĝas, sinjor' studento. Al mi restas tro mallonga tempo por montri al vi, kiel sentema mi estas al la sindonemo, kiun vi al mi evidentigas. Dimanĉon mi ĉesos vivi.

La studento levis ambaŭ brakojn al ĉielo kiel du admirpunktojn :

- Ha, kia granda, rara, unika kuracisto : li konas la daton de sia morto !

La barbiro kaj Rafael de la Rapita komencis eksplicite kelkajn el la simptomoj, kiujn sentis Cervantes.

- Sinjoro Cervantes ne povas nescii, diris la studento, - ke lia malsano estas hidropso. Por lin sensoifigi oni elĉerpis la tutan akvon de ĉiuj riveroj. Sed sinjoro Cervantes ja scias, ke li devas nur moderigi sian trinkadon kaj ne preterlasi mangadon. Se li volas, li sin resanigos tiel facile kaj tiel majstre, kiel li resanigis don Kihoton.

- Mi lin resanigis nur por lin mortigi, - milde diris la poeto.

- Kiel domaĝe, sinjoro, ke vi ne konsentas pli longe vivi: tian plezuron mi estus havinta, legante al vi mian libron.

- Ne malpli da plezuro mi estus havinta, ĝin aŭdante.

- Pri tio mi estas certa, sinjoro. Eĉ la nura duono ĝis nun skribita sufiĉus por plenigi vin je ĝojo kaj admiro.

- Bedaŭrinde, sinjoro studento, oni havas multe por fari antaŭ ol morti. Necesas, ke mi skribu la dediĉleteron por mia Persiles; necesas, ke mi skribu mian testamenton; necesas, ke mi plenumu ĉiajn devojn al homoj kaj al Dio.

- Rimarku, sinjor' poeto, ke mi ne insistas por trudi al vi la plej grandan el la ĝojoj. Cetere, mia manuskripto estas en Toledo, kien mi ne reiros antaŭ unu monato. Ĉar vi ne konsentas, pro konsidero al mi plu vivi la necesan tempon, mi estas nepre devigata rezigni pri rekompenco, kiun tamen mi meritis.

- Vi igas min tute konfuza, sinjoro studento, kaj mi ne trovas sufiĉajn vortojn por laŭdi vian neegaleblan diskretecon.

La eta trupo alvenis al la ponto de Toledo. La studento estis trapasonta tiun de Segovio. Post lasta brakumo disigis la novaj amikoj. Kiam la studento estis sufiĉe malproksime, Cervantes eksplodis per plej ĝoja ekrido.

- Kiel domaĝe, - li diris, - ke gajeco ne estas la specifa medikamento de hidropso. La rememoro pri tiu viro min resanigus.

Ĉapitro Kvina.

Cervantes, laŭ siaj kalkuloj, havis kvin tagojn por vivi. Sed al siaj kalkuloj li konsentis moderan fidon, kaj eble li estis pli frue forpasonta. Li hastis fari tion, kio restis farennda.

La plej grava por la familio estis, ke li ricevu la lastan sakramenton. Ofte estis pri li dirita la populara diro: "Li tro multe scias, ke li ne estu luterano." Se li volis ŝirmi tiujn, kiujn li postlasis, kontraŭ la hororoj de persekutado, li devis ludi la komedion de katolika morto, de sankta kaj edifa morto.

Li evitis prokraston, kiu povus damaĝi la amatinojn. Li manifestis plej religian urĝemon por ricevi la absolvon, la viatikon kaj la lastan sanktoŝmiron. Kiam tiuj formalaĵoj estis plenumitaj, licenciato Lopez foriris murmurante: "Mi ĵus asistis sanktulon". En la sama momento, la poeto grumblis kun naŭza paŭzo:

- Pli martira ol martiroj...

Sed li faris la ŝultromovon, per kiu forĵetiĝas la neutilaj ŝarĝoj, kaj, sin turnante al la muro kiel por dormi, li faris al si jenan mallongan paroladon:

- Perdu do la kutimon - estas apenaŭ ankoraŭ tempe, se ci volas ĝin perdi - fanfaroni antaŭ ci mem pri nenio aŭ pri neniaĵoj. Kian ĉagrenon ci povas senti, ridemulo, ludante cian parton en la koncerto de burleskaĵoj ludata de cia jarcento? Ĉu estas tiel malfacile diri al don Kiĥoto, por ke li ne ataku ciajn amatojn: "Jes ja, sinjor' kavaliro, Dulcinea estas la plej senkompara el ĉiuj belulinoj." Ci tro precize konas. cervido, la fetoran, mordeman, kruelan malbelecon de ilia Dulcinea. Sed la mensogo, per kiu oni malkoleriĝas la frenezulojn, ne estas mensogo. Se ĝi malhelpas la frenezulojn malbonfari al povraj sendefendaj estuloj, ĝi fariĝas la plej nobla el la devoj.

Li pene aldonis:

- La plej nobla, la plej gaja, la plej facila el la devoj.

La vaganta penso de la malsanulo sin retransportis al la morto de Aŭgusto. "Aplaŭdu, diris la imperiestro, la komedio estas finita".

- Tamen, - songis la poeto, - tiu antikva Romano ne konis la konfeson, la absolvon donatan de viro, kiu, kiel ajn malmulte mi valoras, ne tiom valoras kiom mi; la dion, kiun oni manĝas en pastopeco, kaj kiun mi baldaŭ elĵetos inter aliaj ekskrementoĵoj, kaj tiujn oleojn pli ensorĉitajn ol la balzamo de Brakfierulo, kiuj sufiĉas por forviŝi la pekojn de ĉiu el miaj sensorganoj. Ha! se la vivo ĉiam estis komedio, kiel la Eklezio sciis perfektigi la farson, tiom pli ridinda, kiom pli solena !

La morgaŭon, li skribis en sia lito la ĝojan leteron al grafo de Lemos, kiu servas kiel dediĉo al Persiles kaj Sigismunda. Poste li faris sian testamenton. Li starigis sian edzinon sia testamenta plenumanto. Sed, por igi siajn lastajn voloĵojn pli respektindaj, li aligis al donja Catalina pastron el siaj amikoj, licenciaton Francisco Nuñez. Kontraŭ la suspektoj pri herezeco kaj malkredo, li multigis plej detalajn antaŭzorgojn : li petis mesojn por sia animo, li esprimis la deziron esti enterigita ĉe la triunuaj monakinoj kaj en la krudlana vesto de la tria-ordeno.

Tute certa, ke li ŝirmis sian edzinon, sian fratinon kaj sian nevinon kontraŭ la kruelaĵoj de la Inkvizicio, li havis rideton kune venkan kaj krispiĝan. Kaj li diris :
- La tuta elaĉetprezo estas pagita; mi povas forlasi Alĝeron.

Restis al li du aŭ tri tagoj da paco.

La vendredon vespere, li sentis tiel cedeman malfortecon, ke li murmuris :

- La fino venos pli frue, ol mi kredis. Mi amas ankoraŭ vidi la morgaŭan sunon. Tamen, estu farite laŭ la volo de l'Mastro.

Li vidis, kiel li estis dezirinta, la matenon de l'sabato.

- Malfermu, malfermu al la suno.

Oni obeis. La radioj ĝojigis lian mortiĝantan korpon, ĝojigis liajn preskaŭ estingitajn okulojn, ĝojigis lian penson. Li revis pri la brila estonteco de la hispana poezio. Li diris en admira tono :

- Calderón de oro!

Sed li songis pri ĉio, kio mankas al spirito kaj koro de katoliko plena je maltolerema kredo, al hispano obstine honorsenta kaj amika de venĝo.

Kaj li rediris kun akcento de riproĉo kaj bedaŭro :

- Calderón de oro!

- Pri kia oro ĉi parolas ? - demandis lia edzino.

Li jam ne povis respondi.

Ŝi vidis liajn fiksaĵajn okulojn, lian buŝon malfermitan kiel antaŭ la rigidigo de nova spektaklo. Ŝi proksimigis siajn manojn al la disigintaj lipoj, kaj ŝi ne sentis ian spiron. Ŝi falis, tute en larmoj, sur la genuojn.

Ankaŭ Costanza surgenuis, kaj la ploroj inundis ŝian vizagon.

Sed Luisa konsolis ilin :

- Ĉu vi ne aŭdis ? Li parolis pri loko, en kiu eĉ la kaldronoj estas el oro. Li mortis kiel sanktulo, jam blindigita kaj ravita de la paradizaj gloroj.

**

**

Glosaro

kun indiko de la unua paĝo, en kiu troviĝas ĉiu vorto.

- 46 adoleska, adoleskanto. Adolesk/i : esti en tiu vivperiodo, kiu venas post la infanaĝo k estas karakterizita per la ekfunkciado de la seksaj glandoj (PIV)
- 47 algvaziloj : alguazils (hispanaj ĝendarmoj). G. Warin-gnien, Grand Dictionnaire Esperanto-Français.
- 108 alkarazo : vazo el pora argilo, en kiu la akvo malvarmiĝas pro vaporiĝo (PIV) (pliĝuste : kruĉo)
- 91 berberianoj. Berber/o : ano de nordafrika popolgrupo (PIV). De tiu radiko, Berberio = Magrebo (Maroko-Alĝerio-Tunizio). Berberiano = magrebano; proks. samsignifa kiel : maŭro.
- 91 breveto : dokumento subskribita de suvereno, aŭ de ministro, donanta personan privilegion, ekz-e nobelan titolon, oficiran gradon (sen salajro) (PIV)
- 15 brutala : Brutal/o : krudaĉa, perfortema, kruela homo (PIV)
- 108 danaidina barelo : la filinoj de Danao, mitologia reĝo, murdinte siajn edzojn, estis kondamnitaj plenigi senfundan barelon.
- 20 degni : bonvoli, konsenti fari, sentigante tamen ian moŝtecan komplezon (PIV)
- 28 dejo : guberniestro de Alĝero sub la turka regado (PIV)
- 75 delica. Delic/o : intensa plezuro (PIV)
- 23 devoteco, devotaĵo. Devot/a : sindoneme, fervore pia (PIV)
- 123 dokta : scioplena, kleriga (PIV)
- 13 dublono : ora monero
- 69 duenjo, hisp. dueña, fr. duègne. Maljuna guvernistino. komisiita por varti junulinon.
- 68 fragila : malfortika, facile rompebla, rompiĝema (PIV)
- 118 Indio, aŭ Hindio, sed verŝajne temas pri "Okcidenta Hindio", t.e. Ameriko, lando de la "Indianoj".
- 78 lantemaĵoj. Lant/a : malrapida; lanti : pasigi multe da tempo, farante ion negravan; tro malrapide agi (PIV)
- 47 lindeco. Lind/a : pike agrabla por rigardi, plaĉaspekta (PIV)

- 88 maritornoj. Maritorna : nomo de gasteja servistino en Don Kihoto. - malbela, malpura virinaĉo.
- 81 maŭroj. Maŭr/o : ano de tiuj arabaj triboj, kiuj konkeris Magrebon, Hispanion kaj parton de la okcidenta bordo de Afriko (PIV)
- 121 minimo : religiulo el ordeno fondita ĉ. 1435 de Francisko de Paŭlo.
- 52 mizerikordo : 2. kompata indulgo (PIV)
- 111 La Nevenkebla Armada : giganta ŝiparo sendita de Filipo IIa al Britio, j. 1588, por sentronigi Elizabetan Ian kaj restarigi katolikismon. Ŝi estis detruita de ŝtormo.
- 103 ostaĝo : persono liverita al alia persono kiel garantio de plenumota promeso, kontraŭ insidoj, ktp. (PIV)
- 36 ranĉo : establo de brutbredado (PIV)
- 25 rankoro : obstina malpardonemo, venĝema resento (PIV)
- 26 rimorso : konscienciproĉo (PIV)
- 42 romanesko, Roman/esk/a : simila al fantazia romano (PIV)
- 115 rufiano, it. ruffiano : diboĉulo (aŭ prostituisto)
- 48 rumoro : konfuza kolektiva voĉbruo (PIV)
- 16 sateno : silka teksaĵo, kies unu flanko estas glata k brila (PIV)
- 31 sinoplo : la verda koloro, en la blazona lingvo (PIV)
- 66 skapulario : 1. Monaĥa manteleto, kovranta la ŝultrojn.
2. Religia objekto, konsistanta el du pecoj de benita ŝtofo, pendantaj sur la brusto kaj la dorso, k kunigitaj per kordono ĉirkaŭ la kolo (PIV)
- 127 stuporo. 2. Obtuzo senmoviĝo pro fortega surprizo aŭ timo (PIV)
- 28 tartufoj. Tartufo : persono en komedio de Moliero, tipo de la hipokritulo (PIV)
- 45 tavernestro, tavernisto. Taverno : pli malpli luksa drinkejo, kie oni povas ankaŭ manĝi (PIV)
- 75 tenebroj. Tenebr/o : profunda mallumo fizika aŭ spirita (PIV).

B R O Ŝ U R S E R V O

La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut

poŝtkonto: 3 374 04 M Bordeaux

; La prezoj en francaj
frankoj entenas la
afrankon por minimuma
mendo je 5 FF.

***** Mendkodo. FF

<u>Levreaud</u> : Atomcentraloj (debato)	. AC . 1,5
<u>Lanti</u> : Adamaĵoj (prelegoj, humuraj artikoloj)	. AD . 4.
<u>J. Duboin/PV. Berthier</u> : Abundo kaj konsumsocio	. AK . 3.
<u>Malatesta</u> : Anarkio kaj organizo k. aliaj tekstoj	. AO . 2.
<u>HD. Thoreau</u> : Civila Malobeemo	. CM . 3.
<u>Pario</u> : Durruti, simbolo de la hispana revolucio	. DU . 2.
<u>Krishnamurti</u> : Eduko kaj vivsignifo - Rimarki	. EV . 3.
<u>Jack London</u> : La forto de la fortaj	. FF . 2.
<u>Oscar Wilde</u> : La homa animo sub socialismo	. HA . 1,5
<u>A. Pannekoek</u> : Historia materiismo - Socia organizo.	. HM . 2.
<u>Eugen Relgis</u> : Humanitaristaj principoj	. HP . 1,5
<u>Han Riner</u> : Individuismo en Antikveco	. IA . 4.
<u>Han Riner</u> : Individuista Manlibreto	. IM . 2.
<u>Sébastien Faure</u> : La krimoj de dio	. KD . 2.
<u>Han Riner</u> : La Kvina Evangelio	. KE . 7.
<u>Valo</u> : El la kara infaneco (aŭtobiografio)	. KI . 6.
<u>Lanti</u> : La laborista esperantismo	. LE . 1,5
<u>Diversaj aŭtoroj</u> : La liberecana penso (citaĵoj)	. LP . 1,5
<u>Fontaura/J. Grave</u> : Liberecanaj vivkonceptoj	. LV . 2.
<u>P. de Cazenove</u> : La migrantoj en Francio nuntempe	. MI . 3.
<u>La Boétie</u> : Memvola servuto	. MS . 2.
<u>Bartelmes</u> : Mia vivo. Artikolaro. Poemaro	. MV . 4.
<u>Roza Luksemburg</u> : Naciecaj problemoj	. NA . 2.
Ĉu armeo aŭ civila neperforta defendo ?	. ND . 5.
<u>Rufegon</u> : Manlibro de nova homo	. NH . 1,5
<u>SJ. Lec</u> : Nekombitaj pensoj (satiraj sentencoj)	. NP . 1,5
<u>T. Ebert</u> : Ĉu neperforta revolucio ?	. NR . 1,5
<u>Paul Lafargue</u> : La rajto de pigro (pamfleto)	. PI . 3.
<u>Han Riner/Alain</u> : Por nia medito (trad. Lanti)	. PM . 2.
<u>Diversaj aŭtoroj</u> : Por la paco (citaĵoj)	. PP . 2.
<u>Diversaj aŭtoroj</u> : Prognozio (novelaro el la pola)	. PR . 2.
<u>Domela-Nieuwenhuis</u> : La Piramido de l' Tiranismo	. PT . 2.
<u>Kropotkin</u> : Revolucia registaro k. aliaj tekstoj	. RA . 3.
<u>Josef Burger</u> : Rido sanigas! (humura poemaro)	. RS . 2.
<u>H. Masson</u> : Tabakismo kaj emancipiĝo	. TE . 2.
<u>J. Ingenieros</u> : La triviala homo	. TH . 5.
<u>Alfa-Beta</u> : Tra la mondo per biciklo kaj esp-o	. TM . 3.
<u>Lanti</u> : El verkoj de E. Lanti	. VL . 7.